# De Cock
## kaj la morto en preĝo

*A. C. Baantjer*



De Cock kaj la morto en preĝo

# De Cock kaj la morto en preĝo

*A.C. Baantjer*

Esperanto Nederland

Tradukita el la nederlanda fare de teamo en Nederlando.
Originala titolo: *De Cock en de dood in gebed*, 2008.

Biteldono 16-a de aprilo, 2023
ISBN 9789080322677
© A.C. Baantjer. Ĉiuj rajtoj rezervitas.

Ĉiu eldonaĵo de la tuta aŭ parta teksto devas ĉiam mencii: Ĉi tio estas traduko el la nederlanda libro de A.C. Baantjer – *De Cock en de dood in gebed*; De Fontein, Utrecht, Nederlando. 2008.

Informoj ĉe esperanto-nederland.nl

*Al la esperantistaro de la tuta mondo*

# Enhavo



| | |
|---|---|
| 1 | 1 |
| 2 | 15 |
| 3 | 29 |
| 4 | 41 |
| 5 | 53 |
| 6 | 65 |
| 7 | 79 |
| 8 | 93 |
| 9 | 107 |
| 10 | 119 |
| 11 | 131 |
| 12 | 143 |

13 155

14 167

15 185

# La verkisto




Appie Baantjer. 2022, November 18. Fonto: nederlandlingva Vikipedio.
nl.wikipedia.org/wiki/Appie_Baantjer

A.C. (Appie) Baantjer aliĝis al la amsterdama polico en 1945. En 1963, li verkis la unuan libron pri sia fama policano De Cock. Ĉi tiu libro estas lia lasta en 2008. Entute li publikigis 70 De Cock-krimromanojn. Li naskiĝis en 1923 kaj mortis en 2010.

## Resumo



Fonto: Pngtree Skyline Amsterdam Silhouette

Drogulo arestita pro rabo rakontas al De Cock, ke li bezonas la monon pro la dependeco de sia amatino. Li ankaŭ konfesas, ke ŝi promesas kvindek mil eŭrojn al tiu, kiu mortigas ŝian patron, por ke ŝi povu sendrogiĝi per la heredota mono.

Tiam Dick Vledder enkuras la detektivĉambron. En la malpura akvo de *Keizersgracht* flosas kadavro. La ŝulacoj de la mortinto estas kunligitaj kaj la fingroj de liaj falditaj manoj estas kungluitaj per forta gluo. Montriĝas, ke la korpo apartenas al Viktor Handgraaf, potenca kaj riĉa viro.

Kiam alia mortinto estas trovita kun la manoj kungluitaj, De Cock estas certa ke la viktimo ne enprofundiĝis en preĝo kiam la sorto trafis lin. Sed kiaj malpli piaj motivoj estas malantaŭ tiuj murdoj?

# 1

LA DETEKTIVO De Cock en la konata kaj malnova policejo ĉe amsterdama *Warmoesstraat*[1] iomete klinis sin malantaŭen sur sia seĝo kaj pense levis la okulojn al juna policano, kiu kun timema rideto staris apud lia skribotablo kaj firme alpremis sian ĉapon sub la dekstra brako.

Okazis tiel malofte, ke alvenis sufiĉe trankvila tago, en kiu la maljuna detektivo povis tralegi dosierojn kaj kelkfoje dediĉi longajn pensojn al solvitaj kaj nesolvitaj kazoj; tial, la alveno de la juna policano lin surprizis.

La vizaĝo de la policisto estis al li svage konata.

De Cock estis konvinkita, ke la juna policano ĉe sia alveno al la policejo *Warmoesstraat* estas prezentita al li, sed en la polvokovrita subtegmentejo de sia memoro li ne povis trovi nomon por tiu vizaĝo.

«Bonan vesperon,» li diris afable.

La juna policisto rikanis.

«Bonan vesperon. Mia nomo estas van Gendt... Jan van Gendt.»

Aŭdante la nomon De Cock nevole ridetis kaj iomete puŝis sian malsupran lipon antaŭen.

«Bela nomo,» li diris kun scintilaj okuloj.

«Bone memorebla. Iom forta.» Li paŭzis momenton.

«Gend kun d aŭ t?»

«Kun dt.»

De Cock denove ridetis kaj komprenis, ke li ne faru iun banalan aludon al la granda birdo, la norda sulo[2], kiu

---

[1]Warmoesstraat: warmoes = malnova nomo por foliaj legomoj. en.wikipedia.org/wiki/Warmoesstraat La nomoj de urboj kaj stratoj estas kursive notitaj en la originala nederlanda lingvo, eĉ se kutimaj esperantigoj ekzistas (ekz. Amsterdamo, Lejdeno, k.s.)

[2]norda sulo (marbirdo): La nederlanda nomo estas “Jan-van-gent” eo.wikipedia.org/wiki/Norda_sulo

transiras *Noordzee* (Nordan Maron).

«Ho ve, ne troigu.»

La juna policano metis sian ĉapon sur la skribotablon de De Cock kaj serĉis en poŝo de sia uniformo. Li elprenis malpuran injektilon kun nadlo kaj metis ĝin sur la skribotablo antaŭ la maljunan detektivon.

De Cock grimacis kun abomeno.

«Kion mi faru per tiu aĉa ilo?»

La juna policisto rigardis embarasite.

«Mi pensis ke vi traktas tiun kazon.»

De Cock mire rigardis lin.

«Kiu kazo?»

«De tiu drogulo kiun mi alportis antaŭ duonhoro.»

La maljuna detektivo gestas al la seĝo apud sia skribotablo.

«Trankvile sidiĝu,» li afable diris.

Vledder, la juna kolego de De Cock, kiu fervore komputilis, permesis mallongan paŭzon al siaj dancantaj fingroj kaj rigardis demande al De Cock, sed lia maljuna mastro indikis per mallonga kapskuo, ke li povas daŭrigi.

Tio sufiĉis al Vledder por forlasi la ĉambron. Kiel li povus labori senĝene, kiam lia mastro konversacias apude?

«Vi alportis drogulon, ĉu?» De Cock daŭrigis.

La juna policano sidiĝis kaj kapjesis.

«Suspektata pri rabo... Laŭ mi pure perforta prirabo. Tiu drogemulo alparolis anglan turiston en *Oudekennissteeg*[3] proksime al *Achterburgwal*[4] kaj forprenis lian tutan monon.»

---

[3]Oudekennissteeg: Malnova konato-strateto

[4]Achterburgwal: = achter + burg + wal: malantaŭ + burgo (urbeto) + muro ; La Oudezijds Achterburgwal estas parto de la mezepoka urbo kaj siatempe formis la orientan limon de Amsterdamo.

De Cock sulkis la brovojn.

«Ĉu simple tiel?»

La policisto montris la malpuran injektan nadlon kaj skuis la kapon.

«Ne simple tiel. Certe ne. Li diris al tiu anglo ke li estas malsana de jaroj... aidoso... kaj ke li pikos lin per sia infektita injektilo se li ne tuj donos sian tutan monon.»

«Kaj tion donis la anglo?»

Jan van Gendt kapjesis.

«Tiu anglo estis terurita, ke la drogulo vere pikos lin per tiu malpura nadlo. Li eĉ libervole demetis sian brakhorloĝon.»

De Cock oblikve rigardis lin.

«Ĉu temas pri vera perforto?»

Van Gendt reagis surprizite.

«Ĉu vi ne pensas, ke tio estas vera perforto?» li vokis videble emociite.

«Ne.»

«Kiam iu estas minacata per terura, diru mortiga malsano?»

De Cock forsvingis la komenton.

«Ni konsideras tion provizore,» li trankvile diris, «kiel ŝtelon sub minaco de perforto. Tio ja estas sufiĉe serioza.»

Li signis al Van Gendt.

«Kiel vi okupiĝis pri ĉi tiu kazo kiel policisto?»

Van Gendt montris per la dikfingro super sia ŝultro.

«Mi gvatis *Wallen*[5] proksime al *Barndesteeg*[6], kiam tiu

en.wikipedia.org/wiki/Oudezijds_Achterburgwal

[5]de Wallen: Ruĝluma Distrikto; prostituada kvartalo en la plej malnova parto de Amsterdam eo.wikipedia.org/wiki/De_Wallen

[6]Barndesteeg: brando-strateto en la malnova parto de la urbo

anglo venis al mi kaj rakontis, kio okazis al li.»

«Ĉu en la angla?»

La juna policisto strange rigardis lin.

«Jes,» li ekkriis incitite. «Ne en *Hooghaarlemmerdijks*[7]. Anglo atendas, ke ĉiuj en Amsterdam parolu kaj komprenu la anglan.»

De Cock ridetis.

«Kaj poste?»

«Tiam mi reiris kun tiu terurita anglo al *Oudekennissteeg*. Je mia surprizo, tiu drogulo ankoraŭ estis tie.»

«Ĉu vi arestis lin tie?»

«Jes.»

«Poste vi forprenis tiun injektilon de li kaj kunprenis lin al la policejo.»

«Ĝuste.»

De Cock malaprobe kapneis.

«Neniam plu agu tiel,» diris la maljuna detektivo patre.

Jan van Gendt surpriziĝis.

«Ĉu mi misfaris ion?»

De Cock ne respondis. Li malfermis tirkeston de sia skribotablo, elprenis puran korketon kaj tre zorge premis ĝin sur la pinton de la injektila nadlo.

Poste li denove enŝovis sian manon en la tirkeston de sia skribotablo kaj metis kelkajn korkojn antaŭ la junan policanon. «Vi ĉiam havu ilin kun vi,» li diris fervore.

«Nur metu ilin en vian poŝon. Memoru kaj zorgu pri tiuj malpuraj injektiloj. Ili estas vivminacaj. Se vi hazarde pikos vin per unu el tiuj nadloj... kredu min, vi povus esti

[7] Hooghaarlemmerdijks: platamsterdama ĵargono, plej civilizita; ŝerca esprimo.

infektita per hepatito B[8] aŭ aidoso. Kaj tiam vi ne estas la unua policano, kiu tiel alvenas en hospitalon.»

La maljuna detektivo flanken rigardis kaj rigardis Jan van Gendt dormeme kaj kun ŝajnigita zorgo. «Ni ankoraŭ ne volas perdi vin ĉe la polico,» li diris kun larĝa rideto. «Kaj mortinta policano[9] ne utilas al ni.»

Van Gendt ridetis.

«Mortinta policano. Mi pensas», li respondis kun gaja rido, «ke ankoraŭ ekzistas multaj "mortintaj policanoj" loĝantaj en nia malvarmeta malgranda lando.»

De Cock kapneis.

«Ne ĉe ni en *Warmoesstraat*.»

Jan van Gendt metis la korkojn en flankan poŝon de sia tuniko. «Mi pensu pri tio la venontan fojon.» Li rektiĝis de sia seĝo.

«Ĉu mi alportu tiun drogulon al vi por pridemando?»

De Cock kapjesis.

«Faru tion… antaŭ ol tiu ulo reekhavos stimulperdajn simptomojn, ĉar tiam li ne plu estos alparolebla.»

De Cock rigardis la junulon, kiu sidis sur la seĝo apud sia skribotablo, akre esplorante. Li havis maldikan, palan vizaĝon kun iomete elstaraj vangostoj kaj malpurigitaj ruĝetaj haroj.

Liaj palverdaj okuloj profundiĝis en la orbitojn.

Ĉifona jako kun truoj sur la manikoj kurbiĝis ĉirkaŭ lian magran korpon, kaj la ĝinzo, kiun li portis, havis disfadenajn krurumojn. Liaj nudaj piedoj estis en paro de eluzitaj gimnastaj ŝuoj.

---

[8] Hepatito B: grava hepata malsano

[9] Morta policano: 'dooie diender', moknomo por senspritulo

La maljuna detektivo taksis lin ĉirkaŭ tridekjara, sed venis al li en la kapon, ke li probable estas pli juna. Troa droguzado markis lian vizaĝon.

La junulo ĵetis rigardon al li kun malamika mieno. «Ĉu vi… hm, ĉu vi tenas min ĉi tie?»

De Cock senzorge gestis.

«Estas kutime por mi diskuti ĉi tion kun mia komisaro, sed mi supozas, ke vi restos ĉi tie provizore.»

La junulo reagis malafable.

«Mi estas malsana. Mi bezonas vidi kuraciston.»

De Cock kapjesis malrapide.

«Mi venigos kuraciston por vi poste,» li respondis trankvile. Li iomete klinis sin al la knabo. «Vi indikis al tiu policisto, ke via ĝusta nomo estas Laurens van der Dungen… ĉu ĝuste?»

La junulo kapjesis.

«Tio ĝustas.»

«Kiom da jaroj vi aĝas?»

«Dudek du.»

De Cock montris la injektilon sur sia skribotablo antaŭ li.

«Ĉu tio estas via posedaĵo?»

«Mi devas rehavi ĝin.»

De Cock kapneis.

«Mi konfiskas tiun vian aferon. Vi faris gravan krimon uzante ĉi tiun injektilon. Krome vi povas pli bone ne uzu tiujn malnovmodajn injektilojn estonte.» Laurens van der Dungen puŝspiris.

«Mi mem povas decidi pri tio. Mi volas rehavi tiun injektilon. Mi kutimiĝis al tiu aĵo.»

De Cock ignoris la komenton.

«Kiom longe vi jam estas drogulo?»

Van der Dungen ridetis.

«Tiom longe kiom mi memoras. Ŝajnas al mi jarcentojn… jarcentojn de atingado, de marĉandado. Mi ankoraŭ estis en la lernejo kiam mi havis mian unuan droginjekton.»

«Ĉu vi efektive estas malsana… mi volas diri, ĉu vi havas aidoson, kiel vi mensogis al la anglo?»

Van der Dungen levis la ŝultrojn.

«Mi ne scias,» li ekkriis incitite. «Kaj mi ankaŭ ne volas scii. Mi nur scias, ke ĉiujn teruris tiu malsano.»

De Cock fiksrigardis lin.

«Ĉu vi tial diris al la anglo, ke vi havas aidoson kaj minacis piki lin per tiu nadlo?»

Laurens van der Dungen iomete moviĝis sur sia seĝo.

«Mi bezonis monon,» li indiferente respondis. Subite li perforte gestis kaj ŝanĝis sian tonon.

«Kion faras ĉiuj tiuj aĉaj eksterlandanoj ĉi tie en la centro de Amsterdam?», li forte kriis. «Ili venas ĉi tien nur por aĉeti aĵojn por sia propra dependeco. Ili havas sufiĉe da mono kaj altigas la prezon. Nuntempe preskaŭ ne eblas pagi injekton.»

De Cock ignoris la komenton.

«Krom tiun horloĝon… kiom da mono vi priplukis de tiu anglo?»

Laurens kapneis.

«Mi ne scias. Mi ankoraŭ ne havis la okazon ĝin kalkuli. Demandu tiun policiston, li prenis ĉion de mi.»

De Cock palpis sin ĉe la nazopinto.

«Kiom da fojoj vi prirabis homojn sub la minaco de tiu malpura injektilo?» Laurens malrapide mallevis la kapon

kaj ne respondis.

De Cock rigardis lian ĥaosan verton dum kelkaj sekundoj kaj demandis sin kiom da tempo pasis de kiam la junulo lavis sian kapon.

«Kiom ofte,» li ripetis pli severe, «vi prirabis homojn sur la strato de iliaj havaĵoj, minacante per tiu injektilo?»

Laurens van der Dungen levis la kapon kaj rigardis lin. Estis pardonpeta sinteno en liaj okuloj.

«Mi kaj Willemijn bezonis multon.»

«Kiu estas Willemijn?»

«Mia koramikino.»

«Ĉu ankaŭ drogulo?» De Cock superflue demandis. Laurens kapjesis.

«Ne per mi. Ŝi jam estis drogulino antaŭ ol mi renkontis ŝin.»

«Willemijn, kiel ŝi plu nomiĝas?»

«Handgraaf. Willemijn Handgraaf. Ŝia patro estas riĉa, ege riĉa. Li loĝas bele, en multekosta vilao en *Heemstede*[10], sed li ne havas koron en sia korpo. Kiam li rimarkis, ke Willemijn estas drogulino, li malpermesis al ŝi plu eniri la domon.»

De Cock grimacis.

«Simple tiel, senplie?»

Laurens suspiris.

«Okazis ja kelkaj aferoj, vi sciu: studo ĉesigita, etaj ŝteloj, hejmaĵoj kunprenitaj kaj forvenditaj. Kiam ŝia patro eksciis pri tio ke Willemijn elprenis monon de la banko en lia nomo, tio estis la fino… definitive.»

De Cock frotis sian mentonon.

[10] Heemstede estas urbeto sude de Haarlem (Harlemo)

«Ĉu ŝi prostituas sin surstrate?»

«Tion ŝi ne volas,» diris Laurens. «Mi jam plurfoje diris al ŝi: iru surstraten. Ŝi estas belega knabino, ĉio korpe en ordo, ŝi povus gajni oron per sia korpo. Sed ŝi rifuzas. Ŝi diras, ke ŝi ne volas seksumaĉi kun viraĉoj en aŭto. Sed tio ja signifas, ke mi sola devas aranĝi la aferojn.»

De Cock malaprobe skuis la kapon.

«Oni ja ne povas devigi virinon al prostituado, ĉu?»

Laurens indigne reagis.

«Ŝi ja devigas min prirabi virojn proprariske. Se ŝi ekprostituus ŝin, mi ne bezonus tiom ofte iri surstraten.»

La junulo petege rigardis De Cock per siaj verdaj okuloj.

«Lasu min iri, sinjoro detektivo. Lasu min certigi, ke Willemijn havu plian injekton ĉi-vespere, alie... alie ŝi murdos.»

De Cock kuntiris la brovojn.

«Ĉu murdos?»

Laurens kapjesis.

«Sian patron. Willemijn ankoraŭ havas ŝlosilon de la ekstera pordo de lia vilao en *Heemstede*. Tion li ne scias. Ni ofte parolis kune pri la posedo de tiu ŝlosilo. Jen la problemo. Ŝi insistas, ke mi ŝteleniru lian domon. Ŝi scias kie ŝia patro kaŝas sian monon. Sed mi ne volas ŝteleniri, ne ĉe ŝia patro. Li estas potenca viro.»

«Kion vi celas?»

Laurens van der Dungen snufis.

«Se iu havas multan monon, li havas potencon, kaj li povas lui homojn, doni komisiojn.» Li levis la ŝultrojn. «Kiu funebras pri mortinta drogulo?»

De Cock oblikve rigardis lin.

«Ĉu vi timas tiun potencon?»

La knabo vigle kapjesis.

«Mi ne volas, ke Willemijn ataku sian riĉan patron aŭ vundu lin. Tiam mi ankaŭ ne certas pri mia vivo. Ŝia patro scias ke Willemijn kaj mi loĝas kune. Sed ŝi daŭre minacas: mi petos tiun maljunulaĉon ankoraŭ unu fojon fari ion pri mia drogdependo... se li rifuzas doni monon tiucele... se li diras ne... tiam mi mortigos lin.»

«Kaj ŝi estas serioza pri tio, ĉu?»

Laurens kapjesis vigle.

«Absolute. Se mi ne tenas ŝin trankvila per injekto, tiam ŝi eksplodas. Ŝi jam dum kelka tempo nenion havis. Tiu mono de tiu anglo estis mia lasta ŝanco.»

Li profunde suspiris.

«Se mi ne venos ĝustatempe,» li daŭrigis, «mi timas, ke Willemijn hodiaŭ faros ion.»

«Ĉu ŝi havas rimedojn por tio?»

«Kion vi celas?»

«Ĉu pafilon, tranĉilon?»

Subite, la pordo de la granda detektiva ĉambro malfermiĝis kaj ensturmis Vledder. Lia vizaĝo aspektis ruĝa. Ĉe la skribotablo de De Cock li anhele ekstaris kaj fingromontris al Laurens van der Dungen.

«Lin enkarcerigu ja dum iom tempo. Ni devas tuj ekiri.»

La maljuna detektivo ĝenite rigardis lin.

«Kio okazis?» li ekkriis incitite. «Kie vi tiel longe restis?» Vledder apoge metis la manojn sur la skribotablon de De Cock.

«En *Keizersgracht*[11] flosas akva kadavro.»

[11] Keizersgracht (Kanalo de la imperiestro)

De Cock grumble skuis la kapon.

«Tio ja maloportunas.»

Li ree direktis sin al Laurens van Dungen.

«Kie Willemijn estas nun?» li demandis afable.

«Hejme,» diris Laurens kun supren tiritaj ŝultroj.

«Ni havas apartamenton, subtegmentan etaĝon en De Pijp[12] kaj…»

«Ĉu multekostan?»

La juna Vledder ŝajnis eksplodi pro la trankvila kaj rutina konduto de De Cock. Li furioze pugnobatis sur la skribotablon de De Cock.

«Nome de Dio, kio estas malbona al vi?»

De Cock skuis sian kapon trankvile.

«Nome de Dio neniel mi malbonfartas.»

Vledder suprenlevis siajn brakojn.

«Kial vi ĉiam dediĉas tiom da tempo al tiuj droguloj?», li demandis kun apenaŭ retenita kolero. «Kiom da ili vi ja ne esplordemandis en la daŭro de la jaroj? Centojn. Estas ja ĉiam la sama afero! Zorgoj kaj mizero. Neniam pro propra kulpo. Kaj por kio vi faras ĉiun tiun laboron? Por nenio.»

Per bruska gesto li fingromontris al Laurens.

«Tio estas multkrimulo, malbenita, fripona multkrimulo. Min naŭzas via speco.» Li denove rigardis al De Cock.

«Kiu ja scias kiom da raboj li jam havas sur sia konto dum sia mallonga vivo. Kaj vi ja ĉion ĝisdetale notas en senfina protokolo. Kaj tion mi ja devas poste ellabori sur

---

en.wikipedia.org/wiki/Keizersgracht

[12] De Pijp estas konata amsterdama kvartalo en.wikipedia.org/wiki/De_Pijp

mia komputilo. Kaj kion faras justico poste pri tiu viro kaj tiu protokolo? Nenion! Nulon, komo nulon. Ĉio tio nome de la sankta politiko de nepersekutado[13]. Nelegita en la paperkorbon, ĉiu via zorge farita laboro. Post kelkaj horoj tiu viro denove libera iras surstrate kaj prirabas sekvan viktimon. Kaj kion vi faras? Vi denove trankvile ekparolas kun tia viraĉo kaj skribas la tioman protokolon.»

De Cock profunde suspiris kaj rigardis al la figuro de la kolerega Vledder.

Kun incitita rigardo kaj per kapmovoj al la drogulo li provis haltigi lin.

Li venigis iun por preni Laurens, ĉar ne havis sencon en ĉi tiu momento esplordemandi la drogulon plu.

Vledder senespere levis la brakojn kaj pumfale eksidis sur sian kontorseĝon.

Kiam ili estis solaj, De Cock trankvile respondis la kolerrozarion de Vledder. «Mi ne estas respondeca,» li diris kapskue, «pri la malsukcesa politiko de justico. Mi estas respondeca pri mia propra laboro, kio signifas ke mi en humana maniero traktas miajn arestitojn kaj aŭskultas kiuj estas iliaj malfacilaĵoj.» Vledder snufis.

«Tiujn malfacilaĵojn,» li grumblis, «vi ne solvos.»

De Cock kapjese konsentis.

«Mi konscias pri tio, kaj tamen…»

La telefono sur lia skribotablo tintis. Vledder streĉis la brakon kaj krude prenis la aŭdilon. De Cock rigardis la vizaĝon de sia juna kolego kaj vidis kiel lia ruĝa vizaĝo

[13] nepersekutado: flankenmeto de la akuzo kaj krimprotokolo

paliĝis. Post kelkaj sekundoj Vledder kun duonmalfermita buŝo remetis la aŭdilon sur la aparaton. El lia brusto eskapis profunda suspiro.

«Tio estis la gardokomandanto,» li klarigis.

«Kaj?»

«La Medicina Servo eligis la kadavron el la akvo de *Keizersgracht* kaj metis ĝin sur la kajon. Temas pri viro kaj policano de la kontrolaŭto surloka diras ke la ŝulaĉoj de la akvokadavro estas forte per nodo kunligitaj.»

«Mia Dio…»

Vledder kunpremis siajn lipojn. «La viro do ne simple dronis.» De Cock skuis la kapon.

«Tio odoras murdon!»

2

LA DU DETEKTIVOJ veturis en sia malnova Golfo de la glitiga ligna varfo malantaŭ la policejo al *Oudebrugsteeg*[1] kaj de tie turnis ĝin dekstren sur *Damrak*[2]. Velurmola pluveto malsupreniris. Multkoloraj prilumitaj reklamoj lude reflektis sin en la malseka asfalto. Gluecaj pluvgutoj sur la antaŭa glaco de la Golfo plimalbonigis la vidon. Vledder ŝaltis la vitroviŝilon kaj De Cock tiris sian ĉapelon sur siajn okulojn.

La maljuna detektivo malŝatis la daŭran tien kaj reen svingiĝadon de la glacoviŝiloj. Li havis la nerezisteblan emon sekvi la movojn de la viŝiloj per la kapo. Ĝi estis preskaŭ deviga, hipnota sperto por li, tial li evitis rigardi la glacoviŝilojn kaj fore subdeglitigis sin en la seĝo. Vledder maltrankvile rigardis flanken; lia humoro estis ŝanĝita.

«Ĉu problemoj pri la viŝiloj?»

De Cock kapjesis.

«Kiel kutime. Mi malamas tion.»

Vledder ridetis.

«Kion vi farus, se vi estus malantaŭ la stirilo kaj ekpluvus?»

«Tiam mi atentus la trafikon kaj tiuj viŝiloj ne ĝenus min.»

Vledder ridetis.

«Mi opinias, ke ĝi estas stranga devio.»

De Cock kapjesis obeeme.

«De tio mi havas pliajn.»

Vledder ridis gaje.

«Certe. Mi konas vin pli longe ol hodiaŭ. Kion vi faris

---

[1]Oudebrugsteeg: Malnova ponto-strateto

[2]Damrak estas la ĉefstrato kie homoj alvenantaj al la stacidomo eniras la centron de Amsterdamo. en.wikipedia.org/wiki/Damrak

pri via arestito?»

«Ĉu tiu drogulo?»

«Jes.»

De Cock larĝe grimacis.

«Kion povas fari prokuroro en sia ĉiopova saĝo... ankaŭ mi povas.»

«Vi volas diri?»

«Sendi for.»

«Ĉu vere?»

De Cock kapjesis.

«Mi diris al nia deĵoranta oficiro, ke li povas redoni liajn aĵojn al la arestito kaj poste lasi lin foriri.»

«Ĉu vi ne havos problemojn pro tio?»

De Cock kapneis.

«Mi tre klare deklaros en la polica raporto, ke mia arestito estas forsendita... raporton, kiun la prokuroro flankenmetos... tion li ĵetos en ian administran rubujon kaj ja ne legos.»

La ironio kaj ripeto de liaj propraj asertoj ne eskapis al Vledder, sed li ne volis plu paroli pri tio.

«Kaj nia estro?» li demandis.

De Cock subridis.

«Buitendam[3] atentas nenion. Li agas por riproĉi min nur, post kiam iu prokuroro iomete skuis lin.»

«Ĉu vi ankoraŭ atentigis kuraciston pri tiu knabo?»

De Cock denove skuis la kapon.

«Kiam mi diris al li, ke mi tuj liberigos lin, Laurens van der Dungen subite ne plu bezonis kuraciston.»

Vledder spirblovis.

[3] Buitendam: Nomo de la estro de De Cock

«Verŝajne ne. Krom sia drogmanio, li ne havas sanproblemojn.»

Ili silente veturis dum kelka tempo, kaj estis Vledder kiu rompis la silenton. Li sulkis sian frunton.

«Ĉu vi iam ajn,» li demandis penseme, «retrorigardante al la fora pasinteco, havis kazon de akvomortintaĵo al kiu la ŝulaĉoj estis forte kunligitaj?»

De Cock rikanis seke. «Ne. La vivo de detektivo en *Warmoesstraat* estas ja plena de surprizoj, sed tiun de tiuj ŝulaĉoj mi ne renkontis antaŭe.»

Li subridante momenteton palpis al sia nazo. «Sed ofte mi aŭdis de malnovaj detektivoj la ridindan historion, ke en la pasinteco, kiam ili trovis viran akvan korpon, ili ofte malfermis la zipon de lia pantalono.»

Vledder surprizite rigardis flanken.

«Ĉu lian zipon?» li demandis. «Kial?»

De Cock etendis siajn manojn.

«Tio devis servi kiel pruvo, ke la viktimo duone ebria pisis en la akvon, starante sur la rando de la kanalo.»

«Ĉu starante pisis?»

De Cock kapjesis.

«Dum tiu urinado, li supoze falis en fosaĵon kaj dronis pro sia ebria stato. Tiel la detektivoj ekskludis la eblon, ke la viro estis mortigita per krimo. Kaj per tio, ili ŝparis al si multe da laboro.»

«Nekredeble», diris Vledder subridante.

De Cock streĉis siajn lipojn.

«Tiuj malnovaj detektivoj,» li subridis, «de kiuj mi en miaj junaj jaroj ankoraŭ havis ampleksajn lecionojn, ofte rakontis la plej mirindajn aferojn. Ekzemple, kiam kadavro ekaperis en fosaĵo, kiu apartigis du distriktojn, ili pu-

ŝis ĝin al la alia flanko de la fosaĵo.»

Vledder ridis.

«Tiam tio ne plu estis ilia afero.»

«Ĝuste.»

«Nekredeble.»

De Cock palpis sian nazno.

«Almenaŭ tiuj maljunuloj havis ampleksan skatolon da trukoj.»

«Do almenaŭ vi transprenis tion de ili, De Cock.»

La maljuna detektivo ne respondis.

Post mallonga silento, Vledder demandis:

«Kiel pri tiuj kunligitaj ŝulaĉoj?»

De Cock levis la ŝultrojn.

«Ne devas esti murdo.»

«Kio do?»

«Memmortigo.»

Vledder denove momenton ekrigardis flanken.

«Ĉu vi do supozas, ke la viktimo mem kunligis siajn laĉojn antaŭ ol salti en la akvon?»

De Cock ridetis.

«Mi konfesas, ke ĉi tio ne sonas tre probable, sed tamen eblas. Ankaŭ memmortigantoj foje montras strangan konduton. Nekredeblajn kapricojn. Pri tio mi povus rakonti al vi multajn specimenojn.»

De *Brouwersgracht*[4] ili veturis sur *Keizersgracht*. Tamen an-

---

[4] Brouwersgracht: La kanalo prenis sian nomon en 1594 de la multaj bierfarejoj kiuj estis troveblaj en tiu kvartalo en la deksesa kaj deksepa jarcentoj

taŭ *Leliegracht*[5] staris aŭtomobilo de la Kuracista Servo kun malfermitaj pordoj ĉe la bordo de la kanalo. Malantaŭ ĝi staris policaŭto kun blua turno-lumo. Vledder parkis sian Golfon preskaŭ kontraŭ la bufro de la polica aŭto.

La detektivoj eliris. Juna policano piediris al De Cock kaj montris al la ankoraŭ elgutanta korpo de viro kuŝanta sur la akvorando.

«Mi petis la ĉefgardiston, ke li avertu la ĝendarmaron.»

«Ĉu vi pensis pri krimo?»

«Jes. Tiuj ŝulaĉoj. Mi ne ŝatis tion.»

«Kaj?»

La policano kapneis.

«Nur atendu De Cock,» li diris.

La maljuna detektivo esploris la korpon per la lumo de sia poŝlampo. Li haltigis la ovalon sur la kunmetitajn manojn. Vledder rigardis super lian ŝultron.

«Li kuŝas pace. Falditaj manoj sur lia brusto. Ŝajnas ke li kuŝas tie, devote preĝanta ĉe la rando de la kanalo.»

De Cock grumblis.

«Li malbenite malfruas pri tio.»

«Kion vi celas?»

De Cock mansignis al la ĉielo.

«Nia Sinjoro delonge juĝis lin: al la ĉielo, infero aŭ purgatorio. Li certe klasifikis ĝin ien.»

«Ĉu tiel rapide?»

«Nia Sinjoro havas kompletan scion pri faktoj, sen breĉoj. Misuzoj de justeco estas ekskluditaj ĉe Li. Cetere Li havis la tempon. Mi taksas, ke ĉi tiu sinjoro mortis jam antaŭ kelkaj tagoj. Akvaj kadavroj bezonas kelkajn tagojn

[5] Leliegracht: Liliokanalo
en.wikipedia.org/wiki/Leliegracht

por aperi.»

Vledder snufis. «Se ĉi tiu viro decidus sinmortigi, li povus kunmeti la manojn en la momento, kiam li saltis en la malpuran kanalan akvon... kaj tuj murmuri fervoran preĝon por sekura surfundiĝo?»

De Cock kapjesis. «Tio eblas, sed en la momento de ŝoko, kiam persono atingas la malvarmetan akvon de la kanalo, liaj manoj ne restas kunmetitaj. Tio ne eblas, tio ne estas natura. Normala homo ne plu havas tiom da volforto en siaj lastaj momentoj.»

Li paŭzis kaj montris liajn ŝuojn.

«Nur por malligi siajn ŝulaĉojn antaŭ ol li mortos,» li diris preskaŭ moke, «li ŝajne malhavis tempon.»

Vledder rigardis flanken. «Kiel cinika vi estas ĉi-vespere. Tiel malproksima kaj malvarma. Mi ne konas vin tia.»

«Ekde la komenco de mia kariero en la krimenketado, mi malamas akvokadavrojn», De Cock grumblis.

«Kial?»

«Estas ĉiam kelkaj tagoj inter la tempo de morto kaj la tempo, kiam detektivo alfrontas la kadavron. La vero estas plej ofte malfacile eltrovebla.»

La juna detektivo aŭskultis la klarigon; nun li montris al la kunmetitaj manoj de la viro.

«Do tio estas suspektinda?», li demandis necerte.

De Cock profunde suspiris.

«Por mi, jes. Mi ne kredas je la memmortigo de preĝanta homo. Mi same ne kredas pri akcidento. Ĉi tiu viro estis murdita.»

Vledder ridetis. «La demando restas: kiel?»

«Tio provizore estas ankoraŭ mistero por mi. Kaj tiu ĉi enigmo fariĝos eĉ pli granda, se montriĝos, ke li havas

akvon en la pulmoj.»

«Tiam li mortis pro dronigado,» konkludis Vledder.

«Ĝuste.»

Vledder rigardis De Cock de la flanko kun rideto.

«Ĉu kun ŝulaĉoj strikte ligitaj kaj devote falditaj manoj?»

La maljuna detektivo frotetis sian kolon per la mano.

«Ŝajnas neeble.»

«Kaj ĉu tio estas, hm… malebla?»

De Cock iomete levis sian mentonon, sed ne reagis. Li trenpaŝis de la viktimo al la flegistoj ĉe la aŭto de la Medicina Servo.

«Ĉu vi povas kaj volas porti tiun mortinton al la nekropsiejo *Westgaarde*[6]?» li afable demandis.

La plej aĝa flegisto surprizite rigardis De Cock.

«Ĉi tiu aŭto de la Medicina Servo havas materialon por kaptado de akvokorpoj el fosaĵoj kaj kanaloj. Ĝi ne estas ekipita por transporto.»

Li silentis kaj ridetis mallonge. «Sed se vi prenas la respondecon…» Li ne finis sian frazon.

De Cock kapjesis trankvile.

«Mi prenas tiun respondecon. Ni sekvos vin en nia Golfo,» li diris, kaj paŝis al la juna policano.

«La gardokomandanto bonvolu averti la ĝendarmaron, ne por ĉi tiu loko sur *Keizersgracht*, sed por la nekropsiejo ĉe *Westgaarde*. Tie ni havas sufiĉe da lumo por bone rigardi la viktimon.»

---

[6]Westgaarde: Nomo de parko en okcidenta parto de Amsterdam, tombejo kaj kremaciejo

Bram van Wielingen, la polica fotisto, eniris la nekropsian ĉambron per grandaj paŝoj. Li metis sian aluminian kofreton sur la ŝtonan plankon kaj paŝis al De Cock.

«De kiam vi kondukas viajn viktimojn rekte al *Westgaarde*?» li demandis ekscitite. «Ĉu la KL[7] ne plu estas sankta por vi?» De Cock ridetis. «La krimloko neniam estis sankta por mi. Mi sentis, ke mi havas tro malmulte da lumo sur *Keizersgracht* ĉe la rando de la akvo kaj la stato de la akva korpo elvokis al mi tiom da demandoj, ke ŝajnis pli bone konduki ĝin rekte al *Westgaarde*. Li kiel ajn devos esti ĉi tie morgaŭ sub la tranĉilo ĉiuokaze.»

Bram van Wielingen ĉirkaŭrigardis. «Ĉu Vledder ne estas ĉi tie?»

«Ĉu vi pensas, ke mi ne povas fari ĉi tion sola?»

Van Wielingen ignoris la komenton. «Kie vi lasis la korpon?»

De Cock montris. «Tie, sur tiu granita dissekca tablo.»

Van Wielingen prenis sian aluminian kofreton kaj iris kun li. La fotisto glitigis sian rigardon sur la kadavron.

«Ĉu ili en tiu stato kaptis lin el la kanalo?», li demandis surprizite.

De Cock kapjesis.

«Ĉu kun kunmetitaj manoj?»

De Cock denove kapjesis. «Kaj la pintoj de liaj ŝuoj estas firme kunligitaj.»

Bram van Wielingen grumblis. «Diable. Mi neniam

[7] KL: Krimloko

antaŭe renkontis tion.»

«Ankaŭ mi ne.»

La fotisto montris al la kadavro. «Li estas en bona kostumo. Vi devas rigardi la fasonon… tiel decan. Tio certe ne estas konfekcia. Malgraŭ pluraj tagoj en la malpura akvo de la kanalo, ĝi ankoraŭ aspektas bonege.»

De Cock ridetis. «Ĉu viro kun mono?»

Van Wielingen levis ŝultron. «Multekosta kostumo,» li respondis eviteme.

«Kiomjara vi supozas?»

«Ĉu tiu kostumo?»

La fotisto faris arogantan geston. «Ho, ne klaĉu. Tiu ulo, kompreneble.»

De Cock puŝis sian malsupran lipon antaŭen. «Ĉu en la fino de siaj kvardekaj jaroj?»

Van Wielingen kapjesis konsente. «Ĉu vi jam scias, kiu li estas?»

De Cock kapneis. «Vledder estis rigardonta, ĉu la viktimo havas dokumentojn, monujon aŭ ion similan. Mi ne scias ĉu li jam faris tion.»

Bram van Wielingen prenis sian kofreton, prenis sian belan Hasselblad[8] kaj muntis stroboskopan lumilon.

«Mi intertempe fotos.»

«Atentu la detalojn,» De Cock petis. «La noditajn ŝulaĉojn kaj la kunmetitajn manojn. Tiuj du aferoj obsedas min. Pligrandigu tion.»

La maljuna detektivo turniĝis. Li ekvidis doktoron Den Koninghe en la pordejo de la nekropsia ĉambro. Malantaŭ tiu staris du flegistoj de la Medicina Servo kun sia ne-

[8] Hasselblad: Marko de fotilo. Tre bona kaj multekosta

mankpova brankardo, pretaj preni la kadavron post la nekropsio.

La griza detektivo ĝoje aliris la maljunan krimpatologon kaj varme salutis lin. De Cock havis varman lokon enkore por la ekscentra kuracisto en lia malmoderna griza gamaŝo sub sia eleganta striopantalono, lia trista nigra frako kaj lia ĉifona verda garibaldi-ĉapelo[9].

«Kiel vi fartas?» li demandis vigle. Doktoro Den Koninghe mansvingis. «Teneble... sufiĉe teneble,» li gaje kriis. «Mia kruro fine trankviliĝis. La podagro ne plu turmentas min. Mi povas pluiri dum jaroj denove.»

«Ne estos tiom multaj por ni,» respondis De Cock. Li montris al la flegistoj de la Medicina Servo.

«Mi ne bezonas tiujn sinjorojn ĉi-foje. Vi povas forsendi ilin. Tiu viktimo ne plu bezonas esti transportita. Ĝi restas ĉi tie.»

La maljuna krimpatologo kapneis. «Mi ne forsendas ilin. Mi bezonas ilin. Dum la vespero aperos kelkaj pliaj kadavroj. Kun tiu mizera pluvo, homoj ŝajne ŝatas morti. Kaj tiam mi ŝatas disponigi transporton por ili.»

De Cock puŝis Bram van Wielingen, kiu ĵus fulmfotis la mortintan vizaĝon de la viktimo, iomete flanken kaj gestis al la ŝika akvokorpo sur la granita tranĉo tablo.

«Ĉu vi antaŭe vidis ion tian?»

Doktoro Den Koninghe rigardis. «Ĉu akvokorpo?»

La maljuna detektivo montris la kunligitajn ŝulaĉojn kaj la kunmetitajn manojn de la viktimo. «Mi celas ĉi tion.»

Doktoro Den Koninghe skuis la kapon surprizite. «Ne... tio ne estas normala. Ĉu tiu viro estas kaptita el la kanalo

[9] garibaldi-ĉapelo: Ĉapelo nomata laŭ Giuseppe Garibaldi, itala liberecbatalanto eo.wikipedia.org/wiki/Giuseppe_Garibaldi

en tia stato?»

«Jes.»

La nekropsiisto per sia mano premetis la bruston de la viktimo. «Strange... laŭ mi li havas ankaŭ akvon en siaj pulmoj.» «Droninta.»

Doktoro Den Koninghe supren rigardis al De Cock.

«Tio ja supozeble estas la mortokaŭzo,» li diris enigmoplene. Li momente silentis. «Petu morgaŭ,» li daŭrigis, «al la patologanatomo ke li prenu specimenon de tiu akvo.»

De Cock grandokule rigardis lin. «Kial?»

«Tiam vi povas ordoni analizon al la Justica Laboratorio ĉu tiu akvo el la pulmoj laŭ konsisto similas al la akvo de la kanalo.»

De Cock duonfermis siajn okulojn.

«Tio estas lerta,» li admire diris. «Se la akvo el la pulmoj havas alian konsiston ol la akvo de *Keizersgracht,* li ie aliloke povas esti droninta kaj poste esti ĵetita en la kanalon, kun la ŝulaĉoj noditaj kaj la manoj interplektitaj.» La griza detektivo malrapide kapjesis. «Lerte... tio estas io pripensinda.»

Doktoro Den Koninghe ridetis.«Mi kiel nekropsiisto vidis jam tiom da kadavroj en mia vivo, ke mi en la daŭro de la tempo fariĝis preskaŭ pli lerta ol la plej bona detektivo.»

De Cock ne reagis.

Per precizaj movoj la doktoro deprenis siajn okulvitrojn, prenis sian silkan poŝtuketon el la brustsaketo de sia ĵaketo kaj poluris la vitrojn. De Cock kutimis tiujn movojn kaj pacience atendis, ĝis la maljuna nekropsiisto finis la serion de siaj ceremoniaj agoj. Post kiam Den Koninghe

ree surmetis siajn rondajn okulvitrojn kaj ree aranĝis sian poŝtuketon en la brustsaketon de sia ĵaketo, li per indiferenta gesto fingromontris al la viktimo sur la granita sekcotablo. «Li estas morta.»

De Cock kaŝridetis. «Vi ja pravas,» li dolĉe rikanis. «Tion mi ja ankoraŭ ne rimarkis.»

3

KIAM LA DETEKTIVO De Cock en la sekva mateno kun vigla humoro eniris la grandan detektivan ĉambron, li per gracia ĵeto lanĉis sian malnovan feltĉapelon al la vesthokaro. Kiam lia fidela kapvesto tremante ekpendis sur unu el la hokoj, li triumfe levis la brakojn kaj rikanis pro plezuro. La maljuna detektivo poste demetis sian eluzitan surtuton, malzorge pendigis ĝin kaj treniris al sia skribotablo.

Lia asistanto Vledder sidis streĉita kaj koncentrita malantaŭ la ekrano de sia komputilo. La lertaj fingroj de la juna detektivo dancis petole sur la klavaro. Post granda minuto li levis la kapon. Lia juna vizaĝo mienis grave.

«Vi malfruas.»

Tio sonis pune.

De Cock ĵetis rigardon al sia horloĝo.

«Pli ol duonhoron,» li malkaŝe koncedis.

Vledder skuis la kapon.

«Vi devas esti ĉi tie je la naŭa.»

De Cock ridetis.

«En tiu tempo kiam vi estos tiel maljuna kiel mi,» li reagis gaje ridetante, «ankaŭ vi povos al vi mem permesi la liberecon veni de temp' al temp' malfrue. Tia duonhoro estas la privilegio de la maljunaĝo.»

Vledder grumblis.

«Estas simple manko de disciplino.»

De Cock laŭte ridis.

«Disciplino... tiun vorton la nuna generacio jam antaŭ jaroj forstrekis el nia nacia vortaro kiel superfluan.» Vledder incitita frapetis kelkfoje per siaj fingroj sur la skribotablo.

«Mi estas ĉi tie ĉiam ĝustatempe. Tiel devas esti. Tiucele la instancoj dungis min.»

La juna detektivo momenton silentis.

«Ankaŭ vin mi ne trovis en tre bona kondiĉo sur la krimloko ĉe *Keizersgracht* hieraŭ vespere,» li diris grumble. «Mokajn komentojn pri mortinto mi ne kutimas aŭdi de vi kaj kiam mi de *Westgaarde* survoje al 'Kit'[1] volis rakonti, kion mi trovis en la vestaĵoj de la viktimo, vi svingis miajn vortojn for. Vi ne volis aŭdi pri tio.»

De Cock kapjesis.

«Mi volis iri hejmen. Mi tediĝis de ĝi.»

Vledder ridetis.

«Vi pli interesiĝis pri via glaso da ĉokolada lakto hejme en la mikroondilo.»

De Cock etendis siajn brakojn.

«Vi pravas,» li ridis bonhumore. «La varma ĉokolada lakto estis pli alloga por mi ol la problemoj ĉirkaŭ la akvokadavro.»

Vledder puŝspiris.

«Oni povis rimarki tion.»

De Cock klinis la kapon.

«Ne plendu. Mi kapitulacas.»

La maljuna detektivo serioze faltis sian vizaĝon.

«Diru al mi nun,» li malfermis milde. «Kion la viktimo havis ĉe si?»

Vledder konsultis siajn notojn kaj kapneis.

«Certe ne estis rabomurdo,» li diris konvinkite. «Certe ne. En lia delikata leda monujo estis pli ol mil eŭroj kontante. Krome, kreditkarto, ora karto de la Poŝta Banko,

[1] 'Kit': platnederlanda vorto por domo, trinkejo aŭ – ĉi-kaze – la policejo

lia pagokarto, lia konduklicenco kaj lia nederlanda pasporto.»

«Sub la nomo de kiu?»

«Victor Handgraaf.»

La buŝo de De Cock malfermiĝis.

«Kiel?»

Vledder rigardis lin surprizite.

«Victor Handgraaf.»

De Cock levis la montrofingron.

«De *Heemstede?*»

Vledder levis la ŝultrojn.

«Mi ne scias. Mi ankoraŭ ne povis trovi lian adreson. Mi pensis, ke estas rimarkinde, ke ankoraŭ neniu raportis lian malaperon al la polico. Li ne estas signalita.»

«Ĉu li havas punliston?»

«Ankaŭ ne.»

De Cock pripensis momenton.

«Mi pensas, ke estas kvar ciferoj sur tia kreditkarto. Transdonu ĝin al la Poŝtbanko. Krom la nomo ankaŭ apartenas al tiu ciferoj sendube adreso. Kaj la pagokarto havas kontnumeron kiu certe povas helpi nin plu.»

La maljuna detektivo subite kun granda rideto etendis siajn brakojn antaŭen.

«Krom tio liaj plenaj nomo kaj adreso devas esti sur lia konduklicenco.»

Vledder frapis sian frunton per sia plata mano.

«Stulte, mi ankoraŭ ne rigardis tiun konduklicencon.» Per kolera tiro li malfermis tirkeston de sia skribotablo kaj elprenis la ankoraŭ trempitan konduklicencon. Surprizite, li levis la okulojn al De Cock.

«Tiu... hm, tiu Handgraaf,» li balbutis, «ja loĝas en

*Heemstede*. Ĉu vi konas lin?»

De Cock kapneis.

«Ne. Kompreneble ne. Tiuokaze mi hieraŭ tuj dirus ĉe la konfrontado kun la mortinto, kiu estas la viro.»

Vledder rigardis lin konfuzita.

«Kial vi menciis *Heemstede?*»

De Cock suspiris.

«Tiu drogulo, tiu altkutima leĝrompanto, kiun viaopinie mi tro longe pridemandis, diris ke li loĝas kun iu juna drogulino nomata Willemijn Handgraaf; laŭ li, ŝia patro estas tre riĉa viro kaj loĝas en belega vilao en *Heemstede.*»

Vledder duone kuntiris la okulojn kaj faris draman vizaĝon.

«Do la akvokadavro vere devas esti ŝia patro,» li ĝemis.

De Cock puŝis sian malsupran lipon antaŭen.

«Demandu, ĉu estas pli da viroj nomataj Handgraaf loĝantaj en *Heemstede*.»

«Tion mi faros, sed ni povas esti preskaŭ certaj ke temas pri ŝia patro.»

De Cock ridetis.

«Tiuokaze ni havos problemon.»

«Kial?»

«Willemijn Handgraaf intencis murdi ŝian patron, se li ne faros ion kontraŭ ŝia drogdependo.»

«Kion? Ĉu murdi?»

De Cock ridetis.

«Victor Handgraaf forpelis sian filinon el la domo pro ŝia drogdependo. Post serio da ŝteloj de hejmaĵoj kaj provo enkasigi monon de lia bankokonto per falsa subskribo, li ne plu toleris ŝin.»

Vledder iom klinis sin antaŭen.

«Ĉu ni povas konsideri tiun Willemijn suspektato, laŭ vi?»

De Cock antaŭenigis siajn lipojn.

«Estas tro draste jam nun atribui al ŝi sufiĉan konjekton de kulpo[2]. Ŝi devos klarigi al ni siajn eldirojn al sia amiko. Ŝi diru kion ekzakte ŝi celis per tio.»

«Ĉu vi havas ŝian adreson?»

«Mi havas la adreson de ŝia amiko kaj ili loĝas kune.»

Vledder ekleviĝis el sia seĝo.

«Ĉu ni iru?»

«Kien?»

«Al tiu adreso.»

De Cock gestis haltige per sia mano.

«Atendu momenton. Ne tiel rapide. Ĉu vi jam kontaktis doktoron Rusteloos?»

«Jes. Mi eklaboris pri tio ĉi-matene.»

«Je kioma horo okazos la nekropsio?»

«Ĉi-posttagmeze je la dua.»

«Tiuokaze mi havas ankoraŭ mision por vi antaŭe,» diris De Cock.

«Antaŭ ol vi iros al *Westgaarde*, vi unue prenu specimenon de la akvo de *Keizersgracht.*»

«Kion mi faru per tio?»

De Cock senatente forŝovis la demandon.

«Donu al doktoro Rusteloos la taskon, aŭ se diri pli bone, petu lin afable, preni specimenon de la akvo en la pulmoj de Victor Handgraaf. Vi poste zorgu pri tio ke ambaŭ specimenoj kun klara priskribo atingu la Justican La-

[2] Konjekto de kulpo: Kriterio, kiun suspektato devas plenumi laŭ la Kodo de Krima Proceduro

boratorion en *Rijswijk*[3]. Ŝajnas al mi plej bone ke vi utiligu la motorciklan servon por tiu celo.»

Vledder reagis mirigite.

«Kial tiom da peno?»

«De Cock grimacis.»

«Doktoro Den Koninghe, nia maljuna nekropsiisto, hieraŭvespere donis al mi sugeston: tiuj du specimenoj ja povus esti ne identaj.»

Vledder rigardis sian estron surprizita.

«Handgraaf ja dronis en la akvo de *Keizersgracht*, ĉu ne?»

De Cock ne respondis.

Oni frapis sur la pordon de la granda detektiva ĉambro. Vledder vokis: «Eniru!»

Tio ne sonis invite.

La pordo lante malfermiĝis kaj en la pordaperturo aperis la figuro de larĝa, fortika viro. Trankvile, per decidaj paŝoj, li alproksimiĝis.

Per sia akra rigardo De Cock okulmezuris la viron. Li taksis lin kvardekkvin-plusulo. La viro portis brunan pluvrezistan mantelon kun klapoj sur la ŝultroj.

Irante al la skribotablo de De Cock li, kun eleganta gesto, deprenis sian pluvoĉapon. Pluvaj gutoj klakfalis sur la balatplankon. La viro havis, tion konstatis De Cock, bonproporcie formitan ovalan vizaĝon; iom koloran. Sufiĉe longajn, grizajn, ondantajn harojn, larĝan mentonon, akran, pintan nazon kun okulfrapaj, verdaj okuloj.

Ĉe la tablo de la griza detektivo li haltis kaj fiksrigardis la viron malantaŭ tiu tablo.

[3] Rijswijk estas urbo apud Den Haag (Hago)

«Ĉu vi estas la detektivo De Cock?»

La maljuna detektivo kapjesis.

«Se vi permesas. De Cock, kun... hm, per co-o-co-ko.»

Li montris antaŭ sin al Vledder.

«Mia nesuperebla juna asistanto. Li partoprenas en ĉiuj miaj oficaj sekretoj.» La gasto rigardis de De Cock al Vledder kaj reen.

«Mi... hm, mi ŝatus paroli kun vi dum momento,» li komencis iom necerte.

«Iu diris al mi, ke estus plej bone, se mi demandus pri vi en la policejo *Warmoesstraat*.»

De Cock montris al la seĝo apud sia skribtablo.

«Bonvolu sidiĝi.»

La viro demetis sian pluvmantelon, faldis la malsekan eksteron enen, sidiĝis kaj metis sian mantelon sur la genuojn.

«Mi estas van Huesden... Arnold van Huesden, se diri precize,» li solene anoncis. «En *Oude Hoogstraat*[4] n-ro 412 mi havas malgrandan cigarejon.»

De Cock ridetis.

«Ĉu nuntempe oni ankoraŭ povas enspezi monon per tio?»

Sinjoro Van Huesden kapneis.

«Pro ĉiaj timigaj kampanjoj pri atendebla morto, la nombro de tabakuzantoj iĝis ĉiam pli malgranda. Krome, tabakvaroj estas tiel impostitaj, ke pli kaj pli multaj homoj ne plu povas pagi siajn fumajn bezonojn.»

«Do ne superabundo, ĉu?»

[4]Oude Hoogstraat: Malnova altstrato

Van Huesden rikanis. «Por ne droni en ŝuldoj mi foje vendas haŝiŝon.»

Por momento li gratis la nukon. «Mi ne diros al vi, kie mi aĉetas tiujn aferojn, sed ĝis nun tio tamen estas neniu problemo.»

De Cock etendis siajn manojn.

«Mi ne demandos vin pri tio,» li afable respondis.

«Kion… hm, alveninte ĉi tien, vi volis diri al mi?»

Arnold van Huesden iomete ŝanceliĝis sur sia seĝo.

«Mi disvolvis pli-malpli konfidencan rilaton kun unu el tiuj kanabuzantoj. Li estas simpatia junulo en kiu estas nenio malbona. Mi ankaŭ ne volas, ke li havu problemojn.»

De Cock ekzamene rigardis al la viro.

«Ĉu ekzistas ia ŝanco je tio?»

Sur la vizaĝo de la viro aperis dolora rigardo.

«Oni demandas sin kiom da rezisto havas tia knabo. Kion tiu knabo povas toleri? Kaj, tre grave, kiom granda estas la tento?»

De Cock ridetis.

«Kiu estas la tentanto?»

«Tentantino.»

«Ĉu virino?»

Arnold van Huesden kapjesis. «Juna, drogulino, filino de tre riĉa viro en la urbo *Heemstede*.»

De Cock aŭskultis atente. «Ĉu *Heemstede*?»

«Jes.»

«Per kio ŝi tentas lin?»

«Mono.»

«Ĉu ŝi havas tion?»

Van Huesden kapjesis.

«Mi jam menciis, ke ŝia patro estas tre riĉa. Ŝia patrino forpasis antaŭ kelkaj jaroj kaj ŝi estas la sola infano.»

«Kio plu?»

«Post la morto de sia patro, la filino heredos ĉiujn liajn havaĵojn.»

De Cock mallarĝigis la okulojn duonfermitaj.

«Kun la konsekvenco, ke estus agrable por la filino ke ŝia patro mortus tre rapide.»

Arnold van Huesden kapjesis.

«Ekzakte, vi tion diras, tre rapide. Ŝi proponis al tiu knabo, pri kiu mi parolis al vi, kvindek mil eŭrojn por mortigi ŝian patron. Li ricevos tiun monon, se post la morto de ŝia patro ŝi havos lian tutan riĉaĵon.»

«Diable.»

«Efektive. La tuta situacio estas timiga. Mi konsilis al la junulo eviti ĉian kontakton kun tiu drogulino.»

«Ĉu li sukcesas?»

Van Huesden faris dubendan mienon.

«Ŝi donas al li liberecojn.»

«Kiujn?»

«Kiajn liberecojn bela junulino povas doni?», diris van Huesden ridetante.

De Cock frotis sian larĝan vizaĝon per plata mano. Tiam li klinis sin iom al sia gasto.

«Ĉu vi konas la nomon de tiu riĉa patro?»

«Jes, li nomiĝas Handgraaf, Victor Handgraaf, el la urbo *Heemstede.*»

Li suspiris kaj skuis la kapon.

«Kun ĉi tiu rakonto mi ne volis iri al la policejo. Mi klopodis atingi la viron. Mi volis averti lin kaj diri al li, ke lia vivo estas en danĝero. Mi volis doni al li la elekton

denunci sian filinon al la polico.»

«Kaj kio?»

La sinjoro van Huesden denove skuis sian kapon.

«Mi ne sukcesis. Mi malkovris, ke tiu Victor Handgraaf estas kunposedanto de granda teksa kompanio. Mi kontaktis la kompanion. La direktoro, kun kiu mi parolis, ne sciis kie troviĝas Handgraaf. Laŭ la direktoro, li estis en afervojaĝo, verŝajne ie en Ĉinio.»

De Cock snufis.

«Malfacilas serĉi.»

Arnold van Huesden kapjesis.

«Fakte mia veno al vi ĉi tie en la oficejon de *Warmoesstraat* estas urĝa salto. Mi volas preventi, ke la knabo implikiĝu en malfacilaĵojn. Se li al la tento de tiu juna drogulino cedas, tio sendube signifos la finon.»

«Kion vi celas?»

«Mi ne pensas, ke li kapablas murdi nerimarkite kaj senpune.»

De Cock grimacis kaj levis la ŝultrojn.

«Se vi volas, ke mi entreprenu ion kontraŭ la filino de tiu riĉa Victor Handgraaf, vi devas diri al mi la nomon de la juna haŝiŝuzanto, kiun ŝi altiris.»

Van Huesden kapskuis.

«Tion mi ne faros,» li kriis emocie. «Tion mi ne volas fari. Inter mi kaj tiu knabo estas rilato de respekto kaj fido. Mi ne volas difekti tion.»

«Vi povas nomi min eksmoda morala kavaliro, kio kompreneble ne estas tute ĝusta, sed mi havas miajn principojn. Mi ne donas al vi la nomon de tiu knabo. Absolute ne. Mi tiam perdos mian kredindecon.»

De Cock dubmienis.

«Mi estas polica detektivo. Mi bezonas konstrui iun pruvon. Tio estas mia tasko. Se mi direktus min al la filino de tiu riĉulo el *Heemstede* kun la rakonto, kiun vi rivelis al mi, kaj ŝi neas ĝin, tiam jen la fino de mia rakonto. Tiam mi ne plu havos eblecojn konfesigi tiun junulinon.»

Arnold van Huesden ekstaris.

«Tio estas via problemo. Mi havas nenion por aldoni al mia rakonto.»

Li kapsalutis al De Cock.

De Cock montris la seĝon apud sia skribotablo.

«Bonvolu sidiĝi denove. Eble mi tamen povas ŝanĝi vian opinion.»

Arnold van Huesden denove sidiĝis.

«Mi dubas pri tio.»

De Cock signifoplene rigardis la viron, rektigis sian dorson kaj momente paŭzis por la efiko.

«Hieraŭ vespere ni kaptis la kadavron de Victor Handgraaf el la akvo de kanalo *Keizersgracht*.»

4

ARNOLD VAN HEUSDEN fikse rigardis de De Cock al Vledder kaj reen. La anonco de De Cock videble frapis lin. Lia vizaĝo estiĝis pala kaj lia spiro ĉesis. Li bezonis sekundojn por reagi.

«Ĉu vi… eh, ĉu vi certas,» li demandis mallaŭte, heziteme, «ke la viktimo… ke la droninto estas Victor Handgraaf?»

De Cock streĉis sian vizaĝon kaj kapjesis.

«Absolute. La fotoj en lia pasporto kaj sur lia kondukslicenco ne lasas dubon.» Van Heusden dum momento maĉis sian malsupran lipon.

«Kiom… eh, kiom longe tiu viro kuŝis en la akvo de la kanalo?»

De Cock levis la ŝultrojn.

«Tion malfacilas determini poste. Tro multaj faktoroj rolas en tio: la fizika stato de la viktimo, ĉu en lia pulmo restis malmulte aŭ neniom da aero, ĉu la korpo estis kroĉita al io sub akvo, tiaj aferoj. Estas multe da rubo, rubmetalo sur la fundo de la kanaloj… precipe malnovaj bicikloj.»

La maljuna detektivo faris senhelpan geston.

«Ankaŭ malfacilas ekscii precize, kie la viktimo alvenis en la akvon. Ĉar la akvo de la kanaloj estas defluigata nokte, dronintoj en la kanala cirkvito kelkfoje vojaĝas konsiderindajn distancojn. Okulfrapaj ekzemploj pri tio estas konataj.» La griza detektivo etendis siajn manojn.

«Estas nur unu ŝanco havi iom da certeco pri la tempo dum kiu dronintoj estis en la akvo…» De Cock atente rigardis la viron. «Kiam la krimulo diras al ni, kie kaj je kioma horo li puŝis la viktimon en la akvon.»

Van Heusden rigardis lin oblikve.

«Ĉu li estis puŝita en la akvon?»

De Cock profunde suspiris.

«Malplaĉis al mia juna kolego ĉi tie, Vledder, kiam mi hieraŭvespere diris preterpase, ke mi malŝatas akvokadavrojn. Tiu antipatio koncernis ne nur la kadavron de Victor Handgraaf speciale. Mi jam havas tiun antipation ekde la komenco de mia kariero.»

Vledder opiniis, ke lia maljuna kolego kaj estro vere troigas en siaj privataj konfidencoj. Ja, kiom gravas lia privata malŝato? Li opiniis ke pli bone oni restu ĉe sia laboro kaj ĉe la temo. Sed De Cock jam solvis tiom da murdoj en sia longa kariero, terurajn kaj strangajn murdojn, faritajn pro la plej nekompreneblaj motivoj; eble li pravis kaj ŝajna deflankiĝo povus malstreĉi la atenton de krimfarinto.

Sama afero validas por iu kiun oni esplordemandas.

«Kial tiu antipatio?» demandis Van Heusden.

De Cock rikanis.

«Tiu antipatio ne estas senkiala. Kiel mi jam diris: ĉe akvokadavroj temas pri multaj necertecoj, tro malmulte da alkroĉpunktoj por detektivo.»

Arnold van Heusden ridetis.

«Vi do ne scias kiel la viktimo enakviĝis kaj kie?»

«Ne.»

«Vi ankaŭ ne scias ĉu oni intence puŝis lin en la akvon por ke li dronu, aŭ ĉu li akcidente falis en la akvon?»

«Ne.»

«Vi fakte scias ege malmulte.»

De Cock kapjesis rezignacie.

«Tio estas ĝusta.» La maljuna detektivo ridetis. «Mi eble ankoraŭ povos eltrovi ĉu la viktimo mastris la naĝarton. Sed tio ankaŭ ne multe helpas min plue.» Van Heusden metis sian manon sur la tablon de De Cock.

«Mi tamen volas scii pli.»

De Cock faris senhelpan geston.

«Al ĉiuj tiuj necertaj faktoroj mi esperas ricevi siatempe respondon de la krimfarinto.»

Arnold van Heusden ridetis denove.

«Kiam vi trovis tiun.»

«Ĝuste.»

Van Heusden ekstaris.

«Mi interkonsiliĝos kun mia juna amiko pri la farendo. Eble mi rivelos al vi lian nomon tuj kiam vi arestis la veran krimfarinton kaj oni ne plu povos suspekti lin.»

Ankaŭ De Cock kaj Vledder ekstaris el siaj seĝoj.

«Kiam via juna amiko rakontis al vi tiun aferon pri la oferto de la juna drogdependa virino?» demandis Vledder.

«Hieraŭ, posttagmeze.»

«Kaj dum kiom da tempo li jam rakontis tion? Mi celas, de kiam datiĝas tiu kontakto inter li kaj tiu drogdependa juna virino?»

«Tion mi ne scias.»

«Pri tio vi ne demandis lin, ĉu?» En la voĉo de Vledder sonis malfidemo.

Van Heusden skuis la kapon.

«Mi estis tiom trafita de lia rakonto, ke mi tuj klopodis atingi Victor Handgraaf por averti lin.»

«Tio ja nun ne plu havas sencon,» rapide diris De Cock, por atentigi Vledder pri tio ke estas li kiu faras tiun esplordemandadon.

Van Heusden serioze mienis.

«Lia morto surprizis min.»

De Cock iom hezitis kaj decidis plu silenti. Li ree falis

sur sian seĝon. Arnold van Heusden surmetis sian malsekan pluvmantelon, surmetis sian pluvĉapon kaj forlasis sen saluto la grandan detektivan ĉambron.

Vledder rigardis sian maljunan mastron, per okuloj fende kunpremitaj.

«Bonega ulo, tiu haŝiŝvendisto. Kaj tiu speciala rilato kun tiu drogmaniulo ankaŭ ne plaĉas al mi. Ĉi tio estas denove dura nukso kiun ni devas disrompi.»

De Cock kapjesis.

«Efektive. Li protektas tiun knabon. Kaj tion fari li ja rajtas.»

Vledder kapneis.

«Sen ampleksa klarigo de la juna amiko de Van Heusden, ni malmulte povas fari kontraŭ tiu knabino Handgraaf.»

La juna detektivo ridetis.

«Ni povas demandi Willemijn mem, ĉu ŝi konas la junulon al kiu ŝi promesis tiom grandan rekompencon por murdi la patron.»

De Cock surprizite rigardis lin.

«Vi ne parolas serioze, ĉu?»

Vledder ridis.

«Estis ŝerco. Sed ni ja povas spekuli pri la stulteco de Willemijn Handgraaf.»

De Cock kapneis. «Sensenca supozo.»

La griza detektivo rigardis supren al la granda horloĝo super la enireja pordo de la detektiva ĉambro.

«Se mi estus vi, mi ja ekveturus,» li konsilis al Vledder. «Atentu akiri tiun akvan specimenon de la kanalo kaj certigu, ke vi alvenu al *Westgaarde* ĝustatempe. Vi ne povas atendigi la kuraciston Rusteloos.»

Vledder etendis la manojn.

«Kiel mi faru tion… akiri specimenon de akvo el *Keizersgracht?*»

De Cock riproĉe rigardis lin.

«Dick Vledder,» li admonis, «ĉu iom da propra iniciato estas troa peto? Uzu vian cerbon.»

La juna detektivo kapneis.

«Ĉi tio estas nova por mi. Mi neniam antaŭe prenis akvan specimenon.»

De Cock grumblis.

«He, he, ĉu vi ne ricevis edukadon, aŭ ĉu oni ne instruas vin pensi tie? Aŭskultu atente, juna amiko, estas domboatoj en la kanalo. Se vi staras sur ĝi, vi jam estas proksima al la akvo. Kaj se vi volas fari ĝin tre profesie, vi kontaktu la akvopolicon.»

«Kion vi celas?» Vledder ludis la simplanimulon.

De Cock ridaĉis. «Tiam vi havos en la polica ŝipo ĵurigitajn atestantojn ĉirkaŭ vi kaj vi povas ellabori belegan oficialan raporton en kiu vi ekzakte indikos la lokon kie kaj kiuhore vi prenis la specimenon de la akvo.»

«Ĉu devas esti tiel?» Vledder ridis.

De Cock forviŝis la demandon kaj tuj li rigardis al la pordo. Iom dika viro estis enirinta la pordon sen frapi kaj iris per koleretaj paŝoj tra la granda detektiva ĉambro. La viro proksimume kvindekjaraĝis, taksis De Cock. Li portis travideblan plastan pluvmantelon kun kapuĉo. Sub tiu brilis ruĝa, bulronda vizaĝo.

Vledder rigardis scivoleme al la viro kaj poste al De Cock, por vidi ĉu tiu reagas al la komika bildo.

«Ĉu mi restu?» li demandis kun apenaŭ retenata rido. De Cock fingromontris la pordon.

«Iru ja nun,» li respondis incitita, sed tiel mallaŭte, ke la ĵus enirinta viro ne aŭdu ĝin. «Tiu viro ne voros min.»

La viro restis staranta ĉe la tablo de De Cock kaj skuis la kapon.

«Mi ne estas kanibalo,» diris li kun ioma voĉaltigo. «Mi ne venas ĉi tien por vori iun.»

La maljuna detektivo adaptis sian mienon al afabla rideto.

«Via aŭdkapablo estas bona,» li reagis afable. «La teksto ne estis destinita por vi.»

La viro dikfingrumis trans sia ŝultro. «Estis maltrankvila rigardo en la okuloj de la foriranta junulo.»

De Cock kapjesis, kvankam li komprenis, ke Vledder tute ne rigardis zorgoplene.

«La nuntempaj detektivoj,» li ŝercis, «vivas zorgoplenan vivon.»

La viro fingromontris la seĝon ĉe la tablo de la griza detektivo. «Ĉu mi eksidu tie?»

De Cock invitis montrante. «Eksidu vi.»

La viro ridetis. «Vi estas la fama detektivo De Cock, kun... eh, per co-o-co-ko?»

La maljuna detektivo faris repuŝan geston. «Tiu 'fama' estas via kvalifiko. Cetere vi estas bone informita.» La viro paŭzis momenton. «Ni antaŭ proksimume unu horo dum estrara kunveno decidis raporti al vi en la *Warmoesstraat* la malaperon de Victor Handgraaf.»

De Cock rikanis.

«Kiuj estas 'ni' kaj kiu vi estas?»

La viro faris senkulpigan geston.

«Pardonu min. Mia nomo estas Van Achterdiep, antaŭnomo Derek. Dum la neĉeesto de Victor Handgraaf mi

oficiale anstataŭas lin. Mi nun gvidas entute la entreprenon, Fondaĵo Handgraaf. Ni havas nian kontoron ĉe *Keizersgracht*. Nia Fondaĵo havas kelkajn sekciojn, kie nome de Victor kaj mi aliaj estraranoj tenas la sceptron. Tiuj estas ja la 'ni' pri kiuj vi demandis.» De Cock ridetis pro la longa klarigo. «Kial?»

«Kion vi celas?»

«Kial tiu kunveno?»

«Hieraŭ posttagmeze min telefonis viro kiu diris, ke li volas urĝe paroli kun Victor Handgraaf. Kiam mi demandis lin pri kio la interparolo temos, li rifuzis diri tion al mi. La viro demandis kie li povas atingi sinjoron Handgraaf. Temis, tiel li diris, pri afero de vivo aŭ morto.»

«Kaj?»

Sinjoro Van Achterdiep suspiris.

«Mi laŭvere diris al la viro, ke mi ne scias kie nia direktoro Handgraaf estas atingebla. Tiam la viro finis la interparolon. Mi eĉ ne havis la okazon demandi pri lia nomo.»

Van Achterdiep mienis dube.

«Tiu stranga telefonvoketo okupis mian menson la ceteron de la tago. Precipe la eldiro *afero de vivo aŭ morto* daŭre hantis mian menson. Hejme mi parolis pri tio kun mia edzino. Ŝi konsilis al mi informi la policajn detektivojn. Mi ja ne volis fari tion sen interkonsiliĝo.»

De Cock kapjesis kompreneme.

«Estas klare al mi. Pro tio tiu kunveno kun la direktoroj.»

«Ekzakte.»

«Kiam vi lastfoje havis kontakton kun sinjoro Handgraaf?»

«Antaŭ proksimume unu semajno.»

«Kie tio okazis?»

«Ĉe mi hejme.»

«Ĉu vi havis rendevuon kun li?»

Van Achterdiep kapneis.

«Li venis sen anonci sin. Por Victor tio ne estas nekutima. Li sekvas siajn impulsojn. Li rakontis al mia edzino kaj mi, ke li intencas vojaĝi al Ĉinio. En la nova Ĉinio laŭ li troviĝis ŝancoj por nia Fondaĵo. Li volis klopodi krei rilatojn. Victor Handgraaf estas entreprenema viro… tre energia. Li estas la fondinto de nia Fondaĵo.» Sonis admiro el lia voĉo.

De Cock ŝanĝis pozicion kaj iom levis la ŝultrojn.

«Ĉu sinjoro Handgraaf nenion diris pri rilatoj… pri homoj kun kiuj li havas kontaktojn… pri urboj kiujn li volas viziti? Simple forvojaĝi al Ĉinio ŝajnas al mi stulta aventuro.»

«Li pri nenio detale parolis, nenion konkretan rakontis. Victor diris nur: 'Mi iros al Ĉinio. Mi vidos ja kion mi renkontos. Vi aŭdos ankoraŭ de mi.'»

De Cock ridetis. «Kaj vi nenion aŭdis, ĉu?»

«Ne.»

De Cock kunfrapis la manojn. «Victor Handgraaf verŝajne pensis: *Audaces fortuna juvat*.»

Derek van Achterdiep mire rigardis lin. «Ĉu Latine?»

De Cock kapjesis senemocie.

«Laŭ la latina poeto Vergilio bonŝanco akompanas la aŭdaculojn. Sed kiel okazas pri multaj el tiaj malnovaj proverboj… ili kelkfoje en la realo ne havas la atenditan rezulton.»

Van Achterdiep gravmienis. Li ne bezonis humuron en ĉi momento.

«Ni, ĉe la Fondaĵo serioze maltrankviliĝas pro Victor,» li parolis singarde. «Sinjoro Handgraaf ja pli ofte dum kelkaj tagoj estis survoje, sed tiam tamen regule kontaktis nin.»

De Cock pinĉis sian sublipon." Ĉu edziĝinta?" demandis li kvazaŭ preterpase.

«Vi celas Victor, ĉu?»

«Jes.»

Van Achterdiep skuis la kapon. «Tio estas dramo. Lia edzino antaŭ du jaroj mortis. Li havas unu filinon, Willemijn. Pri ŝi li ne feliĉas. Ŝi iris en malbonan direkton kaj li forpelis ŝin el la domo.»

«Kial?»

«Ŝi estis heroindependulo. Precipe post la morto de lia edzino, ŝia patrino, ŝi iĝis nemanipulebla.»

De Cock ŝanĝis la temon. Li iom apogis sin malantaŭen sur sia kontorseĝo.

«Por reveni al la kaŭzo de via vizito: vi volas ĉi tie peti la *detektadon de la restadloko* de sinjoro Handgraaf, ĉu ne?»

«Ĉu tiel oni nomas tion?»

De Cock kapjesis kaj mallonge paŭzis.

«Ĉu sinjoro Handgraaf havis malamikojn?»

Van Achterdiep ŝultrolevis.

«Ĉiu sukcesplena viro havas malamikojn,» li diris senatente. «En la komerca mondo oni ja kelkfoje faras gravajn decidojn kiuj malfavore efikas al aliaj personoj. Tio kelkfoje kreas malfidon... sentojn de venĝemo... malamo... rankoro... malamikeco. Tio estas neevitebla. Tiu, kiu timigas tiujn sentojn, ne havos sukceson.»

Subite ŝanĝiĝis la mieno de Derek van Achterdiep. Aperis pensaj sulketoj en lia frunto kaj lia buŝo streĉiĝis.

«Bonvolu ripeti ankoraŭfoje vian antaŭe starigitan demandon?» li akre demandis.

De Cock ŝajnigis nekomprenon. «Kiun demandon?»

Sinjoro Van Achterdiep fingromontris al li. «Vi demandis: ĉu sinjoro Handgraaf *havis* malamikojn?»

«Jes, tion mi demandis.»

«Ĉu tiu demando estas ĝuste formulita?»

De Cock kapjesis malrapide. Li klinis sin antaŭen kaj malfermis tirkeston de sia skribotablo. El ĝi li prenis unu el la fotoj kiujn Bram van Wielingen faris de la viktimo. Malrapide li ŝovis la foton sur la tablo al Van Achterdiep.

«Ĉu vi rekonas lin?» Li studis la vizaĝon de la viro.

Derek van Achterdiep kovris sian vizaĝon per mano.

«Vi… Victor,» li balbutis, «Victor Handgraaf. Kio… hm, kio okazis al li?»

Li tuŝis la foton per la fingropintoj de sia tremanta dekstra mano.

«Kiel strange li aspektas… kun kunmetitaj manoj.»

De Cock retiris la foton al si. «Ni kaptis lin el la akvo de *Keizersgracht* ekzakte kia ĝi estas tie.»

Van Achterdiep glutis. «Ĉu li dronis?», li mallaŭte demandis. De Cock lante kapjesis. «Ni supozas tion.»

«Ĉu vi ankoraŭ ne certas?»

De Cock kapneis. Li mallonge rigardis sian horloĝon.

«Ĝuste nun, D-ro Rusteloos plenumas justican nekropsion de lia korpo. Li determinos la finan mortokaŭzon.»

Sinjoro Van Achterdiep rigardis al De Cock kun dolora rigardo.

«Kion vi pensas? Ĉu vi havas ideon…»

«Pri kio?»

Derek van Achterdiep iomete klinis sin al li.

«…pri tio kiel Victor Handgraaf mortis?»

La maljuna detektivo iomete levis la mentonon. Kio nun devis sekvi malfacile direblas.

«Mi pensas,» li parolis malrapide, kun solena voĉo.

«Mi pensas, ke li estas murdita.»

Van Achterdiep atente rigardis lin. «Ĉu murdita?»

«Jes.»

«Ĉu vi certas?» Denove la viro kovris sian vizaĝon per la mano, gesto de pura nekredemo.

«Preskaŭ,» estis la mallonga respondo de De Cock.

Derek van Achterdiep momenton fermis la okulojn. Ĉirkaŭ liaj lipoj ekvideblis dolora trajto.

«Cornelis Grijpskerk… li tamen faris ĝin.»

# 5

GAJE FAJFANTE Vledder eniris la grandan detektivan ĉambron. Li iom rigardis ĉirkaŭ si kaj pendigis sian nigran ledan jakon sur la vesthokaron. Poste li paŝis plu en la ĉambron kaj eksidis kontraŭ De Cock malantaŭ sia skribotablo. Singarde li ŝovis la ekranon de sia komputilo iom flanken por havi pli bonan rigardon al sia kolego.

«Ĉu tiu Voremulo[1] jam foriris?» ridante demandis li.

La griza detektivo lin rigardis ne kompreneme.

«Voremulo?»

Vledder kapjesis.

«Tiel mi ja nomas lin... tiun viron kun tiu ruĝvanga bulronda vizaĝo en tiu ridinda travidebla plasta surtuto, kiu piedbrue eniris la detektivan ĉambron en la momento kiam mi estis forironta.»

De Cock ridetis.

«Tiu viro ja ne estas Voremulo. Tiu viro plene nomiĝas Derek van Achterdiep. Li estas unu el la direktoroj de la Fondaĵo Handgraaf ĉe *Keizersgracht*.»

Vledder oblikve rigardis lin.

«Ĉu tiu estas la entrepreno de Victor Handgraaf, nia akvokadavro?»

«Ekzakte.»

«Kial li venis ĉi tien?»

«Por peti 'Detektadon de Restadloko'.»

Vledder rikanis.

«De tiu droninta direktoro.»

«Kiel vi ja povas diveni tion?»

[1] La esprimo rilatas al ĉi tiu rakonto: 'Papero ĉi tie' vokas senĉese la voremulo, Holle Bolle Gijs. Kaj se oni metas ion en lian buŝon, li tre dankas. La figuro situas en unu el la plej malnovaj amuzparkoj en Nederlando, la Efteling. Vidu: https://en.wikipedia.org/wiki/Efteling

Vledder snufis.

«Tio estas evidenta. Li ja mankis al ili en la entrepreno. Ĉu vi rakontis al li, ke vi jam scias la restadlokon de la mankanto?»

De Cock skuis la kapon.

«Ne tuj. Mi unue informpetis pri kelkaj bazaj elementoj. Laŭ tiu Derek van Achterdiep Handgraaf efektive planis iri al Ĉinio pro komercaj kialoj. Li vidis en Ĉinio ŝancojn por sia Fondaĵo. Supozeble importado de tekstilaĵoj kaj ŝuoj. Li verŝajne volis serĉi kontaktojn tiurilatajn.»

«Kiam oni maltrankviliĝis ĉe la Fondaĵo?»

De Cock ridetis.

«Sinjoro Van Achterdiep ekmaltrankviliĝis pri la bonfarto de sia kolego-direktoro pro telefonalvoko de viro kiu urĝe volis paroli kun Handgraaf. Afero, tiel la viro diris, de vivo aŭ morto.»

Vledder kapjesis kompreneme.

«La fifama telefonalvoko de Arnold van Heusden.»

De Cock kapjesis.

«Mi montris al sinjoro Derek van Achterdiep unu el la belegaj fotoj de la viktimo kiujn Bram van Wielingen hieraŭ vespere faris ĉe *Keizersgracht*.»

«Kiel li reagis?»

«Ŝokita. Konsternita. Senespere li gestis al sia kapo. Kiam mi finfine rakontis, ke mi estas firme konvinkita ke Victor Handgraaf ne mortis naturkaŭze, sed preskaŭ certe pro murdo, li tuj sugestis al mi tutpretan, absolute certan murdinton.»

Vledder ridetis.

«Treege facile.»

«Por li jes, sed por ni tio starigas demandon. Li nomis

iun Cornelis Grijpskerk.»

«Kiu estas tiu?»

De Cock braksvingis en la aero.

«Ankaŭ direktoro de la Fondaĵo Handgraaf. Sed ne en la absoluta pinto de la entrepreno. Li estas manaĝero de malgranda subsekcio en *Alkmaar*[2].»

Vledder dubmienis.

«Ĉu tiu viro murdintus Handgraaf?»

«Jes. Tion asertis sinjoro Van Achterdiep plene konvinke. Laŭ li pri tio ne estas iu ajn dubo.»

«Kiel li ekhavis tiun certecon?»

«Ĉio estas iom nebula,» respondis De Cock iom mishumore. «Mi sentis min ne feliĉa ĉe tio. Ĝi absolute ne konvinkis min. Laŭ Derek van Achterdiep Cornelis Grijpskerk sentis sin... kaj tion li ankoraŭ sentas sin... de Victor Handgraaf humiligita kaj malagnoskita... subtaksita. La funkcion de direktoro de malgranda sekcio de la Fondaĵo en *Alkmaar* li opinias tro malgrava kaj kontraŭa al antaŭe faritaj interkonsentoj.»

Vledder ridetis.

«Ĉiam la sama grumblado. Tio ja ne estas motivo por murdo, ĉu?»

«Vi pravas. Tion mi ankaŭ klarigis al li. Tamen tiu Cornelis Grijpskerk kelkfoje malkaŝe minacis – ĉeeste de atestantoj – aliaj dungitoj de la Fondaĵo – mortigi Victor Handgraaf se li ne ofertos al li pli konvenan funkcion en la grupo.» Vledder iom oblikve tenis la kapon.

«Ĉu Handgraaf sciis pri tiuj mortminacoj fare de Cornelis Grijpskerk?»

---

[2]Alkmaar estas urbo en la norda parto de la provinco Nord-Holando

De Cock dubmienis.

«Laŭ sinjoro Van Achterdiep li estis plene informita pri tio. La minacoj estis ofta temo de interparoloj.»

Vledder etendis siajn manojn.

«Kial do Victor Handgraaf ne maldungis tiun danĝeran viron?»

De Cock gestis senhelpe.

«Neniu ideo. Tio por ni estas ĝis nun unu el la nekompreneblaĵoj de tiu klubo. Derek van Achterdiep jam kelkfoje konsilis al la viktimo maldungi Cornelis Grijpskerk... forpeli lin simple el la Fondaĵo, sed Handgraaf ne volis decidi tion.»

«Strange, ĉu ne?»

De Cock kapjesis.

«Certe strange. Kompreneble mi ankaŭ demandis pri la kialo de tiu konsilo.»

«Kaj?»

«Nenio. Handgraaf ĉiam silentis. Neniam li donis motivon kial li estas tiel bonvola rilate al Cornelis Grijpskerk.»

La maljuna detektivo fingromontris la telefonon.

«Mi ankaŭ demandis ĉe nia administracio ĉu iam oni denuncis tiujn mortminacojn de Cornelis Grijpskerk.»

«Kun kiu rezulto?»

De Cock kapneis.

«Cornelis Grijpskerk havas blankan punregistron.»

Vledder rikanis.

«Kion do ni povos fari kontraŭ tiu Grijpskerk?»

De Cock suprentiris siajn ŝultrojn.

«Pri tio mi ja devas ankoraŭfoje profunde pensi,» malrapidis li.

«Li ĉiukaze devos klarigi la bazon de siaj ekstremaj diraĵoj.»

«Vi celas la kialon de tiuj mortminacoj.»

«Ekzakte.»

La griza detektivo ŝanĝis sian pozicion kaj ŝanĝis la temon de la konversacio. «Diru, kio pri la nekropsio?»

Vledder larĝe grimacis.

«Mi havas surprizon por vi.»

«Tion mi ne volas kredi,» diris De Cock. «Post ĉiom da jaroj la rezulto de justica nekropsio ne plu povas surprizi min.»

Vledder suprentiris la brovojn.

«Tamen vi estos surprizita.»

«Nu, rakontu do.»

Vledder silentis momenton porefike.

«La fingroj de ambaŭ manoj de la viktimo estas kungluitaj.» Li fierete ekpozis sur la seĝo.

De Cock, konfuzita, rigardis lin.

«Kungluitaj?» demandis li nekredeme.

Vledder kapjesis.

«Per iu speco de rapidgluo, tia fortika aĵo. Doktoro Rusteloos kaj mi trovis ankaŭ spurojn de tiu gluo sur la jaketo de la viktimo.»

«Kiel vi eltrovis tion?»

Vledder frapis sian bruston per sia montrofingro.

«Doktoro Rusteloos volis disigi la kunmetitajn manojn por forigi la ksifoidan sternumon el la korpo de la viktimo.»

«Kial tio ne funkciis?»

«Tiuj kunmetitaj manoj malhelpis, sciu,» deklaris Vledder. «Kiam doktoro Rusteloos rigardis la manojn pli atente, li eltrovis, ke la fingroj estas forte kungluitaj. Ni provis

kune perforte... ĉiu tirante unu brakon... disŝiri la manojn. Tio ne funkciis kaj ni timis, ke ni forŝirus la haŭton.»

«Kaj poste?»

Vledder suspiris.

«Ni pripensis forigi la manojn de la korpo... segadi. Ni tamen ne faris.»

«Kial ne?»

Vledder mansvingis.

«Pro pieco, De Cock. Estas limoj. Ŝajnis al ni por la parencoj en konfrontiĝo terura vidaĵo... mortinto sen manoj. En la fino, Doktoro Rusteloos malligis la fingrojn unu post la alia per lanceto.»

De Cock iom puŝis sian malsupran lipon antaŭen.

«Draste.»

«Ankaŭ mi pensis tiel,» diris Vledder.

«Doktoro Rusteloos tamen forigis du el la kunigitaj fingroj de la viktimo. Li konservos ilin, tiel ke ni povas pruvi laŭleĝe la ĉeeston de la kontakta gluo inter la fingroj. Post la nekropsio, Rusteloos dece kunmetis la manojn.»

La juna detektivo paŭzis kaj nelonge skuis la kapon pro la memoro pri la makabra okazaĵo. Li profunde suspiris kaj arkigis sian dorson.

«Eĉ la sperta kuracisto Rusteloos,» li diris mallaŭte, preskaŭ flustre, «konfuziĝis dum momento. Li neniam spertis ion similan en sia longa kariero kiel patologo.»

De Cock atendis pacience ĝis Vledder reakiris iujn el siaj sencoj.

«Kion vi faris kun la aĵoj?»

La juna detektivo levis la okulojn. «Mi prenis la jakon de la viktimo kaj la du akvo-specimenojn prenitajn post la

nekropsio al la Justica Laboratorio en *Rijswijk*.»

De Cock penseme skuis la kapon.

«Ŝulaĉoj kunligitaj,» li diris meditante, «kaj manoj kungluitaj. Terure. Intenca murdo, kiu estis bone pripensita. Victor Handgraaf devis droni, tiu viro ne havis ŝancon.»

«Rusteloos ne volis antaŭvidi la rezultojn de la esploro de la Justica Laboratorio,» diris Vledder, «sed li diris, ke la fluido en la pulmoj de la viktimo estas nur krana akvo.»

De Cock surprizite rigardis lin. «Ĉu krana akvo?»

Vledder kapjesis. «Laŭ Doktoro Rusteloos. Li montris ĝin al mi. Estis sufiĉe klara. Ne poluita.»

Profunda suspiro eskapis el la pulmoj de De Cock.

«Do Victor Handgraaf,» li diris sinistre, «ne dronis en amsterdama kanalo.»

«Sed aliloke,» aldonis Vledder.

De Cock kapjesis malrapide. «Aliloke,» li ripetis.

Ĝi sonis kiel malbeno.

La maljuna detektivo fiksrigardis silente dum iom da tempo.

Vledder rigardis lin kaj vidis lacan, atakeblan maljunulon. Tamen tio estis detektivo de la malnova skolo, modela policano, elprovita kaj hardita en la profesio.

Lia instruisto, kaj li fieris pri tio. Ĉu li mem povus kontribui al la solvo de ĉi tiu terura murdo? Akva kadavro kaptita el *Keizersgracht*, kun pura krana akvo en la pulmoj…

La larĝa vizaĝo de De Cock kun la distingaj trajtoj ŝajnis ŝanĝiĝi al ŝtala masko. En la plenplena mansarda ĉambro de lia menso kreskis la absoluta volo malimpliki la misteron de la stranga akva kadavro.

Post iom da tempo li leviĝis de sia seĝo kaj iris malra-

pide al la vesthokaro.

Vledder stariĝis kaj sekvis lin. «Kien vi iras?»

De Cock rigardis trans sian ŝultron. «Al *De Pijp*.»

Sur la ligna varfo malantaŭ la policejo, ili eniris sian malnovan Golfon kaj forveturis. De Cock rigardis flanken al Vledder, kiu estis malantaŭ la stirilo. «Ĉu vi konas *De Pijp*?»

Vledder levis la ŝultrojn.

«Ĉu vi vere pensas, ke mi ankoraŭ ne scias ion pri la urbocentro de *Amsterdam*? Kiom ofte mi veturigis vin de loko al loko tra *Amsterdam*, en ĉiuj veteroj kaj nokte kaj tage? Mi ĉiam veturas, sciu, kaj vi sidas apud mi kiel salsako. Kutime vi eĉ ne rigardas. Kompreneble mi konas *De Pijp*, pli-malpli faman amsterdaman popolan kvartalon, sinjoro De Cock.»

«Tre bone, Dick Vledder,» respondis De Cock, ĉar ĉimomente li ne emis diskuti. Vledder pravis, li mem instruis al li ĉiujn enirojn kaj elirojn de la urbo.

«Do al *De Pijp*?»

De Cock kapjesis. «Al la *Karel du Jardinstraat*[3].»

Vledder puŝspiris. «Kion ni trovos tie?»

De Cock ridetis. «Laurens van der Dungen loĝas en la subtegmento de numero 517.»

Vledder sulkigis la brovojn. «Tiu simpatia infano, tiu ofta leĝrompinto?»

De Cock kapjesis. «Lia drogmania fianĉino Willemijn Handgraaf ankaŭ loĝas ĉe tiu adreso.»

Vledder rigardis lin kun rideto.

[3] Karel du Jardinstraat: strato nomita laŭ nederlanda artprentristo el la 17a jarcento

«Ĉu ni arestos ŝin pro murdo… provokante ĝin?»

De Cock ne respondis al tiu demando.

«Ĉu vi povas trovi *Karel du Jardinstraat*?»

«Ne, diru al mi, tiam vi almenaŭ restos maldorma.»

«Amuze, Dick. Mi ne maljuniĝis en la detektiva profesio per dormado, memoru tion.»

De Cock gestis antaŭ si, murmuregante.

«Veturu nur al *Ceintuurbaan* en la direkto de *Sarphatipark*. Antaŭ la parko, turnu dekstren al *Tweede Van der Helststraat*… tiam rekte antaŭen ĝis vi atingos *Karel du Jardinstraat* maldekstre.»

«Se la komunuma trafikservo intertempe ne ree ŝanĝis la trafikan situacion», diris Vledder.

De Cock ridetis. «Ĝi faras tion tiel longe, kiel mi deĵoris ĉe la polico.»

La preskaŭ senfarba enireja pordo de la domo 517 estis fermita. Ŝnuro pendis tra la klapo de la leterkesto. De Cock skuis ĝin kaj la seruro de la pordo malfermiĝis. La maljuna detektivo puŝis la pordon plu per sia dekstra genuo. Ĝuste malantaŭ la pordo ekis ŝtuparo. De Cock tiris siajn naŭdek kilogramojn spiregante supren per la grasa apogilo. La ŝtupoj de la ligna ŝtuparo knaris sub lia pezo. Vledder aŭskultis la krakadon kaj sekvis singarde. De Cock restis iom da tempo sur la mallarĝa portalo de la dua etaĝo kaj normaligis la ritmon de sia spirado.

Vledder montris supren.

«Ĉu ni devas iri plu?» Li maltrankviliĝis. Ĉi tio efektive tute ne estis facila por De Cock. De Cock kapjesis. «Du pliajn ŝtuparojn. Bonvolu atendi… Ilia loĝejo estas

en la subtegmento, je la fino.»

Kiam la detektivoj atingis la subtegmenton, ili momenton paŭzis hezite. Tie estis noktenigra mallumo. De Cock prenis sian lanternon el la poŝo de sia pluvmantelo.

La ovalo de lumo glitis sur ligna pordo, fermita per simpla seruro. «Ili ne estas ĉi tie,» flustris Vledder.

Anhelante peze, De Cock prenis la aparaton el sia interna poŝo kiun li iam akiris de sia amiko kaj eksŝtelisto Handige Henkie[4]. Ĝi estis kupra ujo enhavanta diversajn ŝlosilajn klingojn. La sperta detektivo elektis la ĝustan ŝlosilan klingon per sperta rigardo kaj post kelkaj sekundoj li malfermis la seruron. Li zorge puŝis la ŝanceliĝantan lignan pordon kaj eniris. Iom da vespera lumo glitis de dekliva mansarda fenestro.

De Cock snufis kelkajn fojojn. En la ĉambro estis stranga musodoro. Kombinaĵo de ŝvito, piso kaj kanabo.

Kontraŭ la dekliva parto de la tegmento estis malpura duobla lito kovrita per tavolo de ĉifonoj. Kiam De Cock fortiris iom de la tukoj, li vidis la bele formitan nudan korpon de dormanta junulino. La maljuna detektivo kaŝis ŝin denove parte. Poste li frapis la dorson de sia mano kontraŭ ŝia vango kelkajn fojojn.

Post iom da tempo ŝi malfermis la okulojn kaj sovaĝe rigardis lin. Ŝia buŝo formis streĉitan linion.

«Kiu vi estas?» ŝi demandis grumblante.

La griza detektivo aperigis sian plej belan rideton.

«Mia nomo estas De Cock... De Cock, per co-o-co-ko.» Li dikfingris super sia ŝultro. «La junulo ĉi tie estas mia kolego Vledder. Ni estas detektivoj de la policejo en

[4] Handige Henkie: Lerta Henĉjo; eks-rompŝtelisto kaj bona amiko de De Cock

*Warmoesstraat*.»

«Ĉu kriminala esploro?»

De Cock kapjesis. Li indikis kvadratan tablon malantaŭ li kun kelkaj seĝoj. «Se vi vestos vin, ni povas paroli tie dum kelka tempo.»

Ŝi skuis la kapon. «Mi restos kuŝante.»

De Cock prenis seĝon, puŝis ĝin apud la liton kaj sidiĝis sur ĝi.

Vledder restis starante kaj ekzamenis la scenon. Domaĝe, li pensis, tiel bela knabino en tia mizera ŝedo.

«Kiel vi nomiĝas?» demandis De Cock.

La knabino ridetis. «Ĉu tio gravas?»

«Ĉu vi estas Willemijn Handgraaf?»

«Vi estas bone informita.»

De Cock konservis sian bonhumoron.

«Do vi estas Willemijn Handgraaf, la juna drogulino kiu petas homojn murdi sian patron?»

Ŝi duone eksaltis. Ŝiaj nudaj mamoj tremis. «Mi volis ke li mortu… jes,» ŝi akre respondis. «Sed ne ke li supreniĝas kiel preĝanta pastro el la akvo de iu malpura amsterdama kanalo.»

# 6

DE COCK LONGE paŭzis por plene kompreni la vortojn de Willemijn.

Vledder ekglitis sur seĝon. Ja stari tie, en tiu malluksa ĉambreto dum lia maljuna ĉefo esplordemandis malzorgitan, duonnudan, sed belegan knabinon..... Ne, li sentis sin ja jam troa; li ne enmiksiĝu, rigardu kaj atendu ĝis kiam li povos rekonduki De Cock al 'Kit'.

Post ioma tempo la maljuna detektivo rigardis amuze la knabinon kun rideto sur la buŝo.

«Kiel preĝanta pastro,» li ripetis kvazaŭ recitante, «supreniĝanta el la malpurega akvo de amsterdama kanalo.» Li silentis sekundon por ke la vortoj plenefiku. «Ĝi povus esti el verko de Joost van den Vondel[1].»

Poste la maljuna detektivo etendis siajn manojn nekompreneme.

«Kiu inspiris tiun bildon al vi?»

Willemijn Handgraaf iom deturnis sian kapon.

«Derek van Achterdiep estis ĉi tie ĉi posttagmeze,» ŝi senatente respondis. «Je mia grandega miro li subite staris antaŭ mia lito kun sia bulronda fromaĝkapo. Neniu venas ĉi tie kutime.»

De Cock miris. «Pro kio sinjoro Van Achterdiep venis ĉi tien?»

Willemijn svingetis sian manon kaj ne penis kaŝi sian korpon.

«Van Achterdiep venis por kondolenci min pro la morto de mia patro. Li rakontis al mi ke oni eligis la mortan korpon de mia patro hieraŭ vespere el la akvo de *Keizers-*

---

[1]Joost van den Vondel estas konata poeto kaj verkisto el la 17a jarcento, kiu i.a. verkis "Gijsbrecht van Amstel" pri la sieĝo de la urbo *Amsterdam* en la mezepoko

*gracht.*»

De Cock kapjesis.

«Tio ĝustas.»

«Li diris, ke ĉe la policejo oni montris al li foton de mia patro… kuŝanta dorse sur la kajo… kun fermitaj okuloj kaj pie interplektitaj manoj sur la brusto.»

De Cock ridetis.

«Tio klarigas vian imagon de preĝanta pastro.»

«Jes.»

Ŝi rigardis flanken de De Cock, al Vledder, kiu kun senemocia mieno sidis ĉe la tablo. De temp' al tempo li ĵetis rigardon ĉirkaŭ si, kvazaŭ taksante la enhavon de la ĉambro, sed tamen lia rigardo poste nevole ree glitis al la knabino en la lito. Momenton la knabino lin rigardis.

De Cock sekvis ŝian rigardon kaj provis legi ŝian vizaĝon… ŝian pozon. Poste li iom kliniĝis al ŝi.

«Mi verdire ne havas la impreson,» diris li, kapskue, «ke la subita morto de via patro afliktis vin speciale.»

Willemijn Handgraaf snufis. «Kion vi ja atendas de mi,» ŝi demandis sardone, «ke mi estu ĝisfunde trista? Ke miaj larmoj daŭre ŝprucu?» De Cock decidis ne reagi al ŝia demando. Li sulkis la brovojn.

«Kiel Van Achterdiep sciis trovi vin ĉi tie?»

«Li havis mian adreson.»

«De kiu?»

Willemijn turnis sian kapon denove al li. Ŝi frapetis sian bruston. «De mi. Mi donis ĝin al li. Mi vizitis Derek van Achterdiep antaŭ proksimume unu monato… hejme, ĉe lia edzino.»

«Kial?»

Willemijn suspiris.

«Mi konis oĉjon Derek kiel bonan amikon de mia patro. Kiam mia patrino ankoraŭ vivis, li regule vizitis nin. Mi volis uzi lin.»

«Kiel?»

«Peranton.»

«Por kio?»

«Baf!» Willemijn kolere liberigis sian spiron tra siaj pintigitaj lipoj.

«Mi esperis, ke oĉjo Derek povu aranĝi ke mia patro plene reakceptu min kiel sian infanon.»

De Cock rigardis ŝin afable, surprizita.

«Ĉu vi deziris tion?»

Willemijn furioze kapjesis.

Ŝi furioze gestis ĉirkaŭe kaj plukis la malpurajn ĉifonojn ĉirkaŭ sia korpo per ambaŭ manoj.

«Ĉi... ĉi...» ŝi balbutis embarasite, «ĉi tiu ne estas vivinda medio, ĉu ne? Rigardu ĉirkaŭen! Estas neniel bona etoso! Flaru kaj gustumu la fetoron ĉirkaŭ vi. En ĉi tiu malĝoja etoso mi pli kaj pli enprofundiĝas en mian drogdependecon. Mi nur putras ĉi tie inter la ĉifonoj.»

De Cock grumblis.

«Tiu ĉi estas via propra elekto, ĉu ne?»

Willemijn kolere gestis forĵeton en lia direkto.

«Ĉu propra elekto?» Ŝi amare grumblis. «Vi, pri tio vi fek-nenion komprenaĉas.»

«Pri kio?»

Willemijn profunde suspiris.

«Kiam mia patrino mortis mi sentis min perdita... lasita senhelpe. Mi ne povas priskribi al vi mian senton de mizero. Mia patrino estis dolĉa, kompata virino... tre alirebla. Mi povus paroli kun ŝi pri mi mem kaj miaj pro-

blemoj. Mia patro estis tute kontraŭa. Li estas rigida, rigorpensa viro, ĉe kiu mi trovis neniun amosenton aŭ korinklinon. Mi simple ne eltenis la solecon post kiam mia patrino mortis.»

De Cock montris al ŝi per sia etendita mano.

«Tiam vi do drogiĝis?»

Willemijn kapjesis.

«De malbono al pli malbono.»

«Kaj tiam via patro elpelis vin el la domo.»

«Ankaŭ tio.»

De Cock strečis sian vizaĝon.

«Tiam post iom da tempo vi konkludis, ke via patro fakte estas obstaklo por vi.»

La knabino rigardis lin konfuzita.

«Por kiu… por kio?»

«Por ebla savo… eskapo de la turmenta ligo de via drogdependeco.»

Willemijn furioze reagis.

«Ĉu obstaklo?» ŝi kriegis sovaĝe. «Mia patro obstaklo? Kia obstaklo? Mi volis lian monon. Nur tion. Per mono mi povus reguligi kaj kontroli la drogdependecon de mi kaj Laurens. Tiu ŝtelaĉado kaj rabado… tiu pena, daŭra drogakirado detruas Laurens. Tiu viro kadukiĝas pro tio… kaj mi ne volas perdi lin.»

De Cock kompreneme kapjesis.

«Kiun vi alparolis pri… murdi vian patron? …Al kiu vi ofertis monon el la heredaĵo por plenumi tiun taskaĉon?»

Willemijn grumble apenaŭ ridetis.

«Al preskaŭ ĉiuj knaboj kaj viroj kiujn mi konas el la rondo de drogularo. Kaj ja tiuj estas sufiĉe da. Trista armeo de kanajlaro, de damnitoj.»

«Kaj?»

«Kio?»

«Ĉu vi sukcesis?»

Willemijn Handgraaf skuis sian kapon.

«Esti drogdependa ne signifas, ke vi perdas vian cerbon, ke vi ne plu povas pensi. Neniu akceptis mian proponon.»

De Cock montris sian miron.

«Temis tamen pri propono tre alloga. Preskaŭ ne malakceptebla. La sumo kiun vi ofertis estis sufiĉe alta: kvindekmil ĝis centmil eŭroj.»

Willemijn lin rigardis esplore.

«Ĉu vi parolis kun unu el tiuj knaboj?»

De Cock preteratentis la demandon.

«Kiel vi scias,» li devige demandis, «ke neniu akceptis vian oferton?»

«Neniu petis pliajn informojn,» ridetante diris Willemijn. «Neniu prezentis realigeblan murdoplanon por plenumi mian peton. Estis ankaŭ neniu kiu demandis min ĉu la heredaĵo kiun mi atendas, estas sufiĉe granda por pagi la promesitan sumon.»

De Cock tenis sian kapo oblikve.

«Ĉu vi povas klarigi tiun magran interesiĝon?»

Willemijn kalme kapjesis.

«Mi ja komprenas tion. Kiun garantion havis la murdonto? Neniun. Se poste mi rifuzus pagi … li ricevus nenion. Ja li ne povus iri al la polico dirante: "Mi murdis viron kaj nun mia komisiintino ne volas pagi".»

Ŝi rikanis al De Cock.

«Mi ja diris al vi: esti drogdependa ne signifas, ke oni perdas sian penskapablon.»

De Cock tiris la ŝultrojn.

«Eble vi estu oferinta ion alian al murdonto.»

«Kion?»

«Vi estas alloga juna virino.» Willemijn rapide rigardis al Vledder, ŝanĝis sian mienon kaj ree rigardis al De Cock. Se ŝiaj okuloj povus detrui...

«Do,» ŝi diris, kaj tio sonis malafable. «Vi celas mian korpon kiel trovujon por drogdependa fuŝulo?» Ŝi frotis siajn manojn sur la nudaj mamoj. «Mia korpo?» Ŝi skuis sian kapon. «La morto de mia patro,» ŝi malestime diris, «ne valoras hegemonion super mia korpo.»

La maljuna detektivo ridetis pro ŝia vortelekto. Li intence ne turnis sin al Vledder. Li konsciis ke li troviĝas en stranga situacio, sed tamen ŝajnis al li pli bone, ke nur li faru tiun ĉi interparolon.

«Kiom granda,» li demandis afable, «vi taksas la ŝancon ke nun, post la morto de via patro, subite sin anoncas drogdependulo kiu postulas sian rekompencon?» Willemijn skuis la kapon.

«Tiu ŝanco ne ekzistas.»

De Cock antaŭenŝovis sian suban lipon.

«Pri tio mi ja ne tiom certas. Ne mirigus min, kiam la morto de via patro estos ĝenerale konata, se subite tia viro ekaperos antaŭ via nazo kaj etendos sian manon.»

La bluaj okuloj de Willemijn Handgraaf ekfajris.

«Tiu ja estus kojonulo,» ŝi reagis morde. «Mi tuj insultegus lin pro la mallerta maniero per kiu li pelis mian patron en la morton... dronigo en fetora kanalo.» Ŝia voĉo plenis de sarkasmo.

De Cock ankoraŭ iom pli instigis ŝian koleron.

«Kun pie plektitaj manoj sur la brusto... kiel preĝanta

pastro.»

Willemijn konsente kapjesis. Ŝia vizaĝo koloriĝis ruĝa.

«Kiel oni povas elpensi tion?»

De Cock rigardis ŝin esplore.

«Kiel via patro ja devintus esti mortigita?»

Willemijn tiris sian kapon inter la ŝultrojn.

«Senemocia paflikvidado meze en la urbo... inter la promenanta publiko... kiel kutime se temas pri granda krimulo.»

La detektivoj veturis per sia malnova Golfo for el la *Karel du Jardinstraat*. Silentaj. Iliaj vizaĝoj streĉmienis, senesprime. La interparolo kun la juna Willemijn Handgraaf faris profundan impreson. Ankaŭ sur Vledder. La impresoj, la sentaĵoj serĉis ankoraŭ sian vojon al sekura loko en ilia memoro. Vledder estis la unua kiu rompis la silenton.

«Kia fatraso!» kriis li.

«Vi celas la apartamenton, ĉu?»

Vledder snufis.

«Ĉu oni rajtas tiel nomi tion... apartamento?»

De Cock grimacis.

«En mia junaĝo en *Amsterdam* ankoraŭ ekzistis loĝejoj kiujn oni oficiale deklaris neloĝeblaj. Mi ankoraŭ bone povas memori tiujn rektangulajn ŝildojn sur la pordoj. Tian ŝildon oni devintus najli tie sur la mansardan pordon.»

Vledder svingis la manon.

«Dum vi parolis kun ŝi, mi ĉirkaŭe rigardis en tiu ĉambraĉo. Tiu tegmenta fenestro super ŝia lito estis tiom malpura... ke lumo preskaŭ ne plu povas trairi. Aliflanke estis kuireja stablo kun malpurega gaskuirilo kaj fetorantaj

kaseroloj kun putrintaj manĝaĵrestaĵoj. Kiel eblas, ke homoj povas vivi tiel?»

De Cock iom malleviĝis.

«Ŝi tamen povas elturniĝi.»

«Ĉu Willemijn Handgraaf?»

De Cock kapjesis.

«Ŝi ankoraŭ ne estas narkotita. Ŝia korpo apenaŭ suferis pro la drogdependeco. Vi ja spertis tion. Ŝia cerbo laboras perfekte kaj ŝi ankoraŭ ardas pro batalemo.»

Vledder grumblis.

«Tiu Willemijn estas bela, tio estas vera. Ŝi vere estas terure bela femala besto. Certe alloga. Sed kiel edzinon, kiel partneron, mi ne dezirus ŝin. Kia diferenco kun mia Adelheid[2].»

De Cock skuis la kapon.

«Tiun komparon vi ne rajtas fari.»

Vledder kaŝridis.

«Willemijn plendas pri sia kruela patro, ĉe kiu ŝi ne trovis amon aŭ koramikecon. Mi ĉe ŝi ankaŭ povis konstati malmulte da amo kaj koramikeco, kontraŭe eĉ. Ŝia sinteno al la patro estis trempita en malamo.»

De Cock faris senhelpan geston.

«Procezo de jaroj, mi supozas. Ju pli ŝi sinkis en sian drogdependecon, des pli intense kreskis la malamo al sia patro. Eble tiu malamo en la daŭro de la tempo atingis deziron al mortigo, ĝuste pro ŝia propra malkapablo retiri sin el sia drogdependeco. Tiun propran malkapablon ŝi projekcias sur la patron.»

Vledder ridis.

[2] Policanino kun kiu Vledder kunvivas jam delonge

«Willemijn ja luu vin kiel sian advokaton. Pli bonan defendanton ŝi ne povos trovi.»

De Cock rigardis flanken.

«Defendanton... de kio?»

Vledder mangestis iom antaŭen.

«Delogado.»

«Ĉu vi opinias?»

«Intence farita kriminstigo per promesoj de rimarkindaj donacoj,» diris Vledder solene. «Tio laŭ mi estas grava krimo, kun risko de kvin jaroj da mallibereja puno.»

De Cock iom kuntiris siajn brovojn.

«Tio estas multe.»

Vledder kapjesis.

«Ni lasis tiun Willemijn Handgraaf sen damaĝo en tiu fetora ĉambraĉo, sed fakte ni devus esti arestintaj ŝin. Pri ŝia punindeco ne ekzistis iu ajn dubo. Ŝi tute malkaŝe koncedis tiun delogadon»

«Daŭrigu...»

«Ŝia patro mortis.»

De Cock ĵetis rigardon flanken.

«Ĉu pro tiu delogado?»

Vledder iom hezitis pro tiu interveno.

«Tio... hm, tio ankoraŭ estas pruvenda,» diris li necerta.

De Cock grimacis.

«Kaj se poste el nia esploro montriĝos, ke la murdo de ŝia patro neniel rilatas al la delogado... ke tiu delogado neniel havis rezulton.... ke Victor Handgraaf mortis pro agado de murdisto kiun ne instigis la delogado, sed tute aliaj motivoj?»

Vledder ne respondis. Li momenton prenis siajn ma-

nojn de la stirilo de la Golfo kaj poste premis siajn pugnojn sur ĝin.

«Mi...mi legos,» diris li hezite, «ĉi-vespere ankoraŭfoje bone la Kriminalan Kodon pri la koncepto de delogado.» La juna detektivo reprenis la stirilon en kutima maniero.

«Ĉu ni reiru al 'Kit'?»

De Cock kapneis. Li palpserĉis en la interna poŝo de sia jako sian notlibreton, malfermis kaj trafoliumis ĝin.

«Ni ja estas survoje. Veturu en la direkton de *Duivendrecht*.» Vledder mire rigardis lin.

«Kion ni faru tie?»

De Cock konsultis siajn notojn.

«*Duivendrecht*, "*In de Korenmolen*"[3] numero 120, tie loĝas Cornelis Grijpskerk.»

Vledder ridetis.

«La viro kiu havis planon murdi sian ĉefon, Victor Handgraaf.»

«Ekzakte.»

«Ĉu li estos hejme? Li ja laboras en *Alkmaar*, ĉu?»

De Cock rigardis sian brakhorloĝon.

«Estas preskaŭ la sepa horo. Eble li de temp' al tempo iras unu horon pli frue hejmen por eviti la aŭtovicojn.»

«Mi esperas, ke nin ne ĝenos ĉiuj tiuj aŭtoj kiuj eskapas la urbon.»

«Ne tedu min, Dick, tiuj uloj jam sidas ĉetable manĝante varman vespermanĝon.»

Jes, ili ja povas vespermanĝi, pensis Vledder. Li ja devus atendi ankoraŭ kelkajn horojn antaŭ ol lia stomako

---

[3] In de Korenmolen: stratnomo kiu signifas: En la grenmuelejo

pleniĝos. Kiel ja tiu oldulo aranĝis tion? Li neniam aŭdis ion alian ol pri lia varma ĉokoladlakto el la mikro-ondilo, kaj tio ja nur tagfine.

La parcelo "*In de Korenmolen*" 120 montriĝis bangalo de aparta arkitekturo, parte ligita al alia domo, kaj kun ne tro strikte masonitaj ruĝaj brikoj. Sur la parkejo kontraŭ la bangalo ankoraŭ estis libera loko. Vledder parkis la Golfon kaj la detektivoj eliris.

Vledder frapfermis la pordon kaj plendis: «De Cock, ĉu vi ree faros tion, baldaŭ?»

«Kion vi celas?»

«Ĉu vi denove sole parolos, kiel ĉe Willemijn? Mi sidis tie kvazaŭ muta Joĉjo.»

«Ne tedu min, Dick. Via vico venos baldaŭ? Kaj tiom longe vi ja ne bezonos atendi.»

«Nun vi ne parolaĉu, De Cock. Mi ankoraŭ ne povas malhavi vin.» Kaŝride ili promeniris sur la kahela pado laŭlonge de malgranda ĝardeno al la antaŭa enirpordo.

Sur blanka plasta paliso oni legis la nomon C. Grijpskerk skribita per nigraj literoj. Apude estis kupra butono. De Cock premis ĝin kaj en la interno de la domo sonoris dingdongo.

Pasis nur kelkaj sekundoj ĝis la pordo de la bangalo estis malfermita de alloga virino, vestita per sobra, ĝiskole butonumita robo. De Cock taksis, ke la virino estas kvardek-iom-jara.

Ŝi rigardis de De Cock al Vledder kaj reen. El ŝiaj helverdaj okuloj venis demanda rigardo.

La malnova detektivo ĝentile deprenis sian ĉapon.

«Mia nomo estas De Cock,» diris li afable. «De Cock, per... hm, per co-o-co-ko.» Li fingromontris trans sian ŝultron. «Tio estas mia kolego Vledder. Ni estas detektivoj kiuj laboras en la policejo en *Warmoesstraat* en *Amsterdam*.» Li momenton silentis. «Vi... hm, vi estas sinjorino Grijpskerk, ĉu?»

Rideto glitis sur ŝiaj lipoj.

«Tiu mi estas.»

«Ni ŝatus paroli kun via edzo.»

Sinjorino Grijpskerk kapskuis.

«Li ne ĉeestas.»

«Ĉu li ankoraŭ estas en sia oficejo en *Alkmaar*?»

«Mia edzo antaŭ kelkaj tagoj foriris al Ĉinio.»

De Cock rigardis ŝin surprizita.

«Al Ĉinio, ĉu?»

Sinjorino Grijpskerk kapjesis. «Komerca vojaĝo, kune kun la direktoro de la Fondfaĵo Handgraaf, sinjoro Handgraaf.»

De Cock frapis sian maldekstran manon kontraŭ la frunton kaj malrapide malsuprenigis sian manon sur la larĝa vizaĝo. Estis drameca gesto. Li sciis ĝian efikon kaj sciis, ke la maltrankvileco ekkreskos ĉe la virino kontraŭ li. Poste li profunde suspiris kaj gestis antaŭ si.

«Ĉu ni daŭrigu la interparoladon kun vi interne?»

# 7

De Cock ĉirkaŭrigardis kun plezuro. La interno agrable impresis la maljunan detektivon. La vasta salono kun pezaj traboj sur la plafono estis bonguste ornamita.

Super malhelaj kverkaj paneloj, la muroj estis gipsitaj preskaŭ neĝblankaj. Proksime de monumenta kameno kun gajaj nodecaj traboj estis ronda tablo kun kelkaj malhelbrunaj ledaj foteloj, kiuj invitis gastojn sidi.

Sinjorino Grijpskerk, kiu klare maltrankviliĝis pro la gesto de De Cock ĉe la enireja pordo, indikis al la detektivoj per tremanta mano, ke ili povas sidiĝi. De Cock kaj Vledder sinkis en fotelon.

Sinjorino Grijpskerk ŝovis sian seĝon tiel, ke ŝi povis teni vidan kontakton kun la du detektivoj. La griza detektivo metis sian malnovan ĉapelon apud sin sur la grizan ŝtonan plankon kaj iomete klinis sin antaŭen.

Vledder vidis, kio okazas: De Cock prepariĝis por malfermi la konversacion.

«Konversacioj starantaj ekster la enireja pordo,» milde malfermis la maljunan detektivon, «ĝenis min tiel longe, kiel mi plenumas ĉi tiun laboron. Ili ĉiam sentigas min malkomforta. Ĝi estas kaj ĉiam restas tiel malproksima. Tia pordo estas obstaklo por kompreni unu la alian.»

Sinjorino Grijpskerk ridetis atendeme.

«Kaj ĉu vi bezonas tiun komprenon?»

De Cock kapjesis.

«Kompreno por la laboro, kiun mi faras. Kaj mi malofte renkontas tiun komprenon.»

Sinjorino Grijpskerk faris nervozan manan movadon.

«Ĉu kompreno por batali kontraŭ krimoj... solvi krimojn?» ŝi demandis.

«Ĝuste.»

Sinjorino Grijpskerk suspekteme rigardis lin.

«Kaj ĉu tiurilate vi volis paroli kun mia edzo?»

De Cock ne tuj respondis.

«Kiam vi sciis, ke via edzo vojaĝos al Ĉinio kun sinjoro Handgraaf?»

«La saman tagon.»

De Cock nekredeme rigardis ŝin.

«Ĉu la tagon de la foriro?»

«Jes.»

«Kiel estis tiu tago?»

Sinjorino Grijpskerk moviĝis necerte sur sia seĝo kaj ĉirkaŭrigardis la ĉambron, kvazaŭ la vidaĵo helpus ŝin pri la memoro.

Vledder sekvis ŝian rigardon.

«Sinjoro Handgraaf telefonis al mia edzo kaj petis lin pretiĝi tuj por vojaĝo al Ĉinio. Komerca vojaĝo por importi malmultekostajn teksaĵojn kaj ŝuojn. "Mi venos kaj kunvenigos vin je kvarono post la dekdua," li diris.»

De Cock montris miron.

«Tio estas sufiĉe abrupta.»

«Efektive, ankaŭ mi tiel pensis.»

«Kiel reagis via edzo?»

Sinjorino Grijpskerk iomete levis la ŝultrojn.

«Li ne miris. Li agis trankvile kaj tre malstreĉita, simple. Ŝajnis al mi, ke Cor, mia edzo, pli-malpli atendis tian inviton de sinjoro Handgraaf.»

«Ĉu li ne parolis al vi pri tiu atendo?»

Sinjorino Grijpskerk streĉis la jupon sur la genuoj kaj brosis kelkfoje la ŝtofon per siaj manoj.

«Ne,» ŝi diris heziteme.

«Kaj poste?»

«Ni kolektis iujn aĵojn kaj pakis valizon. Senprokraste je la kvarono post la dekdua sinjoro Handgraaf estis ĉe la pordo kun sia Mercedeso. Mia edzo pakis sian valizon, donis al mi rapidan kison por adiaŭi, eniris en la aŭton kun li, kaj ili forveturis. Tiel estis.»

Vledder rapide ŝoviĝis antaŭen kaj demandis «Ĉu ĝuste tiel?»

«Kion vi celas?» Ŝi rigardis maltrankvile al Vledder. Nenio restis el la rideto, sulkoj sterniĝis sur ŝia frunto.

«Ĉu vi ne faris aranĝojn kun via edzo?», daŭrigis Vledder.

«Pri kio?»

«Kiom longe daŭros la vojaĝo, kiel vi povus atingi vian edzon, ĉu li kontaktos vin, tiaj aferoj.»

Sinjorino Grijpskerk faris malvolontan geston.

«"Vi aŭdos de mi." estas ĉio kion Cor diris al mi.»

De Cock levis la voĉon por signali al Vledder ke li devis silenti.

«Kaj?» li demandis.

«Kio?» demandis sinjorino Grijpskerk konfuzita.

«Ĉu vi aŭdis ion de li?»

Ŝi skuis la kapon. «Mi ne aŭdis de li ekde kiam li foriris. Nenion.»

«Eĉ ne lastatempe, ekzemple de la oficejo de la Fondaĵo sur *Keizersgracht*?»

«Ne.»

De Cock klinis sin al ŝi.

«Vi sendube rimarkos ion de mia surprizo, kiam vi diris al mi, kiam mi alvenis, ke via edzo vojaĝas kun sinjoro Handgraaf.»

Sinjorino Grijpskerk kapjesis konsente.

«Vi efektive reagis sufiĉe strange.»

De Cock ridetis.

«Ankaŭ por mi estis kompleta surprizo,» li deklaris. «Malkaŝo. Laŭ miaj informoj, via edzo vivis en malkonkordo kun Victor Handgraaf, pli malbone, via edzo eĉ minacis lin per morto...»

Vledder aŭskultis kun intereso la konversacion, sed dume li etendis sian manon al la stomako kaj pensis pri ĉiuj tiuj tien-reen-vojaĝantoj, kiuj nun manĝas. Ĉi tie al li ankoraŭ ne estis ofertita taso da kafo. Jen mi malsatas pro malsata salajro, li pensis, kaj ridetis pro si mem. Tiel katastrofa la situacio tamen ne estis. Sinjorino Grijpskerk aspektis malfeliĉa kaj faris senhelpan geston.

«Ankaŭ mi ne tre komprenis tion,» ŝi diris lace. «Cor, mia edzo, ne vere estas malferma libro. Male, li ofte estas tre fermita... introvertita. Certe rilate komercajn aferojn. Kiam mi petis klarigon, li ĉiam diris: vi komprenas nenion pri tio.»

De Cock apogis siajn manojn sur la genuoj kaj klinis sin multe antaŭen.

«Sed mortminacoj... prononcitaj antaŭ subuloj de la Fondaĵo... ili certe havas originon, ĉu ne? Vian edzon certe speciale kolerigis io aparte?»

Sinjorino Grijpskerk kapjesis.

«Prave. Mia edzo sentis sin miskomprenita kaj subtaksita.» Vledder kapjesis al la vortoj kvazaŭ temus pri li; miskomprenita kaj subtaksita.

Sinjorino Grijpskerk daŭrigis heziteme. «Laŭ mia edzo, sinjoro Handgraaf ne plenumis interkonsentojn.»

De Cock klinis sin pli proksime al ŝi.

«Kiam via edzo aliĝis al la Fondaĵo Handgraaf?»

«Ne temis pri dungado,» ŝi ridetis.

De Cock surprizite rigardis ŝin.

«Kio ĝi do estis?»

«Interkonsento.»

«Kun kiu?»

Sinjorino Grijpskerk plukis la kolumon de sia altkola robo kaj krucigis siajn brakojn.

«Sinjoroj Victor Handgraaf,» ŝi pacience klarigis, «Derek van Achterdiep, Peter Freedestein kaj mia edzo kutimis labori kune en diversaj postenoj ĉe *IJsselsteinse Bank*[1] en *Amsterdam*.»

«Ĉu vere?» diris De Cock, kvazaŭ celante: daŭrigu.

«Ĉe *IJsselsteinse Bank* ĉiuj kvar estis membroj de loteria klubo. Ĉiumonate ili deponis certan sumon en la loterian poton, kiun administris sinjoro Handgraaf. Ĉiumonate li aĉetis kelkajn lotojn de la Ŝtata Loterio.»

De Cock ridetis.

«Estas multaj tiaj loteriaj kluboj. Mi ankaŭ administris tian mizeran loterian poton ĉe la polico ĉe *Warmoesstraat* dum kelka tempo. Terure. Peti kontribuadon. Kiam ni neniam gajnis ion, la klubo mortis. Verdire, mi ne plu ĝuis ĝin. Malŝparo de mono.»

Sinjorino Grijpskerk ridis.

«Ankaŭ mia edzo volis eliri el la loteria klubo dum kelka tempo. "Tiu stulta Sankta Nenioma poto," li kutime diris, "tio nur kostas al ni monon."» La vizaĝo de sinjorino Grijpskerk heliĝis.

«Ĝis subite la premio falis sur bileton aĉetitan de Hand-

[1] IJsselstein estas urbeto en la provinco Utreĥto; la banko havas ties nomon

graaf.»

Vledder rigardis sian maljunan kolegon kaj poste la plafonon. Duonon de la premio por mi kaj mi komencos por mi mem, li pensis. Neniuj maljunaj kaj junaj kolegoj, plado da manĝaĵoj ĝustatempe kaj saniga nokta dormo.

De Cock tute ne konsciis pri la animaj ekscitiĝoj de Vledder kaj ridetis al la virino antaŭ li.

«Ĉu tio estis multe da mono?», li demandis.

Sinjorino Grijpskerk faris ŝultran movon.

«Mi neniam aŭdis mian edzon mencii la sumon, sed verŝajne estis milionoj.»

De Cock glitis al la rando de sia fotelo.

«Kio okazis al tiom da mono?»

Sinjorino Grijpskerk suspiris.

«Sinjoro Handgraaf ne tuj disdonis la predon, sed aranĝis serion da privataj kunvenoj kun la membroj de la loteria klubo.»

«Kial?»

«Handgraaf klarigis, ke la venka loteria bileto donas bonegan oportunon por la subuloj de *IJsselsteinse Bank* malkonekti sin de ĝia subprema brakumo kaj mem komenci profitodonan entreprenon.»

De Cock kapjesis kompreneme.

«La Fondaĵon Handgraaf.»

«Ĝuste.»

La maljuna detektivo ridetis.

«Entreprenon kun vasta perspektivo.»

Sinjorino Grijpskerk kapjesis konsente.

«Kaj allogaj ŝancoj por la salajraj sklavoj de *IJsselsteinse Bank*. Ne plu en pagata dungiĝo, sed kiel supera operacia direktoro de granda flora kompanio.»

De Cock sulkis la frunton.

«Ĉu la tuta premia mono enmetiĝis en la Fondaĵo Handgraaf?»

Sinjorino Grijpskerk kapneis.

«Krome, la membroj de la loteria klubo ricevis ĉiu pezan sumon en sia banka konto. Cor kaj mi aĉetis ĉi tiun bangalon kaj ni ankoraŭ havas belajn ŝparaĵojn kiel bufron por mallumaj tempoj.»

De Cock faris gajan geston al ŝi kaj al Vledder, kiu sidis sur sia seĝo kun apenaŭ kaŝata malintereso.

«Bone aranĝite, ĉu ne?»

«Certe.»

«Kiam via edzo komencis senti sin, hm... malkomforta? Mi volas diri, kiam do venis liaj unuaj plendoj pri la Fondaĵo?»

Sinjorino Grijpskerk suspiris.

«Tute baldaŭ. Cor fariĝis direktoro de filia oficejo de la Fondaĵo en *Alkmaar*. La efektiva potenco kuŝis ĉe Victor Handgraaf kaj lia amiko Derek van Achterdiep, kiuj administris la ĉefsidejon sur *Keizersgracht* en *Amsterdam*.»

«Mi supozas ke via edzo ne ŝatis tion?»

«Laŭ li tio estis kontraŭ la interkonsentoj faritaj. La kvar membroj de la loteria klubo ĉiuj ricevu la saman pozicion, tio estis interkonsentita. Ili povu plenumi la saman potencon kaj partopreni ĉiujn decidojn, kiuj estos prenitaj en la Fondaĵo.»

«Ĉu evidentiĝis ke tio ne funkcias tiel bone praktike?»

Sinjorino Grijpskerk kapneis.

«Mia edzo sentis sin forlasita, ignorata. Li kredis havi sufiĉajn kapablojn por povi plene partopreni la administradon.»

De Cock gestis kun la manoj en la aero.

«Ĉu li ribelis?»

Sinjorino Grijpskerk kapjesis.

«Pli kaj pli laŭte kaj konvinke. Sed tiuj du en *Amsterdam* apenaŭ respondis.»

«Ĉu je la ĉagreno de via edzo?»

Sinjorino Grijpskerk snufis.

«Li ekkoleris, ĉiam pli kaj ribeleme. Li komencis reagi per malgrandaj minacoj al Victor Handgraaf, kiun li vidis kiel malbonan geniulon, ĝis li ekkriis laŭte pri murdo.»

«Stulte.»

Sinjorino Grijpskerk kapjesis.

«Mi daŭre diris al li, ke li devas akcepti la situacion, ke lia kriego ne utilas kaj ke li devas preni aliajn vojojn por pravigi sin.»

De Cock demande rigardis ŝin.

«Kaj tiu kvara viro... Peter Freedestein?»

«Li ricevis filion en *Leiden*.»

«Ĉu ne ribelulo?»

Sinjorino Grijpskerk kapneis.

«Mia edzo nomis lin, pardonu la vorton, 'ŝtipkapulo', stulte naiva jesemulo, kiu akceptis ĉion, kion tiuj du ordonis en *Amsterdam*.»

«Via edzo ne povis konsenti pri tio?»

«Ne.»

De Cock faris mallongan paŭzon kaj Vledder decidis, ke li pli bone tute ne enmiksiĝu.

«Ĉu vi havas ideon, kie via edzo estas nuntempe?» rekomencis De Cock.

Sinjorino Grijpskerk suspiris.

«Mi ankoraŭ ne aŭdis de li. Kaj li jam estas for kelkajn

tagojn.»

De Cock momente fingrumis sian nazopinton.

«Ĉu vi havas bildon de via edzo por mi?»

«Por kio?», demandis sinjorino Grijpskerk mire

De Cock momente maĉis sian malsupran lipon.

«Mi pensas, ke estus saĝe peti la detektadon de la restadloko.»

Sinjorino Grijpskerk streĉe reagis.

«Ĉu vi timas, ke io okazis al li?» Tio sonis kvazaŭ ŝi esprimis sian propran timon. De Cock ne respondis. Li prenis la foton de la korpo de Viktor Handgraaf el sia interna poŝo kaj donis ĝin al ŝi.

La vizaĝo de sinjorino Grijpskerk paliĝis.

«Tio... tio estas Victor Handgraaf.»

De Cock kapjesis.

«Ni kaptis lin el la akvo de *Keizersgracht* hieraŭ vespere... murdita.»

La buŝo de sinjorino Grijpskerk malfermiĝis, ŝi sovaĝe ĉirkaŭrigardis.

«Kie... kie...», ŝi balbutis, «kie estas mia edzo?»

De Cock faris senhelpan geston.

«Eble fuĝanta.»

«Por kio?» De Cock kuntiris siajn lipojn antaŭ ol daŭrigi la parolon.

«Por la efektivigo de plano, kiu maturiĝis en li antaŭ longa tempo.»

Sinjorino Grijpskerk montris per tremantaj fingroj la teruran foton en sia mano.

«Tio... tio estas... lia ago... lia...»

Ŝi ne kapablis diri pli. Ŝiaj okuloj senbride ruliĝis en siaj ingoj. Ŝi oblikve glitis for en sia fotelo.

La detektivoj forveturis per sia malnova Golfo el *Duivendrecht*. Komence ili silentis, ĉiu dronanta en propraj pensoj. Vledder ne trovis la longan konversacion kontentiga, lia propra rolo en ĝi estis nula. Senkonscia sinjorino Grijpskerk. Ĉu nur tia rezulto? Estis situacio, kiu emociis lin tiel multe kiel De Cock.

Post iom da tempo, De Cock rigardis flanken trankviligita.

«Dick,» li suspiris, «mi ĝojas, ke io el tiu sekura kurso restis al vi. Bonŝance sinjorino Grijpskerk sufiĉe rapide resaniĝis post sia kolapso ...ŝia senkonsciiĝo. Mi neniam bone scias kiel agi pri senkonscia virino.»

Vledder ridetis. «Baf... ŝi nur svenis. Estis pro la emocio. Ne tiel mirinde, miaopinie, ĉar vi ege malsubtile esplordemandadis ŝin. Por komprenigi al sinjorino Grijpskerk, ke ŝia edzo eble faris murdon, vi povintus esti iom pli subtila.»

De Cock mangestis ekskuzon.

«Mi ne pensas, ke oni povas riproĉi ion ajn al mi. Sinjorino Grijpskerk sciis, ke ŝia edzo plurfoje minacis ekzekuti tiun Handgraaf. Tion ŝi konfesis. Kiam tiu sama Handgraaf neatendite invitis ŝian edzon por afervojaĝo al Ĉinio, ŝi devus malkonsili tion al sia edzo... aŭ ŝi devus demandi Handgraaf ĉu li scias kion li faras.»

Vledder volonte volis forgesi sian ĵusan paroleksplodon. Finfine, rigardante kaj aŭskultante, li lernis tre multe de sia maljuna instruisto. Li kapjesis komprene.

«Vi volas diri, ke ŝi mem kulpis pri sia stato.»

«Ĝuste kiam ŝi ekkonsciis pri sia propra respondeco

en tiu afero,» De Cock malrapide parolis, «ŝi fuĝis... klasika fuĝo en senkonsciiĝon. En mia longedaŭra kariero ĉe la polica esplorservo mi vidis plurajn virinojn fari ĉi tion.»

Vledder kapneis.

«Ne temis pri fuĝo, tio okazis al ŝi. Imagu en kiu situacio troviĝas sinjorino Grijpskerk. Laŭ mi ŝi estas dolĉa, zorgema virino. Iomete triviala. Ĝuste, kun la pruda robeto, sed tamen bona homo.»

«Laŭ mi tro amema kaj zorgema por la dominanta viro kun kiu ŝi edziniĝis,» diris De Cock. «Tiu viro estas malvarmega sensenta egoisto.»

«Ĉu vi opinias?»

De Cock mansvingis emociite.

«Absolute. Mi ne povas pripensi pli konforman precizigon. Tiu viro havas ĉarman virinon, belegan vilaon... monon en la banko por eventualaĵoj kaj plie sendube ankoraŭ reĝan salajron kiel direktoro de la Fondaĵo en *Alkmaar*. Ĉar tiu posteno ne plaĉas al li, li minacas murdi Handgraaf. Tiu viro neniam feliĉiĝos.»

La maljuna detektivo silentis momenton.

«Mia maljuna patrino ĉiam diris: nombru viajn benojn... ekkonsciĝu pri la multaj bonaĵoj kiujn vi havas, kiujn la vivo jam donas al vi.»

Vledder skuis la kapon.

«Ankaŭ mi ne komprenas tiun viron. Bonvolu baldaŭ dissendi per teletajpilo kaj per nia reto, ordonon pri 'Serĉado, Aresto kaj Alkonduko' de li?»

De Cock kapjesis.

«Certe.»

«Ne plu.»

«Kion vi volas diri.»

«Ĉu ne SAA[2] kaj suspekto pri murdo?”»

De Cock kapneis.

«Ekster liaj esprimitaj minacoj de murdo ni ne havas ian indikon, ke li reale respondecas pri la morto de Victor Handgraaf.»

Vledder ridetis senĝoje.

«Se li ankoraŭ vivas… ĉu tiu Cornelis Grijpskerk ne devas esti ie?»

De Cock ĝemis.

«Jen vi pravas, Dick… se li ankoraŭ vivas.»

---

[2] Ordono je Serĉado, Aresto, kaj Alkonduko

8

VLEDDER SULKIS frunton. «Ĉu vi pensas», li singardeme demandis, «ke Cornelis Grijpskerk ne plu vivas... ke li estis mortigita samtempe kun Victor Handgraaf? Kiu scias, ĉu ankaŭ forĵetita en la kanalon?»

De Cock levis siajn ŝultrojn.

«Tion mi ne povas scii. Tamen Victor Handgraaf kaj li estis kune. Kion ni scias estas, ke ne ekzistis apartaj interkonsentoj pri daŭrigo de la vojaĝo. Tio ankaŭ ne estas kredebla. Mi supozas, ke Grijpskerk akompanis sinjoron Handgraaf ĝis lia morto.» Vledder reagis streĉita.

«Kion tio povas signifi laŭ vi? Ĉu Cornelis Grijpskerk staris tie kun krucitaj brakoj... nenion faris... nenion provis por preventi la murdon? Aŭ ĉu li tute ne atestis la murdon de Handgraaf?»

De Cock profunde suspiris.

«Ni, denove kiel kutime, estas», li malgaje parolis, «hazarde kaptitaj en tre obskura mistero. Tio ne akordiĝas, ĉu ne? Se oni bone pripensas, oni eĉ ne povas forigi la hipotezon pri kunkulpeco de Grijpskerk al la murdo al Victor Handgraaf, aŭ eble li kiel kunkulpulo...»

Vledder grumblis.

«Konsekvence devas esti iu tria en la afero.»

De Cock silentis. La griza detektivo demandis al si kiujn vojojn li devos sekvi por trovi la veron.

Vledder mangestis al la antaŭa glaco.

«Al 'Kit', ĉu?»

De Cock elblovis la aeron el siaj pulmoj.

«Bonvolu.»

La juna detektivo parkis la malnovan Golfon sur la glita ligna ĝeto. Ili iomete ĉifite elaŭtiĝis kaj promenetis malrapide tra *Oudebrugsteeg* al *Warmoesstraat*.

Kiam ili eniris la vestiblon de la policejo, Jan Rozenbrand mansignis al la maljuna detektivo de malantaŭ la skribotablo per kurba fingro. De Cock iris al li kun larĝa rido.

«Rozenbrand, mi ĉiam iomete timas tiun kurban fingron de vi.» La gardokomandanto senkomprene rigardis lin.

«Kio malbonas en tio?»

De Cock mansvingis.

«Vi havas nur krimon en via repertuaro», li grumblis.

«Neniam io alia… io bela. Kiam vi iam havos ĝojan mesaĝon por mi?»

«Vi ĉiam venas kun ĝojaj aferoj, kaj ĝojaj mesaĝoj, ĉu ne?» diris la gardokomandanto. «Ne, De Cock, ĉi tiu policejo ĉi tie en *Warmoesstraat*», li malgaje daŭrigis, «ne estas loko por ĝojaj mesaĝoj. Tio ne konvenas al la konstruaĵo, kies muroj ĝemas pro la krimo. Se via animo deziregas ĝojajn mesaĝojn, iru en preĝejon en libera dimanĉo aŭ aliĝu al unu el la multaj novaj sektaj grupoj.»

De Cock levis la brovojn.

«Ĉu tiuj ekzistas?»

Jan Rozenbrand konvinke kapjesis.

«Vi ne havas ideon, De Cock», li rave ekkriis. «Kelkfoje la kredantoj venas ĉi tien kaj densamase staras antaŭ la balustrado kaj ĝojege kantas pri nova ĝoja mondo… paca mondo sen malamo, batalo kaj kruelaĵoj, tralala.»

De Cock snufis.

«Tio ne estas nova.»

La gardokomandanto faris seriozan mienon.

«Tamen mi havas la ideon ke tiuj novaj grupoj havas pli da elano. Pli da entuziasmo. Ili ankaŭ disradias tion. Ili sincere kredas je nova sperto de amo al proksimulo… homamo kun inspiro, bazitaj sur la konvinko de nova ĉielo. Ĉielo sen pordoj… alirebla por ĉiu kiu fervore preĝas por permeso.»

De Cock tenis siajn manojn sur la oreloj.

«Ĉesu. Se aŭskulti vin tiel,» li ŝercis, «ŝajnas, ke vi jam plene konvertiĝis.»

«Mi rigardas,» diris Rozenbrand sobre, «al la homoj, kiuj tie ĉi staras antaŭ la akceptejo, kaj analizas ilian konduton. La fakto, ke ili venas ĉi tien de temp' al tempo por kanti kun ĝojo, kredigas min, ke ni faras bonan laboron ĉi tie.»

De Cock apogiĝis sur la breto de la akceptejo kaj puŝis sian malsupran lipon antaŭen.

«Kio estas via mesaĝo al mi nun?», li demandis ameme.

La gardokomandanto montris supren.

«Viro atendas vin supre delonge. Mi ne petis lian nomon. Mi kredas, ke mi vidis lin ĉi tie antaŭe. Li portas unu el tiuj brunaj pluvmanteloj kun klapoj sur la ŝultroj.»

De Cock ridetis.

«Arnold van Heuden, la viro de cigarejo en *Oude Hoogstraat*, kie li ankaŭ vendas haŝiŝon.»

Jan Rozenbrand ridetis.

«Nu, tion permesas la Leĝo pri varoj.»

La maljuna detektivo ne respondis. Li turnis sin kaj

surgrimpis la ŝtonajn ŝtupojn al la dua etaĝo kun rimarkinda vigleco.

Vledder mire sekvis lin. Plej ofte lia maljuna kolego trudpaŝis kiel laca viro, kiu pasigis tutan tagon akompanante sian butikumantan edzinon. Li ankaŭ scivolis kiel De Cock konservis sian fortikan staturon.

Kiam li venis hejmen vespere, li devis ricevi de sia edzino pli ol unu tason de varma ĉokolado. Dum momento li pensis pri vespermanĝo ĉe kandellumo kun sia Adelheid, sed li forigis tiun tentan ideon rapide.

Sur la kanapo apud la enirpordo al la granda detektiva ĉambro estis Arnold van Heuden. Kiam li ekvidis la maljunan detektivon, li ekstaris kaj venis al li.

«Sinjoro De Cock,» li diris iom nervoze. «Mi volas momenton paroli kun vi. Mi konstatas, ke nun estas malfrue, sed mia juna amiko, vi scias, tiu junulo de la haŝiŝo, malaperis.»

De Cock ne haltis. Li pluiris kaj tiris Van Heuden per la brako en la detektivan ĉambron. Tie li sidigis lin sur la seĝon ĉe la skribotablo. Kun sia pluvmantelo ankoraŭ surmetita, De Cock sidiĝis apud li kaj tuj senceremonie ekparolis. «Kiel malaperis?» li demandis malbonhumore.

Van Heuden etendis la manojn antaŭen.

«Tiu knabo fidele venis ĉiutage por preni sian porcion da haŝiŝo. Hodiaŭ li ne venis. Post la ferma horo mi iris al lia domo. Li ankaŭ ne estis tie. Mi tre maltrankviliĝas.»

«Kial?»

Arnold van Heuden vigle gestis.

«Eble li tamen estas persvadita kaj envolvita en la murdo de sinjoro Handgraaf. Eble li estas fuĝanta.»

«Pro kiu… pro kio?»

«Pro sia aresto.»

De Cock snufis.

«Absurde. La murdo de Victor Handgraaf estis pripensita kaj ĝisfunde preparita. Tiu drogdependa haŝiŝa knabo ne kapablas tion fari.»

Van Heuden rigardis lin demande.

«Ĉu vi jam havas la identecon de 'tiu drogdependa haŝiŝa knabo'?» Ĝi sonis mokridete.

De Cock kapneis.

«Mi ne kredas, ke ĝi gravas tiel plu. Mi ankaŭ dubas pri lia fidindeco. Mi pensas, ke Willemijn Handgraaf ne lasis lin libera.»

La cigarbutikisto rigardis lin demande.

«Ĉu vi jam scias, kiu puŝis tiun Handgraaf en *Keizersgracht*?»

De Cock denove skuis la kapon.

«Mi parolis kun Willemijn.»

«Kaj?»

De Cock ridetis.

«Ŝi senhezite konfesas, ke ŝi promesis monon de la atendota heredaĵo al tiu, kiu pretus mortigi ŝian patron.»

Arnold van Heuden moviĝis sur sia seĝo.

«Ĉu vi arestis ŝin?»

«Ne.»

«Ŝia patro mortis!» estis la surprizita respondo. «Murdita. Ĉu ŝi ne menciis la nomon de la murdinto?»

De Cock faris senhelpan geston.

«Ŝi ne konas lin.»

«Kio?»

De Cock kapneis.

«Willemijn diras, ke ŝi ne konas la murdinton de ŝia

patro.»

«Kaj ĉu vi kredas tion?»

Ŝajnis, ke la cigara butikisto pridemandas De Cock. Kio inspiras tiun homon, miris Vledder. Kaj De Cock nur babilas. Sendube ĉio ĉi estas taktiko.

«Willemijn Handgraaf simple deklaris, ke ŝi faris sian proponon al preskaŭ ĉiu drogulo, kiun ŝi konas en la drogo-scenejo. Kaj tiuj estas multaj. Sed laŭ Willemijn neniu vere interesiĝis pri la tasko.»

Van Heuden rigardis lin nekredeme.

«Kvindek mil eŭroj estas multe da mono. Tamen bela kvanto por preni iom da risko, ĉu ne?»

De Cock direktis al li sian montrofingron.

«Ĉu vi?»

«Kio?» Van Heuden demandis, surprizita.

«Ĉu vi riskus murdon pro tiu sumo?»

La viro levis la ŝultrojn.

«Tiu Willemijn Handgraaf ne faris tiun oferton al mi.»

De Cock momenton plukis al sia nazo.

«Eĉ ne per via juna haŝiŝamiko? Kiel peranto?»

«Ĉu vi volas diri... hm, ĉu vi akuzas min pri murdo?»

De Cock kapneis.

«Ho,» li diris malkonsente, «mi nur pensis pri la ebloj.»

Kiam Arnold van Heuden forlasis la grandan detektivan ĉambron, Vledder ridis al De Cock.

«Vi celas... hm...», li imitis la voĉon de Arnold van Heuden, «vi kulpigas min pri murdo?» La juna detektivo kaŝridis. «Vi preskaŭ kaŭzis apopleksion al tiu povrulo».

De Cock levis sian montran fingron.

«Ĉu strange?»

«Kio?»

«Tiu drogulo rakontis al li pri la oferto de Willemijn, kaj li vere vidas eblojn malvivigi tiun Handgraaf kaj enkasigi tiujn kvindek mil eŭrojn.»

Vledder skuis la kapon.

«Li ja ne frenezas. Tiam li ja ne estus veninta al ni kun tiu rakonto kaj tiam li certe ne estus kontaktinta Derk van Achterdiep, kundirektoron de la Fondaĵo?»

De Cock ridetis.

«Bonege Vledder. Vi preskaŭ sambone pensadas kiel sperta detektivo.»

Vledder ignoris la rimarkon.

«Tamen ni devas ankoraŭfoje kontakti tiun kundirektoron Van Achterdiep.»

«Pri kio?»

Vledder gestis per levita montrofingro.

«Ĉu li sciis ke Handgraaf intencas akompani Grijpskerk en sia komerca vojaĝo al Ĉinio? Li ja sciis pri la streĉaĵoj inter tiuj du... Ĉu pri la minacoj murdi?»

De Cock forlasis sian seĝon.

«Tre bona rimarko,» li apreze parolis. «Do tion ni faru morgaŭ.»

La maljuna detektivo treniris al la vesthokaro kaj prenis sian ĉapelon. Vledder sekvis lin.

«Ĉu vi neniam cedas? Kion ni nun faru?»

De Cock duonturniĝis.

«Ni finu nian tagon ĉe Lučjo. Mia seka gorĝo sopiregas je la veluro de konjakaĵo. Kaj por vi li certe havos mordaĵon, mi povas aŭdi vian stomakon gruntantan,ĉu? Tion vi fine ekregu», li mokdiris.

En la mateno de tiu tago freŝa kaj timema suno brilis laŭpove, sed plifortiĝanta vento estis blovinta pezajn nubojn super la urbon, el kiuj unue falis nur pluveto, sed nun, en la malfrua vespero, pluvis intense. La helaj koloroj de la lumreklamoj speguliĝis petole en la malseka asfalto.

De Cock ja notis tiajn aferojn.

Regis silento en *Lange Niezel*[1]. Daŭraj pluvinundoj estis pelintaj la grupon da seksavidaj viroj el la stratoj. Ĉe la enirejo de la seksteatro sidis virino kun trikaĵo malantaŭ la kaso. Ŝi iom tede kapsalutis kiam la detektivoj preterirante salutis ŝin. De Cock suprentiris la kolumon de sia pluvmantelo kaj iom antaŭenŝovis sian malnovan ĉapelon. Li rigardis oblikve al Vledder, kiu kiel kutime iris duonan metron antaŭ li.

«Ni esplordemandu ankaŭ tiun viron de la Handgraaf Fondaĵo en *Leiden*.»

La juna detektivo iom retenis sian paŝon kaj turnis sian vizaĝon al De Cock.

«Peter Freedestein… 'ŝtipkapulo'.»

De Cock ne reagis.

Vledder iris iom malpli rapide por resti en la sama ritmo kiel De Cock.

El *Lange Niezel* ili paŝadis per *Voorburgwal* kaj *Oudekennissteeg* al *Achterburgwal*. Estis rimarkinde silente sur *Wallen*. Nebulfadenoj kirliĝis sur la malpura kanalakvo kiel kapricaj fantomoj.

La sekskomerco en tiaj pluvo kaj nebulo ne allogis mul-

[1] Lange Niezel: strato por seksemuloj

tajn klientojn. Ĉe la plejparto de la bordeloj la kurtenoj estis fermitaj. Angule de *Barndesteeg* ili eniris la kafejon de Svelta Luĉjo[2].

De Cock antaŭen klinis sin kaj lasis elflui iom da akvo el la rando de sia ĉapelo. Ĝi formis flakon sur la ruĝaj tapiŝkvadratoj. Poste li barakte senigis sin de sia malseka surtuto, iris al la finaĵo de la trinkstablo kaj levis sin sur la tabureton. Vledder eksidis ĉe li kun pluvgutantaj haroj.

Ankaŭ ĉe Luĉjo ne estis multe da homoj.

Trinkejestro Ludoviko, kiun la krimfiguroj ĉiam nomis Svelta Luĉjo pro lia malgranda brusto, per siaj malgrandaj manoj frotetis sian makulitan veŝton kaj venis vigle al De Cock.

Lia amika musvizaĝo ardis pro amo.

«Mi ĝojas revidi vin,» li kveris.

De Cock iomete moviĝis sur sia tabureto.

«Mi preskaŭ forgesis la vojon,» li ŝercis.

Ludoviko ridis.

«Kaj mi timis, ke la komisaro eldonis striktan malpermeson al maljuna detektivo kiel vi viziti mian establon.»

De Cock palpis sian nazopinton.

«Li ne kuraĝus! Kun tia malpermeso, mi tuj prenos fruan emeritiĝon.»

Svelta Ludoviko ridetis.

«Vi pravas. Ĉu 'Kit' estas multokupata?»

La griza detektivo kapjesis kun serioza vizaĝo.

«Por ni en *Warmoesstraat*...», li parolis solene, «kaj kompreneble por la landa registaro... krimo restas fonto de konstanta zorgo.»

[2] De Cock ĉiam ricevas utilajn konsiletojn de la krima amsterdama medio per *Smalle Lowietje*, en Esperanto Svelta Luĉjo

Svelta Luĉjo ridetis.

«Por vi en 'Kit', jes, ĝi daŭre maltrankviligas. Sed en *Den Haag*[3], krimo ne koncernas iun. Kiu ajn kabineto sidas en la pluŝa fotelo, ĝi ĉiam estas…» Li ne finis sian frazon.

«Ĉu la kutiman recepton?»

«De Cock,» murmuris Vledder, «mi ne volas ĝeni vin, sed elpensu ion por silentigi tiun porkon en mia stomako.»

De Cock ridetis.

Dume, Svelta Luĉjo elaste plonĝis sub la bufedon kaj reaperis kun botelo da bona franca konjako Napoleono, kiun li metis sur ĝin kun rava krio.

Li prenis tri profundajn konveksajn glasojn kaj glugle plenigis ilin.

De Cock rigardis. Li ŝatis la manieron de Luĉjo manipuli la botelon. Tiu estis ceremonia, preskaŭ devota gesto.

«Ludoviko,» li diris al la trinkejposedanto, «mia juna kolego ankoraŭ ne manĝis, vi scias, kion mi volas diri.»

«Mi prizorgos tion. Levu la glason unue.»

Ili ambaŭ prenis sian glason kaj rigardis unu la alian en la okulojn. La maljuna, multjarserva griziĝinta detektivo kaj la iom krimkomprena posedanto de kafejo. Ili ridis.

«Je la krimo.»

Estis ilia kutima tosto.

«Krimo,» gaje kriis De Cock, «kreskanta kaj prosperanta kun ĉiu nova ministraro.»

Svelta Luĉjo demetis sian glason.

[3] Esperante, (La) Hago, kie troviĝas la tutlanda registraro de Nederlando

«La krimo havas nenion por timi de *Den Haag*.»

La amika muzelo de la svelta kafejposedanto malheliĝis.

«Tamen ion oni devas fari,» li diris maltrankvile. «Kaj rapide. Tio vere ne povas daŭri tiel. Al nia lando venas pli kaj pli multaj eksterlandaj krimuloj. Ni fariĝis la krima rubujo de Eŭropo.»

De Cock prenis plian gluton de sia konjako kaj suspiris.

«Vi pravas,» li respondis malgaje. «Fariĝas pli malfacile kaj pli brutale. Likvidadoj nun estas en la ordo de la tago. Tio neniam estis la kazo.»

«Ni nun certigu, ke la junulo ne falu de sia tabureto,» Ludoviko ridetis kun komprenema rigardo al Vledder.

Momenton poste li metis bovlon plenan de nedolĉaj frandaĵoj sur la bufedon, kiun Vledder avide atakis. Li ne kuraĝis ektrinki konjakon sen salumita stomakpleno.

Svelta Luĉjo tiam klinis sin al De Cock.

«Pri kio vi okupiĝas nuntempe?»

De Cock iomete forpuŝis sian glason de si.

«Ni kaptis viron el la akvo de *Keizersgracht* kun liaj ŝuoj ligitaj kune kaj liaj manoj kunmetitaj sur lian bruston.»

«Pia viro.»

De Cock ridetis.

«Mi ne volas dubi pri tio, sed mi pensas, ke li estis senskrupule mortigita.»

Svelta Luĉjo rigardis lin oblikve.

«Mi ankoraŭ legis nenion pri tio. Ĉu ĝi estas sekreta? Ĉu vi jam scias, kiu tiu ulo estas?»

De Cock kapjesis.

«Handgraaf… Victor Handgraaf.»

La stretaj okuloj de Svelta Luĉjo ekbrilis.

«Victor,» li laŭte ripetis, «Victor Handgraaf.»

«Ĉu vi konas lin?» demandis De Cock surprizita.

Vledder aŭskultis kun granda intereso. Estis grave havi bonajn kontaktojn en ĉiuj sociaj tavoloj de la loĝantaro. Tion instruis De Cock al li. Kiom ofte jam Luĉjo ja donis impulson al la esplorado en la bonan direkton?

Svelta Luĉjo kapjesis.

«Li kreskis ĉi tie en la kvartalo. Knabo kun bone funkcianta cerbo. Lia patro instigis lin al plulernado kaj li atingis bonan pozicion ĉe *IJsselsteinse Bank*» La svelta kafejestro rikanis.

«Subite li naĝis en la mono. En la kvartalo oni diris ke li prirabis bankon, sed montriĝis ke li gajnis grandan sumon en la ŝtata loterio.»

Svelta Luĉjo tiris siajn brovojn.

«Kial ili estus murdintaj tiun knabon?»

«Bona demando,» suspiris De Cock. «Kaj mi trovu la respondon al tiu demando.»

Svelta Luĉjo mienis dolore.

«Se mi bone memoras, estis iu problemo pri la divido de tiu mono. Io ne estis tute en ordo. Okazis jam antaŭ pluraj jaroj. Ĉu mi informpetu pri tio por vi?»

De Cock kapjesis.

«Se vi nur ne mencios mian nomon.»

Svelta Luĉjo rikanis.

«Vi scias kiom diskreta mi estas.» Li ankoraŭfoje enverŝis. «Ĉu ĉio laŭ via plaĉo?» li demandis al Vledder, kiu ĵus maĉis spicitan viandbuleton. Poste li denove alparolis De Cock.

«Se mi ekscios ion, vi aŭdos de mi.»

Kun la varmiga ardo de du glasoj da konjako la detektivoj forlasis la trinkejon de Svelta Luĉjo kaj vage iris sur la vojo *Achterburgwal*. Estis nun vere multe pli da homoj ol antaŭ unu horo.

La pluvo ĉesis, nur pluvgutis ankoraŭ de la arboj ĉe la kanalo, kaj la sekskomerco ree plene funkciis.

Prostituitinoj en diversspecaj decaĵoj en la kompate ruĝa lumo de siaj montrofenestroj delogis la armeon de bezonuloj kiuj trenpaŝe paradis preter ilin.

Per *Oudekennissteeg* De Cock kaj Vledder trenpromenis al *Oudekerksplein* kaj de tie per *Kerksteeg* al *Warmoesstraat*.

Kiam ili eniris la halon de la policejo Jan Rozenbrand staris kun ruĝa kaj konsternita vizaĝo malantaŭ la akceptejo.

«Kie vi estis do?» li demandis kun mistona voĉo. De Cock rigardis lin mirigita.

«Ĉe Svelta Luĉjo.»

La gardokomandanto svingis siajn brakojn.

«La policanoj de *Keizersgracht* jam kelkfoje informpetis pri vi.»

«Tiel malfrue, ĉu? Ni ja ĝuste nun intencis iri hejmen.»

Jan Rozenbrand ne reagis, sed suspiris.

«El la akvo de *Keizersgracht* oni prenis kadavron de viro... la laĉoj de liaj ŝuoj estas kunligitaj kaj liaj manoj kunplektitaj sur lia brusto.»

# 9

POSTLASANTE LA FURIOZAN Jan Rozenbrand, De Cock kun Vledder kvazaŭ algluiĝintaj marŝis al la glata ligna varfo malantaŭ la policejo. Vledder, videble ĝenata pro la tumulto, grumblante enveturiliĝis en ilian malnovan Golf kaj startigis la motoron. Tiam li iom retroŝovis la manikon, konsultis sian brakhorloĝon kaj poste alrigardis De Cock, kiu ĵus antaŭ li trankvile jam enaŭtiĝis.

«Refoje malfrue en la vespero, same kiel hieraŭ,» li ekscitite kriis. «Kio okazas? Ĉu ĉi tio iĝas epidemio… droninto kun kunligitaj ŝulaĉoj kaj falditaj manoj en la kanalo?»

De Cock levis la ŝultrojn.

«Eble. Mi ne povas enrigardi la nebulan cerbujon de la kulpulo.»

De Vledder laŭte elspiris.

«Vi jam tiom longe profesias ĉi tie,» li emocie kriis. «Ĉu vi ankoraŭ ne povas fari fidindan profilon de la kulpulo?»

De Cock ne tuj respondis. Li observis la emociplenan vizaĝon de sia juna asistanto.

«Tiuj… hm, tiuj du konjakaĵoj ĉe Luĉjo,» li demandis zorgoplene, «ĉu ili ja ne tro ĝenas vin?»

Vledder detrue rigardis lin. «Du konjaketoj,» li rikanis. «Se ja estus duonlitro…» De Cock lasis la tiklan temon.

Tra *Oudebrugsteeg* ili veturis dekstren sur la irejon de *Damrak*[1]. Malgraŭ la nokta horo ankoraŭ sufiĉe da trafiko estis survoje. Aliflanke, sur la larĝa trotuaro de *Damrak*, marŝis multaj homoj kaj rapidmanĝejoj estis amase vizitataj.

[1]stratnomo, laŭlitere akvaĵo post la baraĵo; ĝi ligas la centran stacidomon al la centra placo *Dam*

La maljuna detektivo iom sin apogis malantaŭen.

«Se la manoj de la akvokadavro denove estas kungluitaj,» li diris, kapjesante, «almenaŭ ĝi rilatas al la sama kriminto.»

Vledder grumblis.

«Estas neverŝajne, ke du frenezuloj ekhavas la saman ideon samtempe.»

De Cock kapneis.

«Tion ni scios nur kiam ni estos surloke. Kaj se jes, kun tiuj manoj kaj tiuj piedoj, nu, tiam mi ne pensas, ke la kriminto estas freneza,» li diris penseme. «Male. Li eble estas ekstreme inteligenta. La plenumo de du identaj murdoj celas laŭ mia sento al certa simboleco. La kriminto volas diskonigi ion per tiuj murdoj.»

«Kion do?»

De Cock ridetis.

«Mi vere havas neniun ideon. Ni devos ĝisatendi kion ni ekvidos. En mia longa vivo kiel detektivo, mi ankoraŭ ne renkontis iujn murdintojn, kiuj faras penon bonorde faldi la manojn de siaj viktimoj post sia ago.»

Vledder ridetis senĝoje.

«Se tiu murdinto volas disvastigi la vorton,» li respondis, sovaĝe gestante, «kial li ne metas allogan anoncon en *De Telegraaf*[2]... ekstaras sur angulo de strato kaj disdonas diablajn pamfletojn aŭ, ankoraŭ pli bone... verkas libron plenan de elverŝoj?»

De Cock rigardis flanken.

«Mi tamen kredas,» li diris trankvile, «ke tiuj du konjaketoj tamen malbone efikis.»

---

[2] Laŭlitere, la telegrafo; temas pri la plej populara taĝĵurnalo en Nederlando

«Forfikiĝu.»

De Cock ridis gaje pro la reago.

«De vi,» li respondis trankvile, «malafabla deziro.»

De *Brouwersgracht* ili veturis sur *Keizersgracht*. Tamen antaŭ *Leliegracht* estis aŭto de la Komunuma Sanservo[3] kun malfermitaj pordoj kaj polica aŭto kun blua turnolumo.

Vledder parkumis sian Golfon malantaŭ la polica aŭto. La detektivoj eliris. Juna policano marŝis kun klakantaj paŝoj al De Cock. La maljuna detektivo rekonis lin de la antaŭa murdo.

«Mi denove petis nian gardokomandanton ke li avertu la ĝendarmaron. Ĉi tio estas murdo. Absolute. Sendube. Samkiel la antaŭa akva korpo: kunligitaj ŝulaĉoj. Mi ne ŝatas ĉi tion. Tio tute ne kongruas kun normala akva korpo.»

La griza detektivo ridetis.

«Vi pravas. Tio ne taŭgas.»

La juna policano snufis.

«La gardokomandanto diris, kiel hieraŭ: "Nur atendu De Cock."»

La maljuna detektivo marŝis apud la babilema juna policano al la rando de la kanalo. Li staris tie kaj lasis la lumon de sia poŝlampo gliti sur la kadavron. Li direktis la helan ovalon sur la devote kunigitajn manojn sur la brusto de la viro. «Ĉu ni kune elprovu ĉu la fingroj estas kunglu-itaj?», demandis Vledder.

De Cock kapneis.

«Ni lasos tion al doktoro Rusteloos.»

La lumo de lia poŝlampo glitis sur la vizaĝon de la viro.

---

[3] en la nederlanda: GGD

Vledder eligis sufokitan krion.

«Tiu vizaĝo aspektas konata al mi. Ĉu ni ne renkontis tiun ulon ie?»

«Ne.»

«Ĉu vi konas lin?»

De Cock kapjesis malrapide.

«Mi konas lin.»

«De kio?»

La maljuna detektivo donis sian poŝlampon al Vledder. El sia interna poŝo li prenis la foton, kiun donis al li sinjorino Grijpskerk. Li reprenis sian lanternon, donis al Vledder la foton kaj lumigis la portreton.

La buŝo de la juna detektivo malfermiĝis.

«Vere... tio estas Cornelis Grijpskerk.»

De Cock kapjesis.

«La kunvojaĝanto de Victor Handgraaf. Verŝajne iu forĵetaĉis lin en la kanalon unu tagon poste.»

Vledder rigardis flanken.

«Ĉu mortigite ankaŭ unu tagon poste?»

«Ne estas sencohava respondo al tiu ĉi demando. Eblas, ke ambaŭ viktimoj estis mortigitaj samtempe kaj ial la murdinto ne glitigis ilin en la kanalon samtempe. Sed ankaŭ povis okazi alimaniere.»

La griza detektivo paŭzis.

«Ankaŭ eblas,» li daŭrigis, iom ĉagrenite, «ke la murdinto enakvigis ilin samtempe, sed la akvokorpoj ne suprenflosis samtempe.»

Vledder ridetis.

«Mi ekkomprenas kial vi tiel malamas akvokorpojn.»

«Tro multaj necertecoj. Precipe pri la tempo de morto kaj la loko, kie okazis la murdo, tute ne estas indicoj.»

La maljuna detektivo trenis sin de la viktimo al la aŭto de la sanservaj flegistoj.

Antaŭ ol De Cock diris ion ajn, la plej aĝa flegisto kapneis.

«Ni ne faros tion. Ni ne forprenu tiun korpon. Lastfoje ĝi kaŭzis problemojn al nia servo. Ni mendis normalan ambulancon por vi.»

Li ĉirkaŭrigardis momenton.

«Mi pensas, ke ĝi povos veni ĉiumomente.»

La flegisto pravis. Kiam la ambulanco alvenis ilian vidkampon, De Cock marŝis al la juna policano de la gvata aŭto.

«Igu la gardokomandanton averti la ĝendarmaron. Kaj laŭ mia peto, ne al ĉi tiu loko ĉe la kanalo, sed al la sekcoĉambro ĉe *Westgaarde*.»

La policano komprene kapjesis.

«Vi lernas rapide,» diris De Cock apreze.

«Dankon.»

La maljuna detektivo taksis la vizaĝon de la junulo.

Li frapis lin sur la ŝultron.

«Kiel vi nomiĝas?»

«Veenboer... Jan Veenboer.»

De Cock ridetis.

«Jan Veenboer,» li ripetis. «Mi memoros vian nomon. Trejnado por nova grupo de detektivoj baldaŭ komenciĝos.»

Bram van Wielingen, la fotisto, eniris la nekropsian ĉambron kun grandaj paŝoj. Li metis sian aluminian tekon sur la ŝtonan plankon kaj paŝis al De Cock.

«Mi ne parolos pri la horo de la tago,» li komencis. «Ĉu

vi elpensis novan labormetodon?» li demandis, samtempe ridante. «Ĉu viaj viktimoj iros rekte al la nekropsiejo en la estonteco?»

De Cock kapneis.

«Ĝi ne fariĝas kutimo. Sed pri enakvigitaj kadavroj ne tiom gravas, kie vi trovas la viktimon. Tiu loko havigas malmultan gvidon.»

La fotisto kapjesis.

«Mi pensas, ke vi pravas. Ĉu li estas sur la nekropsia tablo?»

Van Wielingen denove prenis sian aluminian tekon kaj marŝis kun De Cock al la granita tablo. La fotisto glitigis sian rigardon sur la kadavron.

«Ĉu vi jam scias, kiu li estas?»

«Grijpskerk… Cornelis. Kiel la antaŭa viktimo, li apartenis al la Fondaĵo Handgraaf ĉe *Keizersgracht*.»

Bram van Wielingen iomete puŝis sian malsupran lipon antaŭen.

«Ankaŭ li bonfartas. Rigardu la tajlon… kia bona fasono. Ŝajne, la Fondaĵo enspezas bonan monon.»

Li montris la kunmetitajn manojn.

«Ĉu ĉi tiu viro ankaŭ apartenas al sekta grupo?»

De Cock surprizite rigardis lin.

«Kial vi pensas tion?»

Bram van Wielingen faris forĵetan geston.

«Ĝi similas al manio, religia furoro. La ordinaraj preĝejoj malpleniĝas, sed pli kaj pli da sektaj grupoj aperas kun sia propra evangelio.»

«Ĉu ankaŭ vi ja komencas?»

La fotisto montris al la viktimo.

«Rigardu atente. Ĉi tiu korpo aspektas same kiel la

antaŭa viktimo. Simpla duplikato… figuraĵo de morto en preĝo.»

De Cock kapneis.

«Laŭ mia esplorado, ĉi tiuj viktimoj havis nenion komunan kun iu ajn religia grupo dum sia vivo.»

Bram van Wielingen grumblis.

«Mi memoru ĉi tiun ideon dum via esplorado.»

De Cock svingis la ideon al la plafono.

«Faru nur viajn kutimajn fotojn. Vi bonege faras tion. Mi ja serĉos la kulpulon.»

«Krimuloj, mi pensas …pluralaj.»

De Cock turniĝis. Li ekvidis doktoron Den Koninghe en la pordejo de la nekropsia ĉambro. Malantaŭ li turis du grandegaj fratoj de la Medicina Servo kun sia nedisigebla brankardo.

La maljuna detektivo varme salutis la maljunan krimpatologon kaj kondukis lin al la viktimo sur la nekropsia tablo.

«Tutsimple fiŝita el la akvo de la *Keizersgracht,*» li klarigis pacience.

La krimpatologo gestis al la mortinto.

«Ŝajnas kopio de la hieraŭa.»

«Se ankaŭ liaj fingroj estas kungluitaj, preskaŭ certe la sama kriminto.»

Doktoro Den Koninghe surprizite levis la okulojn.

«Ĉu kungluitaj? Ankaŭ ĉi tiu?»

De Cock kapjesis.

«Kiam Doktoro Rusteloos volis forigi la sternumon dum la nekropsio, li ne povis disigi la kunmetitajn manojn sur la brusto. Li devis detranĉi ilin.»

La nekropsiisto palpis momente la fingrojn de la vik-

timo.

«Laŭ mi ili estas kungluitaj. La fingroj sentiĝas rigidaj.»

De Cock ĝemis.

«Mi jam suspektis tion.»

La kuracisto Den Koninghe premis per sia mano la bruston de la viktimo.

«Li havas akvon en siaj pulmoj.»

Li rigardis supren al De Cock.

«Ĉu vi ordonis al la patologanatomo preni specimenon de la enpulma akvo?» La maljuna detektivo kapjesis.

«Oni sendis la akvon al *Rijswijk*. Atendante la esploron tie en la laboratorio, la kuracisto Rusteloos opiniis, ke la likvo en la pulmoj de la antaŭa viktimo estas kranakvo.»

La kuracisto Den Koninghe brovumis.

«Kranakvo?»

«Jes, laŭ la kuracisto Rusteloos la akvo ne estis malpurigita. Ĝi ne similis kanalan akvon.»

La krimpatologo oblikve rigardis lin.

«Ĉu oni esploros la sangon de la viktimo?»

De Cock levis la ŝultrojn.

«Mi ne scias ĉu la kuracisto Rusteloos inkluzivigas tion en sia programo.»

La kuracisto Den Koninghe mansignis al la kadavro kaj poste lude piketis per sia montra fingro sur la bruston de De Cock.

«Li estas morta.»

«Ĉu absoluta certeco?» De Cock gaje demandis.

«Certeco,» la maljuna nekropsiisto rezignacie ripetis. «Por esti tute certa petu ampleksan toksologian esploron al la pataloganatomo.»

«Kial?» De Cock surprizite demandis.

La maljuna nekropsiisto subridis.

«Kion vi pensas, kiel oni povas trankvile dronigi plenkreskan viron en banujo?»

Post kiam Bram van Wielingen kaj la kuracisto Den Koninghe kun siaj flegistoj de la Sanservo foriris el la nekropsiejo, Vledder kaj De Cock enaŭtiĝis en sian Golfon kaj forlasis *Westgaarde*.

La maljuna detektivo rigardis flanken al la kondukanta Vledder.

«Ĉu li havis ion specialan kun si?»

«Ĉu la viktimo?» Vledder kapneis. «Ankaŭ ĉi-foje ne temis pri rabomurdo. Lia leda monujo entenis kelkajn centojn da eŭroj. Plue kreditkarton, liajn ĝiran garantiilon, konduklicencon, atestilon pri aŭta enmatrikuligo kaj lian nederlandan pasporton.»

De Cock brovumis.

«Ĉu atestilo pri enmatrikuligo? Ĉu Victor Handgraaf ankaŭ kunportis atestilon pri enmatrikuligo?»

«Ne.»

De Cock frapis sian frunton per sia dekstra mano.

«Stulte, stulte. Ni ankoraŭ faris nenion pri la aŭto de Victor Handgraaf!»

«Kion vi volas diri?»

«Tiu Mercedeso de Handgraaf en kiu li forveturis kun Cornelis Grijpskerk, tiu aŭto ja devas stari ie, aŭ esti postlasita ie, ĉu? Telefonu morgaŭ frumatene al la oficejo de atestiloj pri enmatrikuligo, depostulu tiun aŭtan atestilon pri enmatrikuligo kaj demandu pli detalajn eksterordina-

recojn pri la aŭto kaj forsendu serĉopeton al la mondo, pere de telekso aŭ io alia.»

Vledder ridis pri lia rimarko.

«Eble la Mercedeso staras sur parkejo de *Schiphol*[4].»

De Cock kapneis.

«Tiel for ili ne venis. Kiam vi ĉi-posttagmeze kunvenis al la nekropsiejo, mi telefonis al *Schiphol*. Handgraaf kaj Grijpskerk ne enskribiĝis.»

Vledder surprizite rigardis lin.

«Se Handgraaf intencis iri al Ĉinio kun Grijpskerk, li povus fari tion ja nur aviadile, ĉu ne?»

De Cock ŝultrumis.

«Krom *Schiphol* ankaŭ estas aliaj flughavenoj ekde kie oni povas forflugi.»

La maljuna detektivo oscedis. «Bonvolu konduki min hejmen. Jam malfruas. La varma ĉokoladlakto bongustos al mi. Mi estas preskaŭ elĉerpita.»

«Vi devas manĝi ion, De Cock. Vi malsategas, ĉu ne?»

De Cock ne reagis kaj dum tempo ili plue veturis silente.

Kiam Vledder haltis apud la domo de De Cock, la maljuna detektivo mallonge rigardis supren.

«Ĉu vi aŭdis mian konversacion kun la kuracisto Den Koninghe en la nekropsiejo?»

Vledder kapneis.

«Mi okupis min pri la dokumentoj de la viktimo. Kio okazis?»

---

[4] Flughaveno ĉe *Amsterdam*

De Cock mordis sian malsupran lipon.

«La kuracisto Den Koninghe starigis al mi demandon, kiu okupas min ekde tiam.»

«Kion li demandis?»

De Cock grimacis.

«Kiel oni povas trankvile dronigi plenkreskan viron en banujo?»

# 10

La malalta nubkovraĵo kovris la malnovan urban centron de *Amsterdam* kaj envolvis la pintojn de la multjarcentoldaj fasadetoj en griza nebulo. Nur la kalendaro indikis, ke jam ekde pluraj semajnoj alvenis printempo. La vetero certe ne montris tion.

Ekde la stacidoma placo, kie li eltramiĝis, De Cock preterpasis la Viktoria-hotelon al la larĝa trotuaro de *Damrak*. Li iom supren tiris la kolumon de sia pluvmantelo kaj puŝis sian malnovan feltan ĉapelon antaŭen. De sub la kurba rando li rigardis la malgajajn vizaĝojn kiuj preterpaŝis lin.

Malvigla pluveto ŝajnis forlavi ĉiun ĝojon el la homoj. Ankaŭ la purigita *Beurs van Berlage*[1] partoprenis en la malbonfarto kaj montris kelkajn malhelajn makulojn sur siaj pluve trempitaj muroj.

La griza detektivo mem estis en bona humoro. Kvankam la dekoro kaj la homoj ĉirkaŭ li ŝajnis deprimitaj, en lia koro pulsadis fluoj da sentoj pri brilanta printempo.

Mallonga, sed intensa nokta ripozo refreŝigis ankaŭ lian menson. Li sentis sin freŝa kaj povis rezisti ĉian malbonon kiun sendube ĉi tiu tago denove portus al li. Antaŭ ol ekdormi li igis siajn pensojn reflekti pri la malkovro de murdo al Cornelis Grijpskerk.

Estiĝis sinsekvo de bildoj kaj impresoj. Kvankam en la plej multaj okazoj li rimarkis en si mem senti intensan emocion kun la makabra fatalo de la viktimoj, la murdoj al Grijpskerk kaj Handgraaf apenaŭ tuŝis lin emocie. Dum serĉo klarigi tiun fenomenon li endormiĝis ekronke.

[1]Borso de Berlage, laborborso iama
en.wikipedia.org/wiki/Beurs_van_Berlage

Apud *Oudebrugstraat* li staradis momenton kaj tiam transiris la vojon de *Damrak* per komika troto antaŭ sturmanta tramo de linio 9. Dum li ankoraŭ malrapide anhelis sur la trotuaro antaŭ la Ŝipistoborso, li ĝentile levis sian ĉapeleton kiel salutilon al juna putino kiu ŝanceliĝis preter li sur siaj tro altaj kalkanumoj.

En *Warmoesstraat* li staradis antaŭ la nefermita pordo de la policejo. Momenton li konsideris ne eniri sed iri pli malproksimen ...kien ne gravis. Tutan tagon antaŭ si... tuta tago sen krimo ŝajnis al li esti alloga perspektivo. Aliflanke li ne volis pensi pri la tago kiam li vere povos organizi siajn tagojn tiel kiel li volos kaj dediĉos sin al siaj hobioj, kiujn li nun havis nur en siaj pensoj ...pentrado, farado de mozaiketoj... Eble li realigu sian knaban revon kaj konstruu fervojan traketon en la ĝardeno. Ĉio ĉi daŭris ne multe pli ol kelkajn sekundojn... jam li venkis la allogan diableton.

En la portalo de la policejo li entuziasme joviale mansalutis al Jan Rozenbrand, kiu sidiĝis malantaŭ la balustrado. La gardokomandanto ne vidis tion. Lian atenton kaptis bandaĉo de moviĝemaj viroj gestantaj per strangaj gorĝaj sonoj kaj impresaj liphararoj.

Prifajfante la scenon, la maljuna detektivo aliris per la ŝtuparoj la duan etaĝon. Kiam li eniris la grandan esplorĉambron li renkontis Vledder malantaŭ lia komputilo. La juna detektivo kolere levis siajn okulojn.

«Vi malfruas.»

Sonis kiel puno.

De Cock ĵetis sian ĉapeleton al la vesthokaro kaj mal-

trafis.

«Linio 13 malfruiĝis.»

«Por vi» grumblis Vledder, «ĉiam linio 13 malfruiĝas.»

De Cock prenis sian falintan ĉapelon, demetis sian pluvmantelon kaj sidigis sin fronte al sia juna kolego.

«Tio estas la ĉarmo de linio 13,» li reagis ridante. «Vi foje provu. Kien ajn vi entramiĝu... ĉiam estas surprizekskurso.»

Vledder murmuris.

«Tion mi lernis de vi, De Cock: Kiel viro umas vespere, tiel li umas matene.»

«Tre bone Dick, kaj memoru pri tio. Sed permesu al mi kelkfoje kroman liberhoron. Mi ja iom alkutimiĝu...»

«Ha, pro via pensiiĝo, vi volas diri. Sed tiu estas ankoraŭ sufiĉe for. Mi jam estas laboranta ĉi tie dum pli ol unu horo. Mi jam parolis kun doktoro Rusteloos telefone.»

De Cock interrompis lin. «Je kioma horo okazos la nekropsio?»

«Ĉi-posttagmeze je la dua.»

«Petu de doktoro Rusteloos fundan toksikologian ekzamenon.»

«Ĉu? Kial?»

De Cock malespere gestis. «Mi pensis, ke vi tion jam komprenis.»

Vledder ne reagis.

«Cetere», li flegme daŭrigis, «ĉi-matene jam antaŭ la naŭa horo komisaro Buitendam staris antaŭ mia skribotablo. Li ankoraŭ surhavis sian pluvmantelon. La viro klare estis malbonhumora. Li demandis kie vi estas.»

De Cock kaŝridis. «En linio 13.»

Vledder agace mansvingis.

«Ĉesigu tiun sensencaĵon. Tiu viro ne scias kion signifas linio 13. Laŭ mi Buitendam ankoraŭ neniam vojaĝis per amsterdama tramo.»

De Cock denove kaŝridis.

«Mi povas tion rekomendi al li. Vojaĝo per amsterdama tramo estas speciala sperto. Komparebla kun kermesa ondo-trajneto.»

Vledder ĝemis.

«Vi devas senprokraste iri al li.»

De Cock apogis sin sur la rando de sia skribotablo per siaj kubutoj kaj ripozigis la mentonon en la kuveto de siaj manoj.

«Pro kio», li moke demandis, «tiu severa sen-pro-kraste?»

Vledder mangestis malkontente.

«Kio okazas al vi ĉi-matene?», li kriis kolere. «Vi prefere restu for.»

De Cock palpis sian nazon.

«Dum momento mi konsideris tiun eblon. Sed mi ankoraŭ ne povas manki al vi.»

«He, he, amuze!», diris Vledder mansvinge. «Komisaro Buitendam volas vaste informiĝi pri tiuj du religiemaj murdoj.»

De Cock forprenis siajn kubutojn de la skribotablo kaj komforte sidiĝis denove. «Kion Buitendam diris?» subite li plenatente demandis.

«Kiaj murdoj?» Vledder ŝultrotiris.

«Religiemaj murdoj.»

«De kie li prenis tiujn sensencaĵojn?»

Vledder mangestis al la pordo. «Iru kaj demandu lin.»

Komisaro Buitendam, la altstatura, majesta estro de la policejo en la amsterdama *Warmoesstraat*, mansignis per svelta mano.

«Envenu, De Cock,» li afekte parolis, «kaj eksidu.»

Bonhumore li forlasis la skribotablon kaj mansignis ĝentile kaj invite al la ŝtalmeblaj sidlokoj apud la fenestro, kie la komisaro akceptis nur siajn elstarajn gastojn.

La grizhara detektivo ekmienis malobeeme: malafable kaj nealireble. La pliproksimiĝon de sia ĉefo li plejofte arogante malakceptis. Jam plurjare li havis eksplodemajn rilatojn kun la komisaro. De Cock volonte tion firmtenis, timante enmiksadon en sian esplormetodon.

«Se ne ĝenas vin… mi preferas stari.»

La pala vizaĝo de la komisaro iom ekruĝiĝis.

«Kiel vi volas.»

Buitendam reiris al sia skribotablo kaj iom rigidete eksidis.

«Ĉi-frumatene», li prudente ekparolis, «nia ŝtata prokuroro, magistro Medhuizen, telefonis al mi.»

De Cock sulkis la brovojn kaj mallonge grumblis.

«Kial?»

«Majstro Medhuizen timas seriozan tumulton en religiaj rondoj.»

De Cock montris surprizon.

«Ĉu problemoj? Ĉu en religiaj rondoj?»

Buitendam kapjesis.

«Ĉu vi vidis matenan gazeton hodiaŭ matene?»

De Cock kapneis.

«Mi ne povis reveni hejmen de la laboro ĝis iomete

post noktomezo hieraŭ. Post dua akva korpo, kaj preskaŭ certe dua murdo, mi ne povis ekdormi rapide. Ĝi daŭre bruis en mia kapo. Pasis almenaŭ tri horoj antaŭ ol mi finfine endormiĝis. Ĉi-matene mi ankoraŭ estis tro dormema por enprofundiĝi en la taga mizero.»

Buitendam suspiris.

«Nia prokuroro klarmense vekiĝis hodiaŭ matene. Li scivolis, de kie venis la polica kaŝinformo.»

De Cock sulkis la brovojn.

«Ne freneziĝu! Kiu kaŝinformo?»

Buitendam malfermis tirkeston en sia skribotablo, prenis ĵurnalon el ĝi kaj metis ĝin antaŭ lin.

«Kiu religia grupo en nia lando,» li legis per afekta voĉo, «mortigas siajn elstarajn membrojn per makabra dronigo?»

De Cock nekredeme rigardis la komisaron.

«Ĉu tio legiĝas tie?»

Buitendam turnis la paĝon kaj puŝis ĝin al De Cock.

La maljuna detektivo prenis la matenan gazeton kaj legis la grasan tekston sur la unua paĝo. Li remetis la ĵurnalon kaj frapis ĝin per la plata mano.

«De kie venas tio ĉi?»

Komisaro Buitendam levis la ŝultrojn.

«Sinjoro Medhuizen, nia prokuroro, same ŝatus scii tion. La artikolo ankaŭ diras, ke jam dufoje estis prenita el la akvo de *Keizersgracht* kadavro, kiu simbolas preĝan pozicion… kun la manoj kunmetitaj sur la brusto.»

De Cock etendis siajn brakojn.

«Ĉu tio ja ne estas io speciala? Ĉe preskaŭ ĉiuj mortintoj la manoj estas faldataj sur la brusto antaŭ la entombigo aŭ kremacio. Tio estas plurcentjaraĝa tradicio.»

Buitendam fikse alrigardis lin.

«Tio ne estas la sama, De Cock. Homoj kiuj enakviĝas, ne faldas la manojn surbruste. Tion vi bone scias.»

La maljuna detektivo kapjesis.

«Komisaro,» ekis De Cock pedante, «kion vi verŝajne ankoraŭ ne scias... la fingroj de la falditaj manoj de ambaŭ viktimoj estis fiksitaj per forta kontaktgluo. Do mi estas konvinkita ke ambaŭ viktimoj estas murditaj kaj nur post la murdo estas forĵetitaj en la akvon de *Keizersgracht*.»

Buitendam fingromontris al la matengazeto.

«Preskaŭ certe murditaj de anoj de religia sekto al kiu ambaŭ viktimoj apartenis.»

De Cock larĝe rikanis.

«Kiu pretendis tion?»

Denove la komisaro montris sian gazeton. «Jen tio legiĝas.»

«Sensencaĵo.»

Buitendam rektigis sian dorson. «Kiam vi parolis kun la ĵurnalistaro?»

De Cock sentis kiel la furiozo ekboligas la sangon en liaj vejnoj.

«Mi ne alparolis la gazetaron,» li fulme reagis. «Tion mi faras neniam! Tio ne estas mia tasko. Mi ĉiam detenas tiun fi-gazetaron forege de mi. Ofte tiuj ĵurnalistoj ne estas fidindaj. Tial ja ni havas specialan departementon "gazetarservo" en la ĉefoficejo.»

Buitendam tiris la ĵurnalon al si.

«Iu do klaĉis. Tiu ĵurnalartikolo ne estas sensencaĵo. La ĵurnalisto kiu skribis ĉi tion, ja devas esti informita.»

De Cock obeeme kapjesis.

«La faktoj ĝustas pli-malpli, sed mi neniam ligis tiujn faktojn al religia grupo.»

«La ideo, ke sekta movado mortigas siajn proprajn membrojn – ial ajn – kaj enakvigis ilin kun kunmetitaj manoj, estas absurda.»

Komisaro Buitendam montris la telefonon sur sia skribotablo.

«Responde al la raporto en la matena gazeto, multaj religiaj grupoj jam kolere reagis, kaj ĉe mi kaj ĉe la justicaj aŭtoritatoj.»

«Kaj?»

«Ili postulas esploron.»

De Cock kunpremis la pugnojn. Liaj ungoj premiĝis en la manplaton de liaj manoj.

«Al kiu… al kio?»

Buitendam etendis sian manon al li.

«Al vi!»

De Cock rigardis lin konsternita.

«Ĉu al mi?»

Buitendam kapjesis.

«Al vi.»

De Cock ridetis malĝoje, li ne plu sentis sin tiel bone kiel antaŭ duonhoro. Se nur li atentus la impulson ignori la oficejon. Li mallonge skuis la kapon. Poste li demandis: «Kial?»

Buitendam frapis per sia pugno sur la ĵurnalon.

«La detaloj de ĉi tiu makabra artikolo laŭ tio estis donitaj de vi.»

De Cock sulkis pensajn liniojn en sia frunto.

«Ĉu tio legiĝas tie?»

Nekredemo tremis en lia voĉo.

«Vi estas listigita kiel la informanto de la datumoj. Detektivo De Cock, per co-o-co-ko, de la agentejo *Warmoes-*

*straat*, kiu gvidas la esploron.»

La maljuna detektivo montris al la gazeto kun ludeme malĝoja vizaĝo.

«Tio ne estas klaĉgazeto, ĉu ne?»

«Ĉi tio estas respektinda matena gazeto.»

«Kiel eblas?»

La maljuna detektivo profunde suspiris.

«Ĉu mi ne povas plendi kontraŭ tiu ĵurnalisto?»

Buitendam ignoris la komenton.

«Viaj akuzoj devos esti esploritaj ĉiuokaze.»

De Cock svingis la manojn kunpremitajn en pugnojn.

«Ke iu freneza ĵurnalisto,» li diris pasie, «interpretas la faktojn rilate ĉi tiujn du murdojn en maniero, kiu malobservas la integrecon, ĝustecon kaj sincerecon de iuj religiaj grupoj, estas tute krime. Tia danĝera viro estu forigita de la posteno.» La maljuna detektivo klinis sin al komisaro Buitendam.

«Sed ke tiu sinjoro Medhuizen, nia prokuroro,» li diris, levante la voĉon, «kaj mia propra komisaro ne volas ekskludi la eblon, ke mi estu ĉe la origino de tiu krimo, montras mankon de kompreno kaj fido.»

La griza detektivo malstreĉis siajn kurbajn fingrojn.

«Mi ne esprimas suspektojn, kiujn mi ne povas pravigi, kaj certe ne kontraŭ ĵurnalistoj. Mi ne fuŝas mian laboron kaj mi ne faraĉas. Mi esploras … mi ser-ĉa-das. Mi serĉas la veron.»

Li paŭzis por profunde spiri.

«Kaj se al vi,» li daŭrigis, «kaj al prokuroroj, tio ne evidentiĝis post ĉiuj tiuj ĉi jaroj, mi komencas serioze dubi pri la lerteco kaj atentemo de nia estraro. Ankoraŭ pli malbone… ili estas, mi rimarkas, fakte absolute nekompe-

tentaj.»

Furioza komisaro Buitendam venis de malantaŭ sia skribotablo. Fajro flagris en liaj okuloj kaj liaj nazotruoj tremis. Li etendis sian manon al la pordo. «Eksteren!»

De Cock iris.

# 11

VLEDDER ATENTE rigardis De Cock, kiu enŝovis sin en la grandan esploran ĉambron kun la kapo klinita kaj la ŝultroj mallevitaj. La juna detektivo esploris la vizaĝon de sia pli aĝa kolego.

«Ĉu denove estis tia momento?», li demandis maltrankvile.

La griza detektivo paŝis malrapide pli proksimen kaj falis sur la seĝon malantaŭ sia skribotablo.

«Ĉiu diskuto kun komisaro Buitendam malsukcesas. Tiu viro estas tiel rigida, kaj li havas tiel malmultan komprenon pri nia laboro, do estis denove brua kverelo.» Vledder kapklinis.

«Pri kio estis ĉi-foje?»

De Cock suspiris.

«Iu sensaci-avida ĵurnalisto publikigis sur la unua paĝo de malnova kaj respektata matena ĵurnalo, ke laŭ la makabra maniero murdi Handgraaf kaj Grijpskerk enplektiĝas religia sekto.»

Vledder ridis.

«Kial? Mi volas diri, ĉu eĉ en sekta religia societo, devas esti iu serioza kialo por mortigi homojn?»

Tio sonis preskaŭ kiel ŝerco.

De Cock etendis siajn manojn.

«Neniu ideo. Pri la motivo oni ne skribis en tiu artikolo.»

Vledder skuis la kapon.

«Bedaŭrinde. Tiu sensaci-avida ĵurnalisto devus informiĝi pri tio, ĉu ne? Tio estas parto de lia laboro. Tio povus ŝpari al ni multan laboron. Ni ja povus bone plukonstrui sur tia motivo.»

De Cock grumblis.

«Handgraaf kaj Grijpskerk laŭdire apartenis al tiu sama societo.»

Vledder dande turnetis sian torson.

«Ĉu interna kverelo inter la anaro? Ĉu kreskanta diferenco de opinioj kulminis al mortkondamno aprobita de plimulto de la kredantoj?» li parolis kvazaŭ li voĉlegis komikan tekston.

De Cock rigardis lin ridetante.

«Bela hipotezo.»

«Ĉu ne eblas?»

De Cock kapneis.

«En krimliteraturo tiaj internaj mortkomdamnoj ne estas maloftaĵoj.»

«Mi ne volas kredi je tio,» rifuzeme diris Vledder.

«La religiaj preferoj de Grijpskerk kaj Handgraaf ne aperas eĉ mencie dum nia esploro.»

De Cock kunpremis siajn lipojn.

«Miaopinie la ruza afero estas, ke en tiu artikolo aperas aserto de la ĵurnalisto laŭ kiu la informoj pri ĉi tiuj religie nuancitaj murdoj venis de mi.»

Vledder rigardis lin nekredeme.

«Ĉu vere?»

De Cock kapjesis. «Jes, de mi.»

Vledder kaŝridetis.

«Vi ĉiam evitas tiujn ĵurnalkulojn kvazaŭ kontaĝan malsanon.»

«Reprezentantoj de pluraj religiaj grupoj opinias, ke asertoj kiujn nun oni atribuas al mi montras malrespekton al iliaj integreco kaj sincereco. Ili jam telefonis al Buitendam kaj postulas esploron.»

«Esploron kontraŭ kiu… kontraŭ kio?»

«Kontraŭ mi.»

Vledder skuis sian kapon.

«Vi ja neniam anoncis tian sensencaĵon?» li kriis ekscitite.

De Cock frotis la nukon.

«Sed Medhuizen kaj nia propra Buitendam ne konvinkiĝis pri tio.»

Vledder furioze reagis.

«Ili estas frenezaj.»

«Bedaŭrinde mi devas konsenti kun vi. Kiam mi akuzis la policajn kaj juĝajn aŭtoritatojn pri nekompetenteco kaj manko de kompreno, komisaro Buitendam forpelis min el sia ĉambro.»

Vledder ridis.

«Ne temis pri la unua fojo.»

«Kaj mi timas ĝi ne estis la lasta. Mi daŭre rezistas.»

«Ĝuste.»

La maljuna detektivo streĉis sian vizaĝon.

«Mi demandis min, kiel tiu ĵurnalisto povis interpreti la datumojn pri niaj akvokorpoj kiel religiajn murdojn.»

Vledder faris senhelpan mangeston.

«Ĝi estas, kompreneble, sensacia. La redaktoroj de tiu ĵurnalo estis kontentaj kaj la legantoj frandos tion.»

Aperis pensaj sulketoj en la frunto de De Cock.

«Verŝajne. Rimarkinde estas ke mi nun memoras, ke hieraŭ nokte Bram van Wielingen demandis min, ĉu ankaŭ Grijpskerk apartenas al sekta grupo.» Vledder reagis surprizite.

«Kiel li povis pensi tion?»

La mieno de De Cock serioziĝis kaj li daŭrigis penseme. «Tiun penson inspiris la prezento de la kadavro de

Grijpskerk, kiu similas al la pozo de la korpo de Handgraaf.»

Vledder kapjesis kompreneme.

«La manoj kunmetitaj sur la brusto.»

De Cock montris doloran mienon.

«Ĉiuokaze, la rilato inter religio kaj oferaĵo ĉiam estis granda ekde la origino. La ofero de homoj kaj bestoj al dio, je kiu ili kredis, troviĝas en la bazo de multaj religioj. Pensu pri la Biblia Abrahamo, kiu estis oferonta sian filon, se Dio ne estus interveninta ĝustatempe.[1]»

Vledder rigardis lin konfuzita.

«Ĉu vi pensas ke io de tiu sperto ankoraŭ postvivas en la hodiaŭa homo?»

De Cock ambaŭmane gratetis sian kapon.

«Evidente sur ĉi tiu tero», li diris rezignacie, «estas ankoraŭ sufiĉe da homoj kun primitiva pensokadro. Mi timas ke arkaikaj ideoj ankritaj en niaj genoj ne facile malaperos.»

Vledder rigardis lin demandeme.

«Ĉu pasintece la primitivaj homoj ankaŭ sciis pri miskondutoj?»

De Cock ridetis.

«Malpli. Certe multe malpli. Kiam la socioj daŭre plikompleksiĝis, ekestis ankaŭ pliaj bezonoj pri la kreado de normoj kaj valoroj, pri la reguligado de interhomaj rilatoj. Iom de tiu disvolviĝo mi spertis persone. Kiam mi eklaboris ĉe la amsterdama polico, nia tuta trafikleĝaro konsistis el dudek ses artikoloj. Nun ni jam preterpasis sepcent artikolojn kaj preskribojn. Kaj tio en periodo de malpli ol

[1] Vidu: Genezo 22:12

kvardek jaroj.»

«Mi konjektas ke la trafiko tiam per tiuj simplaj dudek ses artikoloj pli flue moviĝis ol nuntempe per tiuj sepcent kaj pli.»

De Cock konvinke kapjesis. «Tutcerte.»

La maljuna detektivo forlasis sian seĝon, treniris al la vesthokaro kaj kaptis sian ĉapeleton. Vledder sekvis lin.

«Kien vi iras?»

«Kien ni iras?» lin plibonigis De Cock.

Vledder ridis.

«En ordo. Kien ni iras?»

La detektiva oldulo pene surmetis sian pluvmantelon.

«Al *Duivendrecht*… por kondolenci vidvinon pro la perdo de sia edzo.»

En *Duivendrecht*, Vledder denove trovis lokon en la parkejo kontraŭ la bangalo de la familio Grijpskerk. La detektivoj eliris kaj ekiris laŭ la kahelita vojo al la ĉefa pordo. De Cock sonorigis la ding-dongon en la interno de la bangalo. Ankaŭ nun necesis nur kelkaj sekundoj antaŭ ol la enirpordo estis malfermita de sinjorino Grijpskerk. La maljuna detektivo dum momento lasis sian rigardon pretergliti laŭ ŝia figuro kaj denove konstatis, ke sinjorino Grijpskerk estas alloga virino.

Ŝi aspektis pala kaj ŝiaj helverdaj okuloj ne brilis. La vesto, kiun ŝi portis ĉi-foje, estis profunde nigra, kun nur malgranda blanka kolumo ĉirkaŭ la kolo.

De Cock maltrankvila demandis sin, ĉu ŝi jam estas informita pri tio kio okazis al ŝia edzo. Li fervore esperis, ke ŝi ne legis la artikolon en la fifama matena gazeto.

Sen demandi ion ŝi tenis la pordon malfermita por la detektivoj kaj kondukis ilin al la ledaj foteloj apud la kameno. De Cock metis sian malnovan ĉapelon apud si sur la grizan ŝtonan plankon.

«Ĉu vi jam aŭdis de via edzo?», li malfermis atente.

Sinjorino Grijpskerk kapneis. «Nek lingvon nek signon,» ŝi suspiris. «Post kiam mi aŭdis de vi, kio okazis al Victor Handgraaf, mi tre maltrankviliĝis. Mia edzo estis en lia kompanio, ĉu ne?»

De Cock kapjesis. «Fakte. Vi vidis tiujn du veturi for en la Mercedeso de Handgraaf.» Sinjorino Grijpskerk profunde enspiris.

«Mi provis akiri informojn. Mi sentis min tiel senpova. Mi kontaktis la oficejon de la Fondaĵo ĉe *Keizersgracht* kaj demandis pri Derek van Achterdiep.»

«Kaj?»

«Van Achterdiep ne estis tie kaj neniu en la oficejo sciis kiel atingi lin. Ankaŭ li ŝajnis malaperigita de la tero.»

«Strange.»

Sinjorino Grijpskerk kapjesis. «Post senfina telefonado mi finfine sukcesis atingi sinjorinon Van Achterdiep.»

Sinjorino Grijpskerk malgaje skuis la kapon. «Ŝi ne sciis, kie estas ŝia edzo. Matene li estis forlasinta la hejmon kaj ne plu aŭdigis de si dum la cetero de la tago. Ŝi zorgumis pri li.»

De Cock duonfermis siajn okulojn. «Je kioma horo estis tio?»

«Kion vi celas?»

«Je kioma horo vi atingis ŝin telefone?»

Sinjorino Grijpskerk etendis la manojn. «Ĉirkaŭ noktomeze.»

«Ĉu ŝi ankoraŭ ne dormis?»

Sinjorino Grijpskerk kapjesis. «Same kiel mi... atendante la hejmenvenon de la edzo.»

De Cock opiniis ke li ne plu rajtas silentadi. Lia vizaĝo pliseriozigîis.

«Via zorgemo estis prava,» li diris sombrece.

Sinjorino Grijpskerk senemocie rigardis lin.

«Kion do vi volas diri per tio?»

De Cock iom mallevis la kapon. «Preskaŭ samloke de kie ni elakvigis la korpon de Victor Handgraaf, ni hieraŭ sekurigis la korpon de via edzo.»

Sinjorino Grijpskerk glutis momenton.

«Ĉu morta?»

De Cock kapjesis. «Verŝajne mortigita sammaniere kiel Victor Handgraaf.»

«Ĉu murdita?»

Cock denove kapjesis. «Ni ankoraŭ ne scias kiamaniere... Verŝajne per dronigo.»

La maljuna detektivo elfoteliĝis, paŝis al ŝi kaj premis ŝian manon.

«Mi vin kondolencas pro la perdo de via edzo,» li solene parolis.

«La trista mesaĝo estis laŭ mi sufiĉe grava por alporti al vi persone, antaŭ ol vi ekscius lian morton alimaniere.»

Vledder ekstaris kaj sekvis la ekzemplon de De Cock. Silente li reeksidis. Sinjorino Grijpskerk profunde suspiris.

«Mi devas diri al vi, ke la novaĵo eĉ ne ŝokas min. Ne vere. Mi jam certis pri lia morto, kiam vi rakontis al mi, kio okazis al sinjoro Handgraaf.»

De Cock sidiĝis ree en sian fotelon kaj iomete klinis

sin al ŝi. «Via edzo kaj sinjoro Handgraaf certe estis mortigitaj de la sama viro aŭ virino. Nia tasko estas senmaskigi la kulpulon. Mi esperas, ke vi permesos al mi starigi al vi ankoraŭ kelkajn demandojn?»

Sinjorino Grijpskerk kapjesis kun malgaja vizaĝo.

«Kvankam la identeco de la kriminto,» ŝi diris mallaŭte, «min ne interesas, mi plene komprenas, ke vi devas plenumi vian laboron.»

Vledder surpriziĝis, ke la virino ne ekploris post la terura novaĵo, sed restis tiel trankvila. Konsternita de timo, eble. Li tre admiris ŝian regatan reagon.

De Cock denove kliniĝis malantaŭen en sia fotelo.

«Ĉu via edzo estis religia?»

«Vi volas diri, ĉu li iam iris al preĝejo?»

De Cock ridetis.

«Ĉu li penadis por religia kredo?»

Sinjorino Grijpskerk kapneis. «Mia edzo opiniis, ke kredo estas sensencaĵo. Li ankaŭ pensis, ke la vivo post la morto estas sensencaĵo.»

«Ĉu vi iam parolis kun li pri tio?»

Sinjorino Grijpskerk kapjesis.

«Jes. Miaj gepatroj estis reformitaj. Strikte religiemaj homoj.»

«Ĉu vi scias ion pri la religiaj kredoj de sinjoro Handgraaf?»

Sinjorino Grijpskerk denove skuis la kapon.

«Tio neniam estis menciita. Mi scias nur, ke la edzino de Handgraaf estis mortinta kaj ke li havas filinon, kiu fariĝis drogulino.»

«Willemijn,» diris Vledder, kaj en sia menso li vidis la duonnudan knabinon en tiu malpura subtegmenta ĉam-

bro.

Sinjorino Grijpskerk levis la ŝultrojn.

«Mi ne scias ŝian nomon. Mi nur aŭdis, ke ŝi ne plu estas regebla hejme kaj ke Handgraaf metis ŝin ekster la domon.»

De Cock kapjesis.

«Ni parolis kun ŝi.»

Li rigardis Vledder dum momento, poste faris mallongan paŭzon.

«Dum nia antaŭa vizito,» li daŭrigis, «vi diris al ni, ke via edzo estis tre fermita... retiriĝema. Ne malfermita libro, por tiel diri.»

«Ne.»

«Sed krom la komercaj diferencoj inter li kaj Handgraaf, ĉu ne estis iuj temoj pri kiuj li maltrankviliĝis... pri kiuj li eble parolis al vi?»

Sinjorino Grijpskerk rigardis penseme dum kelka tempo, poste ŝi sidiĝis pli rekte.

«Antaŭ kelkaj monatoj, iun vesperon li revenis hejmen kontraŭ sia naturo tute ekscitita. Mi demandis, ĉu io okazis.»

«Kaj?»

«Li diris, ke lin aliris viro, kiu petis monon de li.»

«Ĉu monon?», demandis Vledder. Sinjorino Grijpskerk kapjesis.

«Por malsana filino.»

De Cock rigardis ŝin nekomprenante. «Ĉu malsana filino?»

«La malsano de tiu filino ne povis esti kuracata en nia lando. Por tio, ĉi tie ne estis kuracaj rimedoj. Por tio ŝi devis iri al kliniko aŭ hospitalo en Usono kaj la patro ne

havis la monon por tio.»

De Cock sulkis sian frunton.

«Kial tiu viro kontaktis *ĝuste* vian edzon por kontribuo? Ĉu estis rilato inter via edzo kaj la patro de tiu malsana filino?»

Sinjorino Grijpskerk levis la ŝultrojn.

«Mi ne havas ideon.»

«Ĉu vi ne demandis lin?»

Sinjorino Grijpskerk faris senhelpan geston.

«Eble mi ja demandis lin. Sed mi neniam ricevis respondon al tiu demando.»

# 12

La detektivoj en sia malnova Golfo forveturis el *Duivendrecht*.

Obtuza, akveca suneto trapikis la frontan fenestron. Ili ne rimarkis tion. Ambaŭ silentis, enprofundiĝintaj en pensa torento. Estis la juna Vledder kiu post iom da tempo interrompis la silentadon. Li rigardis flanken.

«Ja estas klare,» li penseme parolis. «La rakonto en la matengazeto de tiu vojperdinta kaj plene fuŝa ĵurnalisto tute ne taŭgas. Simple skandalfranda gazeto. Cornelis Grijpskerk, kiel evidentiĝas el la atesto de sia edzino, konsideris religion nur arlekenaĵo. Ankaŭ ŝajnas al mi, ke la viktimo tute ne estas viro kiu lasas sin kapti de iu sekta religia konvinko.»

De Cock kapjesis.

«Vi pravas. Tia li ne estas.» Momenton li silentis. «Mi ja scivolas pri la identeco de la viro kiu petis monon de Cornelis Grijpskerk por sia morte malsana filino.» Vledder nazblovis.

«Malsanega filino,» li parolis malestime, «kiu en nia propra landeto ne povas esti traktata, sed eble ja povas travivi per traktado en malsanulejo aŭ kliniko en Usono. Fakte ankaŭ Willemijn Handgraaf estas morte malsana.»

Deflanke De Cock rigardis lin.

«Jen propra kulpo. Sed kion vi opinias?»

Vledder senpripense suprentiris la ŝultrojn.

«Mi konsideras ĝin firuzaĵo. Jes, tio devas esti montrompa truko, sentimenta klopodo.»

«Ĉu vi pensas?»

Vledder kapjesis.

«Mi ne vidas multe pli en ĝi. Trista rakonto pri povra mortmalsana filino ĉiam elvokas malfacilaĵon. Tia afero

ĉiam kaŭzas profundajn sentojn de kompato ĉe homoj.»

«Ĉu eble,» daŭrigis la juna detektivo, «tiu ruza patro sciis, ke Cornelis Grijpskerk estas pli-malpli riĉa viro, eble preta por doni al li kelkajn kromenspezojn?»

De Cock faris dubeman mienon.

«Tio estas tro simpla por mi,» li diris, skuante la kapon. «La reago de Cornelis Grijpskerk estis emocia... tiel emocia, ke sinjorino Grijpskerk ankoraŭ memoras tiun okazaĵon monatojn poste.»

Vledder faris repuŝan geston.

«Ĝi ne tiom impresis ŝin, ĉu ne? Ŝi ne petis pliajn detalojn.»

La juna detektivo paŭzis.

«Kiom utilas la identeco de tiu patro?», li daŭrigis, iom haste.

«Neniom. Absolute neniom. Kiel vi volas ligi lin kun la murdoj de Victor Handgraaf kaj Cornelis Grijpskerk?»

«Devas esti io, kio pelas la kriminton,» streĉe kriis De Cock.

«Devas esti motivo por la du teruraj murdoj. Se oni konsideras la bizaran akompanaĵaron... ŝuaj laĉoj ligitaj, manoj kunmetitaj, fingroj kungluitaj... ni vere ne konfrontas idioton. La murdoj estas bone preparitaj.»

Vledder suspiris.

«Willemijn Handgraaf havis motivon.»

«Pro sia patro,» De Cock respondis malafable.

«Kompreneble. Sed kiel plu? Kiel vi atribuas al la bela Willemijn motivon por la murdo de Cornelis Grijpskerk, viro, kiun ŝi probable eĉ ne konis kaj kun kiu, laŭ nia scio, ŝi neniam havis kontakton?»

Vledder ne respondis.

La maljuna detektivo rigardis sian brakhorloĝon.

«Ni ankoraŭ havas iom da tempo antaŭ ol vi devos esti ĉe *Westgaarde* por la justica nekropsio. Mi volas iri al la cigarbutiko de Arnold van Heusden en *Oude Hoogstraat*.»

Vledder sulkis la brovojn.

«Kial?»

«Mi volas scii ĉu lia juna haŝiŝamiko jam estas retrovita kaj ĉu li ankoraŭ volas kaŝi sian identecon antaŭ ni.»

Vledder fine trovis akcepteblan parkumejon por la malnova Golfo en *Kloveniersburgwal*, proksime al *Spinhuissteeg*. La detektivoj promenetis malrapide al la mallarĝa *Oude Hoogstraat*.

Arnold van Heusden staris malantaŭ la vendotablo de sia malgranda cigarvendejo kaj ekrigardis surprizite kiam De Cock kaj Vledder neatendite enpaŝis ĝin. Liaj helverdaj okuloj flagretis kaj larĝa rideto aperis sur lia vizaĝo. «Kio donas al mi la plezuron de via alveno?», li demandis iomete moke.

La mieno de De Cock serioziĝis.

«Ni opinias, ke ni devus informi vin pri la progreso de nia enketo.»

La maljuna detektivo ĉirkaŭrigardis.

«Ĉu alvenanta klientaro povas ĝeni nin ĉi tie?»

Van Heusden kapjesis. Li eliris de malantaŭ la vendotablo, marŝis al la antaŭa pordo de la butiko kaj ŝlosis ĝin.

Poste li kondukis la detektivojn en malgrandan ĉambron malantaŭ la butiko. Li gestis al pimpe aranĝita tablo ĉirkaŭita de kvar kanaj seĝoj.

«Sidiĝu. Mi ne havas multan spacon ĉi tie. Unu dor-

moĉambron kaj malgrandan faciluzeblan kuirejon. Mi ja ne bezonas pli. Mia tuta stoko estas en la butiko.»

Vledder kaj De Cock sidiĝis ĉe la tablo. La kana seĝo de De Cock terure knaris. Vledder esperis, ke la seĝo ne cedos sub la pezo de lia kolego. Ĝi tute detruus la seriozecon de ilia vizito. Sed ankaŭ la plej putra ŝtuparo en la malnovaj amsterdamaj konstruaĵoj kiujn ili kune vizitis, eltenis la pezon de De Cock ĝis nun. Eble estontece li ne devus grimpi tiujn ŝtuparojn tiel proksime malantaŭ sia maljuna kolego. Li mallonge grimacis ĉe la penso, kio iam povus okazi.

Van Heusden sidiĝis kontraŭ ilin. Li rigardis siajn vizitantojn esplorcele. «Progresoj... ĉu estas jam?»

De Cock kuntiris siajn lipojn kaj malklare balancis la kapon.

«Nerekte, pozitivsence. Ni kaptis duan viktimon el la akvo de *Keizersgracht* hieraŭ nokte. Konsidere la cirkonstancojn, ni estas konvinkitaj ke ambaŭ viroj estis mortigitaj en identa maniero. Atentu... de la sama krimanto.»

Timigite la cigarvendisto alrigardis lin.

«Tio estas terura. Kiu... hm, kiu estas tiu dua viktimo?»

De Cock suspiris.

«Alia altranga membro de la Fondaĵo ĉe *Keizersgracht*. Cornelis Grijpskerk.» Arnold van Heusden balancis la kapon.

«Mi ne konas.»

De Cock palpis sian nazon.

«Surbaze de tio,» li parolis senĝene, «ĉe ni kreskas la konvinko, ke Willemijn, malgraŭ sia spektakla propono de kvindek mil eŭroj, ne estas envolvita en la murdo de

sia patro.»

Van Heusden sulkis la brovojn.

«Tro drasta konkludo.»

De Cock kapjesis.

«Konsidere la staton de nia esploro, vi ne plu devas kaŝi al ni la identecon de via juna haŝiŝamiko.»

Van Heusden faris senhelpan geston.

«Mia juna amiko estas for. Tute malaperis de la surfaco de la tero. Mi jam raportis tion al vi. Li neniam aperis post tio.»

«Vi havas lian adreson, ĉu ne?»

«Certe, sed li malaperis el *De Pijp* tie.»

De Cock oblikve rigardis lin.

«Li loĝis en *De Pijp*, ĉu?»

Lia voĉo tremis pro surprizo.

Arnold van Heusden denove kapjesis.

«En ĉambreto, malpura, preskaŭ neloĝebla subtegmenta ĉambro en la Karel du *Jardinstraat*. Tiu kaĝo estas malplena. Restas ankoraŭ kelkaj ĉifonoj kaj aliaj postlasitaj rubaĵoj. Mi ankoraŭ estis tie lastatempe. Ankaŭ la ulineto kun kiu li vivis, tiu Willemijn, malaperis.»

De Cock klinis sin al li. «Ĉu vi iam renkontis tiun 'ulineton' lian?» li demandis ridetante.

«Unufoje. Mia juna amiko ne estis tie tiutempe. Mi trovis ŝin dormanta sur malpura duobla lito, kovrita per tavolo de ĉifonoj.»

«Vi vekis ŝin, ĉu?»

Arnold van Heusden kapjesis. «Mi volis ekscii de ŝi kie estas ŝia koramiko.»

«Vi ankaŭ rigardis ŝin avide, ĉu?»

«Avide?»

De Cock kapjesis. «Ĉu vi ne konas tiun koncepton?»

Van Heusden eksidis rekte. «Tiu, kiu rigardas virinon por deziri ŝin,» li diris, «jam adultis.»

De Cock rigardis lin surprizite. «Konata Biblia vorto.»

«Mi originas de kalvinisma familio,» diris Van Heusden kun rideto. «Miaj gepatroj jam frue tenis min sur la ĝusta vojo per Bibliaj Skribaĵoj.»

«Mi ne povas trovi racian motivon laŭ kiu Willemijn Handgraaf volus murdi tiun ĉi duan viktimon. Laŭ mi ŝi havas nenian intereson pri lia morto.»

«Kion tio signifas?»

De Cock gestis. Denove Vledder opiniis, ke estus pli bone por la seĝo, se De Cock restos tre trankvila. Ankaŭ De Cock rimarkis tion kaj metis la manojn sur la tablon.

Li silentis momenton.

«Efektive,» li daŭrigis, «la ulineto estis dezirinda. Vi pravas. Absoluta beleco. Aparte alloga. Volupta, kun preskaŭ besta seksa aspekto.»

De Cock ridetis. «Kaj via juna haŝiŝamiko,» li diris malrapide, «estas Laurens... Laurens van der Dungen.»

Arnold van Heusden duonfermis la okulojn.

«Ĉu vi denove arestis lin?»

De Cock balancis la kapon. Van Heusden etendis la manojn.

«Kien li iris kun tiu knabino?»

De Cock levis la ŝultrojn.

«Mi pensas, ke Willemijn Handgraaf verŝajne deprenis anticipan elpagon pri sia heredaĵo de la banko de sia patro kaj nun trovis vastan loĝejon kun via juna haŝiŝamiko.»

Ili senhastumis de la cigarbutiketo en *Oude Hoogstraat* returne al la *Kloveniersburgwal* kaj forveturis en sia policaŭto.

«De Cock», diris Vledder, «mi momenton pensis ke vi sinkos tra tiu kanseĝeto. Iam via pezo kaŭzos al ni akcidentojn.»

«Kial?» ekscitite demandis la maljuna detektivo.

«Kiam ni refoje devos supreniri tian putran ŝtuparon en konstruaĵaĉo, mi do atendos malsupre ĝis vi estos atinginta la supron. Vi faru iom da korpa ekzercado. Iom perdu kilogramojn. Prenu hundon.»

«Pri tiaj aferoj mi pensos nur post la pensiiĝo. Do nun nur silentu pri tio.»

«Ĉu ni reiru al nia 'Kit'?» Vledder leĝere demandis por ne plu malspriti pri la pezo de sia mentoro. De Cock kapjesis.

«La tempo do alvenas nun por vi. Se vi ne volas atendigi doktoron Rusteloos, vi ja bezonas horeton.»

Vledder flanken rigardis.

«Mi pensas ke tiu juna mariĥuanamiko de Arnold van Heusden mistifikis lin la tutan tempon.»

De Cock skuis la kapon.

«Sed ne koncerne la financan agadon de sia amikinjo Willemijn pro la murdo de ŝia patro. Tio ĝustis.»

Vledder rigardis lin demandeme.

«Ĉu ni ne devas serĉi ŝin? Ŝi ja restas strangulino. Eble ŝi iel konis Cornelis Grijpskerk kaj eble ankaŭ li enkadriĝas en ŝia murdema plano.»

De Cock ŝultrotiris.

«Provizore mi ankoraŭ ne interesiĝas pri Willemijn.»

Vledder ridis.

Se Laurens van der Dungen pere de sia Willemijn ekde nun disponas pri multe da mono, tiam ni ĉiokaze liberiĝis de fifama multkrimulo.

De Cock gratis sian nukon. «Tiel longe daŭros mia malriĉeco.»

«Ĉu esprimo de via maljuna patrino?»

«Ekzakte.»

Ĉar Jan Rozenbrand, malantaŭ la registrotablo, ne havis por ili ĝenajn anoncojn, ili povis senĝene trairi la halon de la policejo ĉe *Warmoesstraat* kaj grimpi laŭ la ŝtonaj ŝtuparoj al la dua etaĝo.

Malrapide De Cock faris la paŝojn. Li malantaŭen rigardis momenton.

«Ĉi tie vi ne devas atendi malsupre, Dick,» li diris ridete.

En la granda detektiva ĉambro, Vledder trovis kelkajn raportojn sur la supraĵo de sia skribotablo.

Li ŝovis ilin al si kaj komencis legi. Bonhumore li rigardis supren al De Cock.

«Troviĝis la Mercedeso de Victor Handgraaf.»

«Kie?»

«Je la kvara etaĝo de la parkejo de *Bijenkorf*[1] ĉe *Beursplein*.»

«Kaj?»

Vledder plu legis. «La stampo sur la parkumadbileto trovita en la aŭtomobilo montriĝas de la dek-dua kaj du-

[1]Temas pri konata ĉiovendejo ĉe Dam-placo; *Beursplein* estas placo apud *Beurs van Berlage* en.wikipedia.org/wiki/De_Bijenkorf

ona horo.»

De Cock kunpremis sian frunton. «Tio estas duonhoro post la foriro de Handgraaf kaj Grijpskerk el *Duivendrecht*.»

Vledder metis la raporton antaŭ si. «Tiam ili verŝajne neniel intencis iri al Ĉinio.»

De Cock kunpremis la lipojn. «Aŭ,» li respondis penseme, «ili volis viziti iun antaŭ ol foriri.»

Vledder kapjesis. «Io aŭ iu proksime de la malnova centro.»

De Cock etendis la manojn. «Eble ili volis unue reiri al la oficejo de la Fondaĵo ĉe *Keizersgracht*. Certe dumtage tie preskaŭ neniam estas parkebleco.»

Vledder klinis la kapon. «Ĉu vi ne opinias, ke la distanco inter la parkejo ĉe *Beursplein* kaj *Keizersgracht* estas tro granda?»

De Cock skuis la kapon.

«Ne estas loko pli proksime por parki vian aŭton.»

La maljuna detektivo montris la duan raporton.

«Kio estas tio?»

«El la Krimmedicina Laboratorio en *Rijswijk*. Doktoro Rusteloos ŝajne transportigis sangon, urinon, partojn el la hepato kaj renoj, stomakan kaj intestan enhavon de Victor Handgraaf por ampleksa toksologia ekzameno.»

«Kion ĝi diras?»

Vledder skuis la kapon. «Atendu momenton... Mi ankoraŭ ne atingis la informon.»

La juna detektivo plu legas. «Tre alta dozo de iu substanco, gama hidroksibutirato, troviĝis en la kadavropartoj de Victor Handgraaf.»

De Cock sulkis la nazon. «Kio estis trovita? Diru ĝin

denove?»

Vledder faris senhelpan geston.

«Mi apenaŭ povas prononci la vorton. Laŭ ĉi tiu raporto, tiu aĵo ankaŭ nomiĝas Gama HidroksiButiratacido aŭ estas referata kiel GoHoBo. Ampleksa suplemento pri tiu GoHoBo enestas.»

Li daŭrigis la voĉlegadon.

«GoHoBo estas anestezilo uzata por dormigi elefantojn. La dozo necesa por la anestezo de elefanto estas kutime mortiga al homoj. Se vi trinkos GoHoBon en diluita formo, vi simple etendiĝos – venkite de neregebla dormo – kaj poste memoros nenion. Tion oni povas facile misuzi. GoHoBo povas esti aldonita sekrete en trinkaĵon. Viktimoj de tio ofte estas junaj knabinoj, kiuj poste estas seksperfortitaj. Pli altaj dozoj eĉ kondukas al komato. La aĵo ankaŭ nomiĝas 'seksperforta drogo' kaj estas en la listo II-a de la Opio-Leĝo.»

Vledder ĵetis la raporton sur sian skribotablon antaŭ si.

«Tio estas bona afero, ĉu?»

De Cock kliniĝis malantaŭen. «Ĉiosume,» li suspiris, «Victor Handgraaf estis narkotita.»

# 13

Ĉu drogita? De Cock svingis la manon. «Tutcerte! Per tiu aĉaĵo... tiu abomeninda GoHoBo.»

«Kial?»

De Cock larĝe rikanis.

«Laŭ mi tio estas superflua demando. Demando al kiu nur unu respondo eblas: por igi la viktimon sendefenda.»

«Sendefenda... vi celas tutpreta por la sekva traktado... nome: dronigo.»

«Ekzakte.»

Vledder frapis per sia montrofingro la raporton kiu kuŝis antaŭ li.

«Terure. Ĉu vi supozas, ke ankaŭ la dua viktimo, Cornelis Grijpskerk, estas drogita?»

De Cock lante kapjesis. «Mi emas supozi ke Victor Handgraaf kaj Cornelis Grijpskerk ambaŭ trinkis la saman trinkaĵon.»

Vledder suspiris.

«Iun de la mistera murdisto aŭ murdistino – vi ja ĉiam diras ke virinoj ŝatas uzi venenon – zorge preparitan, konsumaĵon.»

De Cock kapjesis.

«Trinkaĵon, ruze miksitan kun la treege perfida GoHoBo.»

La maljuna detektivo ekstaris de sia skribotabla seĝo, per malviglaj paŝoj pasumis al la vesthokaro kaj ŝovis sian malnovan ĉapelon sur la grizajn harojn. Vledder postsekvis lin.

«Kien vi iras?»

De Cock sin turnis al li.

«Mi kuniros.»

Vledder rigardis lin nekredeme.

«Ĉu al *Westgaarde* vi celas? Pro la nekropsio?»

De Cock skuis la kapon.

«Ne, tien mi vere ne plu emas iri», li malakcepte diris.

«Mi dum mia longa vivo serve de la polica esplorservo ĉeestis sufiĉe da nekropsioj. Mi konas la proceduron kaj scias kiel aspektas kadavro interne.»

Vledder ridetis.

«Vi tamen aktualigu la rutinon.»

De Cock neglektis la rimarkon.

«Mi volas ke vi, survoje al la nekropsiejo, ellasu min en *Vondelstraat*, apude de la parcelo 753a.»

«Kio troviĝas tie?», demandis Vledder.

De Cock surmetis sian surtuton.

«En *Vondelstraat* loĝas Derek van Achterdiep kun sia edzino. Ĉu vi memoras? Via voremulo, unu el la ĉefaj direktoroj de Fondaĵo Handgraaf. Mi volas scii ĉu intertempe li jam estas trovita.»

Vledder kuntiris la brovojn.

«Ĉu vi supozas, ke li malaperis?»

«Jes.»

«Ĉu ĉiame? Vi celas: murdita, ĉu?»

«Ekzakte.»

De Cock suprentiris la ŝultrojn.

«Tio eble tre verŝajnas. Se la murdinto volas entute senigi Fondaĵon Handgraaf de ĝia estraro, tiam la malaperigo de Derek van Achterdiep estas celkonscia ago.»

Vledder rigardis lin esplore.

«Ĉu vi konsideras la forigon de la estraro de Fondaĵo Handgraaf kiel motivon?» De Cock mangestis senhelpe.

«Kion alian mi pensu pri tio? Ekde la murdo al Victor Handgraaf mi serĉas kompreneblan motivon.... mi pro-

vas malkovri la agokialojn de la kriminto.» Vledder suspiris.

«Eble la edzino de Derek van Achterdiep povas iom klarigi la aferon al ni.»

«Tion mi ja esperas.»

Vledder iom oblikve tenis la kapon.

«Ĉu post la nekropsio mi denove venu al *Vondelstraat* por veturigi vin?»

De Cock kapneis.

«Mi ja reiros per la tramo al 'Kit'.»

La maljuna detektivo suprenlevis sian montrofingron.

«Se vi estos baldaŭ en *Westgaarde*, tiam danku la patologon, ke li estis tiom atentema mem pensi pri toksikologia esploro, kiam li dissekcis Victor Handgraaf.»

Vledder kapjesis.

«Mi faros. Tiam mi ankoraŭ ne pripensis tion,» diris De Cock pardonpetante. «Demandu doktoron Rusteloos kial li post la justica nekropsio ja pensis pri ebla narkoto.»

Vledder sulkis enpense sian frunton.

«Mi... hm, mi pensas,» li diris malaplombe, «ke mi ja scias la respondon.»

«Kaj?» La juna detektivo frapis sian manon kontraŭ la brusto.

«En la pulmoj de la viktimo li ne trovis malpuran akvon el la kanalo.» La okuloj de De Cock ekflagris.

«Tre bone, Dick,» li diris admire. «Tre bone. Tre inteligente. Sagace. Doktoro Rusteloos serĉis respondon al la demando kiel eblis, ke en kanala droninto la enpulma akvo estas tiel pura.»

Vledder ridetis.

«Kaj do li pensis pri narkoto antaŭe donita.»

De Cock profunde suspiris.

«Narkoti la viktimon antaŭ ol dronigi lin. Tio estas inteligenta konkludo de doktoro Rusteloos.»

Vledder rikanis.

«Ĉu dronigita en kranakvo?»

De Cock etendis siajn malfermitajn manojn antaŭen.

«Tiun analizon ni ankoraŭ ne havas.»

Post kelkaj horoj la maljuna detektivo rigardis Vledder enveni la detektivan ĉambron sufiĉe senzorge kaj kun gaja grimaco survizaĝe eksidi malantaŭ la skribotablon.

«Al Doktoro Rusteloos tre plaĉis via komplimento, ke li, kiel pataloganatomo, pensis pri la ebleco de narkotiĝo pli frue ol vi. "Ja, vidu: kiel ni, nekropsiistoj, tamen iel utilas", li reagis moke.»

De Cock ridetis lace.

«Kia estis ĉi-posttagmeze la nekropsio de la kadavro de Cornelis Grijpskerk?»

«Sensurpriza,» respondis Vledder. «Fidela kopio de la murdo al Victor Handgraaf.»

De Cock kompreneme kapjesis.

«Kunplektitaj manoj kaj glufiksitaj fingroj, kiel ni jam pensis, kaj pura akvo en la pulmoj, ĉu?»

«Ekzakte.»

«Por scii ĉu li same estis drogita per GoHoBo, ni devas ankoraŭ atendi.»

«Kaj por ampleksa toksikologia esploro la kutimaj kadavropartoj de Grijpskerk iros al la laboratorio en *Rijswijk* pere de doktoro Rusteloos. Normala proceduro.»

La juna detektivo klinis sin antaŭen.

«Ĉu vi ankoraŭ eltrovis ion dum via vizito al la edzino de Derek van Achterdiep?»

De Cock iom levis la ŝultrojn.

«Li estas for.»

Vledder sulkis la brovojn.

«Ĉu Van Achterdiep ankoraŭ ne superakviĝis?»

«Kadre de nia esploro tio ne sonu ridige, Dick. Ni diru, ke la edzino post lia foriro nenion plu aŭdis de li.»

«Ĉu ŝi ankaŭ ne scias kien li iris, ĉu li havis rendevuon kun iu, aŭ iun planon?» De Cock suspiris.

«Li foriris matene piede iom post la naŭa – sen eĉ murmura adiaŭo», ŝi diris. Lia aŭto, marko Mercedes, staras ankoraŭ parkita antaŭ la pordo. Okazis pli ofte ke li iris trame al la oficejo de la Fondaĵo ĉe *Keizersgracht*.

«Ĉu ŝi anoncis lian malaperon ĉe la policejo de sia distrikto?»

De Cock kapneis.

«Mi proponis al ŝi fari tion, sed tion ŝi ne volas... ankoraŭ ne. Ŝi estas absolute konvinkita ke ŝia edzo en la venontaj tagoj ree aperos.»

Vledder snufis.

«Se vi demandas min... vana penso. Mi pensas unualoke pri superakviĝo.»

De Cock ignoris la rimarkon. «Mi ankoraŭ informpetis pri la religia konvinko de Derek van Achterdiep.»

«Kaj kion ŝi diris?»

De Cock ridetis. «Antaŭ proksimume tridek jaroj sinjoro kaj sinjorino Van Achterdiep, inspiritaj de piaj pensoj, ja geedziĝis en la preĝejo, sed ĉu tiu beno establis la bazon de feliĉa geedziĝo, mi vere dubas.»

«El kio vi konkludas tion?», demandis Vledder.

De Cock ekmienis pensige. «Ŝi ne vere estis trista aŭ timema. Ankaŭ ne zorgoplena. Ŝi parolis sufiĉe sinreteneme pri sia edzo. Sen emocio. Mi eĉ ne unu fojon aŭdis ŝin mencii lian antaŭnomon.»

Vledder kaŝridetis.

«Sed ŝi estas konvinkita ke li ja superakviĝos, ĉu?»

De Cock seke rikanis.

«Ankaŭ mi.»

Vledder rigardis lin mire.

«Kial, ankaŭ vi»

De Cock kapjesis denove. Li rigardis sian brakhorloĝon, ekstaris de sia seĝo kaj iom ŝanceliĝante iris al la vesthokaro. Vledder postsekvis lin.

«Kien vi iras?»

De Cock gestis antaŭ si.

«Post mia trankviliga vizito al sinjorino Van Achterdiep mi aranĝis ion.»

«Kion?»

«Ni ŝipveturos.»

Vledder grimacis.

«Ĉu ŝipveturi? Vi verŝajne ne celas ke ni ekskursos tutan tagon, ĉu?»

De Cock ridetis.

«Ĉu vi volas ŝipveturi turiste? Tion vi ja faru en via propra tempo. Ne, ni ekveturos per ŝipo de la ŝtata surakva polico.»

«Kien?»

«Al la sinistra loko en *Keizersgracht* kie Victor Handgraaf kaj Cornelis Grijpskerk superakviĝis kun kunplektitaj manoj. Tie ni graplos.»

Vledder kapjesis, la nazon suprenlevita.

«Fetora laboraĵo, De Cock. Vi volas provi ĉu oni sukcesos superakvigi la kadavron de Derek van Achterdiep?»

Kiam De Cock, sekvakompanate de Vledder, enpaŝis la oficejon de la ŝtata surakva polico ĉe *Westerdoksdijk*, li ĵetis surprizitan rigardon al la altstatura viro kiu ekstaris de malantaŭ sia skribotablo.

«Rijpkema!», li kriis surprizite. «Hans Rijpkema.» La viro paŝis al li kaj kapjesis lante.

«Vi ankoraŭ ĉiam havas bonan memoron pri vizaĝoj», li konstatis trankvile. De Cock ridetis.

«Kaj pri nomoj,» li flatite reagis. «agrabla profesia deformiĝo.» La maljuna detektivo rigardis la viron plenatente dum kelkaj momentoj. Lia akra rigardo glitis de la volesprima mentono al la ŝtalbluaj okuloj.

«Vi bone aspektas,» la griza detektivo admire diris. Li skuis la kapon. «Hans Rijpkema,» li ripetis kun suspiro. «Mi ne sciis, ke vi ankoraŭ vivas.»

La longa viro rikanis. Per etenditaj fingroj li frotis tra siaj grizaj haroj, kiuj preskaŭ atingis liajn ŝultrojn.

«Se mi matene en la ĵurnalo ne vidas mian nomon inter la mortanoncoj, mi ĉiutage denove eklaboras kun infaneca plezuro.»

De Cock momenton rigardis lin, aŭskultis la tonon, sed plie ne reagis. Li montris antaŭ si.

«Ĉu vi konas Dick Vledder… la espero patruja… ekde longe mia neniam satlaŭdata helpanto kaj iam eble mia postsekvanto, ĉu?»

Vledder ridis malkomforte.

Rijpkema sulkis la brovojn.

«Ĉu li jam estis ĉe ni kiam mi foriris?»

«Mallonge post via foriro li venis ĉe nin.»

De Cock svingis ĉirkaŭ si.

«Kiel vi eklaboris ĉi tie? Mi ne sciis, ke vi aliĝis al la ŝtata surakva polico. Laŭ mia plej aktuala informo vi estis ĉe la ĉevaloj.»

«La Korpuso Tutlandaj Policservoj,» korektis Rijpkema. «Sekcio Vivantaj Havaĵoj.»

De Cock rikanis.

«Vi ja rajdis ĉevalon, ĉu ne?»

Hans Rijpkema ridis.

«Ĉevaloj ankaŭ apartenas al la vivanta havaĵo. Dum jaroj mi deĵoris tie kun plezuro, ĝis kiam mi ekhavis junan ĉefinon super mi en la estraro, kun kiu mi ne tiom bone povis rilati.»

De Cock kompreneme kapjesis.

«Tiam vi transiris de la ĉevaloj al la ondoj de la amsterdama akvoteritorio.»

«Antaŭ nelonge. Sed tio ne estas problemo. En la periodo kiam mi estis kun vi en *Warmoesstraat*, mi profunde ekkonatiĝis kun la kanala zono.»

«Vi do scias kie troviĝas *Keizersgracht*?»

«Blinde mi trovos.»

De Cock ridetis.

«Mi tamen preferus havi la okulojn malfermitaj.»

Per malgranda boato sen kajuto kaj kun grumbletanta motoro ili veturis de la *Westerdoksdijk* per de *IJ*[1] al la Okcidenta

[1] granda akvosurfaco inter la norda kaj la suda parto de la urbo

Trairejo. Dum en la trairejo la trajnoj bruis super iliaj kapoj, ili atingis la akvon de kanalo *Singel*. Tie ili dekstren veturis, al kanalo *Brouwersgracht*. Veturinte sub kelkajn malaltajn pontojn, ili atingis *Keizersgracht*. Antaŭ la *Leliegracht* Hans Rijpkema laŭ peto de De Cock haltigis la malgrandan policboaton.

La maljuna detektivo gestis kiel kapitano antaŭ si, opiniis Vledder. Estis agrableta interrompo de iliaj ĉiutagaj laboroj.

Kiel detektivo li tre malofte kunveturis en policboato.

«Ĉirkaŭ tiuloke», fingromontris De Cock, «en intervalo de unu tago, ni trovis du enakvajn kadavrojn.»

Rijpkema rigardis al li.

«Ĉu ankoraŭ ĉiam vi malŝategas enakvajn kadavrojn?»

De Cock ridetis.

«Ĉu vi memoras tion?»

«Vi estis fifama pro tio,» diris Rijpkema.

«Por ĉikani vin ni foje 'ŝovis' akvan kadavron al vi, kiun vi fakte ne rajtis.»

«Ŝatindaj knaboj vi estis!»

Rijpkema ridis.

«Nur por aŭdi vian furiozan reagon!»

«Ĉe ambaŭ kadavroj,» De Cock senĝene daŭrigis, «la laĉoj de la ŝuoj estis fortike noditaj kaj la manoj kuŝis plektitaj sur la brusto. Kiel montriĝis poste, la fingroj de la manoj estis glufiksitaj unu al la aliaj.»

«Ho, terure.»

De Cock kapjesis.

«Mi preskaŭ konvinkiĝis, ke en la sama loko, ĉi tie en la kanalo, oni forĵetis trian kadavron.»

«Ĉu antaŭ nelonge?»

«Jes.»

«Altstaturan, ĉu?»

De Cock ridetis.

«Fortikstaturan viron. Vledder karakterizis lin kiel voremulon.»

«Tiu okaze ni graplos ne tro profunde,» respondis Rijpkema. «Ni evitu ke ni perturbu ĉiajn fatrasojn kaj suprenakvigu ilin. Tio neniel helpas.»

Post dekoj da vanaj klopodoj Hans Rijpkema mallonge paŭzis. Li esplore rigardis al De Cock.

«Vi ne ĉasas fantomojn, ĉu?»

De Cock rikanis.

«Ĉu iam vi vidis ilin?»

Rijpkema kapskuis kaj daŭrigis sian laboron.

Post pli ol horo la graplo suprentiris la korpon de viro. Hans Rijpkema tre profesie ligis la iom ŝveliĝintan kadavron al la polica boato.

Vledder genufleksis kaj klinis sin trans la randon. Li oblikve rigardis al De Cock. «Vi alian fojon pravis, ĉefo. Tio estas Derek van Achterdiep... kun ligitaj laĉoj kaj la manoj plektitaj sur la brusto.»

# 14

Ŝipestro Hans Rijpkema montris la senvivan korpon de Derek van Achterdiep super la kanalakvo flanke de la policboato.

«Kion ni faru pri li?»

De Cock ridis.

«Kiel iama detektivo de la buroo en *Warmoesstraat*, vi devus scii tion. Mi certigas al vi, ke tiun ĉi ulon oni mortigis.»

Hans Rijpkema rikanis.

«Se mi ĝuste memoras, ĉu la viktimo nun devas iri al la nekropsioĉambro?» li demandis kiel studento divenanta la ĝustan respondon.

«Ĝuste,» diris De Cock kapjesante. «Al la nekropsiejo. Tio ne plu estas en tiu timiga malnova konstruaĵo sur *Overtoom*, kiel estis viaepoke, sed en moderna ejo ĉe la tombejo *Westgaarde* ĉe *Ookmeerweg*.»

«Ja urĝis modernigo.»

La maljuna detektivo vokis Vledder al si.

«Kontaktu la Medicinan Servon kaj petu du ambulancojn. Unu kun reto por hisi la akvokorpon sur la kajon kaj unu por transporti la viktimon al *Westgaarde*.»

«Kaj poste?»

De Cock gestis al la mortinto en la akvo.

«Kiam ni estos liberigitaj de la kadavro de sinjoro Van Achterdiep, ni trankvile navigos kun Hans Rijpkema reen al la oficejo de la Nacia Polico sur Akvo ĉe la *Westerdoksdijk*. Tiam vi ankoraŭ havas vian plezurkrozadon.»

«Kaj post tiam,» la maljuna detektivo etendis la brakojn, «niaj vojoj disiĝas.»

Vledder rigardis lin surprizite.

«Kiel?»

De Cock gestis antaŭ si.

«Post nia kora danko pro la faritaj servoj, ni lasos Hans Rijpkema kaj lian ŝipon ĉe la *Westerdoksdijk*, kaj vi avertos la ĝendarmaron kun la peto veni al la nekropsiejo ĉe *Westgaarde*.»

Vledder kapjesis kompreneme.

«Kaj poste ni iros al *Westgaarde*.»

De Cock balancis la kapon.

«Vi, Dick, vi iros al *Westgaarde* por bonvenigi la ĝendarmaron kaj finaranĝi la aferon tie.»

«Kaj vi?» De Cock ridetis pro la emfazo, kiun ankaŭ Vledder metis sur 'vi'. «Mi lasos vin konduki min al la buroo de *Warmoesstraat*.» Li ĵetis rigardon al sia horloĝo. «Mi havas rendevuon tie post ĉirkaŭ 45 minutoj.»

«Kun kiu?»

«La kvara viro.»

Vledder rigardis lin nekomprene. «Ĉu la kvara viro? Ĉu mi maltrafis ion? De kie vi elvokas kvaran viron, kvaran de kio?»

De Cock kapjesis.

«Nu, restu koncentrita. Kio pri Peter Freedestein… la viro de la Fondaĵo, al kiu ni ankoraŭ ne alproksimiĝis, mi parolos kun li poste.»

La vizaĝo de Vledder heliĝis. «La ŝtipkapulo.»

De Cock kuntiris siajn lipojn.

«Kvalifiko,» li singarde formulis, «de la forpasinta, sufiĉe kolerema Cornelis Grijpskerk. La demando estas ĉu mi havos la saman opinion.»

La maljuna detektivo paŭzis.

«Peter Freedestein,» li daŭrigis, «la direktoro el *Leiden* estas ĉiuokaze la kvara viro de – kiel mi vidas – la pinto

de la Fondaĵo Handgraaf, kiu estas minacata de kompleta ekstermo.»

«Vi estas konvinkita pri tio, ĉu ne?»

«Jes.»

Vledder faris duban vizaĝon.

«Ĉu tiu Peter Freedestein ankoraŭ vivas… aŭ ĉu li jam iris al la fundo de la kanalo?»

De Cock ŝultrotiris.

«Mi telefonis ankoraŭ al li ĉi-posttagmeze.»

Dum lia esploro De Cock rigardis la viron sidantan sur seĝo apud lia skribotablo. Li taksis lin fine de siaj kvardekplusaj vivojaroj. Li havas ovalan vizaĝon, iomete sunbrunigitan, brunajn okulojn. Ekgriziĝis lia nigra hararo. Li surhavis netan grizan kompleton, inkluzive de senmakula blanka ĉemizo kun kongrua kravato. La maljuna detektivo vidis nenion, kio povus kvalifiki la viron kiel 'malgrandan bastardan lampkotonon'.[1] La griza detektivo milde alridetis lin.

«Mia nomo estas De Cock,» li diris afable.

«De Cock, per co-o-co-ko. Mi estas la detektivo, kiu ĉi-posttagmeze telefone petis vin veni ĉi tien hodiaŭ vespere.» Li paŭzis. «Ĉu vi estas Peter Freedestein?»

«Tiu mi estas, jes.»

«Ĉu kundirektoro kaj kunposedanto de Fondaĵo Handgraaf?»

«Ĝuste.»

De Cock denove ridetis.

---

[1]Esprimo malflata por indiki homon ne tre inteligentan

«Mi ne scias ĝis kia grado vi estis informita, sed laŭ miaj informoj vi nun estas la nura posedanto kaj nekontestebla estro de la Fondaĵo Handgraaf.»

Freedestein rigardis lin surprizite.

«Mi… hm, mi demandas min,» li zorge vortigis, «ĉu vi estas bone informita? Mi mastrumas nur malgrandan subsekcion de la Fondaĵo en Leiden.»

De Cock brovumis.

«Ĉu vi ankoraŭ ne scias, kio okazis al Victor Handgraaf kaj Cornelis Grijpskerk?» Peter Freedestein kapneis.

«La du planis vojaĝi al Ĉinio por serĉi novajn komercajn kontaktojn.»

De Cock elflanke rigardis lin.

«Ĉu tio estas via lasta informo?»

«Mi ne ricevis pliajn raportojn el *Amsterdam* pri tiuj du.»

«Strange,» mediteme diris De Cock kaj ekzamenis la vizaĝon de Freedestein, kiu iomete levis la ŝultrojn.

«Mi ĉiam tenas min iom neŭtrala… ne enmiksiĝas en tion kio estas stufata en la amsterdama oficejo sur *Keizersgracht*. Mi ŝatas tion. Estas sinteno kiu eligas min de la problemoj.»

La mieno de De Cock serioziĝis.

«Victor Handgraaf kaj Cornelis Grijpskerk,» diris De Cock solene, «neniam atingis Ĉinion. Ambaŭ estas murditaj. Ni kaptis iliajn senvivajn korpojn el la akvoj de *Keizersgracht*.»

Peter Freedestein fermis la okulojn kaj rigardis la teron dum momento, poste li profunde suspiris.

«Terure,» li diris mallaŭte. «Pri tiu malĝoja novaĵo neniu informis min.»

«Tio ne estas ĉio,» daŭrigis De Cock. «Eĉ malpli ol du horojn antaŭe, post iom da tempo de konstanta dragado en la akvo de tiu sama *Keizersgracht*, ni trovis la korpon de Derek van Achterdiep.»

Freedestein rigardis la maljunan detektivon konfuzite kaj dolorplene. «Ĉu ankaŭ mortigita?»

De Cock kapjesis. «Ĝuste samkiel la direktoroj Handgraaf kaj Grijpskerk.»

«Kiu faris tion?»

De Cock faris ŝultromovon.

«Ni ankoraŭ palpas en mallumo pri tio.»

Peter Freedestein skuis la kapon.

«Kial iu mortigis tiujn homojn? Mi volas diri, kiu interesiĝas pri tio?»

De Cock palpis sian nazon dum momento.

«Mi pensas pri tiu 'graveco' dum sufiĉe da tempo. Pardonu, sed mi trovis nur unu respondon al tio. La nura viro kun intereso pri la morto de tri kunposedantoj kaj kundirektoroj, estas vi.»

Peter Freedestein rigardis lin konsternite.

«Ĉu vi... hm, hm... hm, vi pensas,» li balbutis, «ke mi mortigis tri virojn? Ĉu miajn kundirektorojn?»

De Cock rigardis la viron senpasie.

«Sinjoro Freedestein,» li diris, «kiel vi pensus kiam, kiel sperta detektivo, vi pritraktus murdkazon kun trioble la samaj trajtoj?»

Freedestein mansvingis defende. Liaj manoj tremis kaj la tuta koloro malaperis el lia vizaĝo.

«Ne estas la vero,» li diris eksciite. «Tio reale ne estas la vero. Tiuj murditaj viroj ne estis miaj amikoj. Certe ne. Ili havis timigan aspekton por mi. Ili estis intrigemaj,

ambiciaj viroj. Puraj karieristoj. Tial mi evitis ilian kompanion tiom, kiom eblis, sed mi ne mortigis ilin.»

De Cock restis senmova.

«Mi ne petis neon,» li diris, skuante la kapon.

«Mi petis vin meti vin en mian pozicion de detektivo.»

Peter Freedestein furioze reagis.

«Mi ne povas,» li diris impete, «kaj mi ne volas. Mi ne estas detektivo.»

«Vi ankaŭ ne devas. Mi petas vin fari konsideron kiel homon de komuna prudento.»

Freedestein rigardis lin malamike.

«Mi ne faras tiun konsideron,» li respondis kaprice.

De Cock iomete klinis sin al li.

«Se esti tute racia... se iu havus kapteblan motivon por la murdoj, tiu estus vi. Sinjoroj Handgraaf, Grijpskerk kaj Van Achterdiep ne estis simpatiaj al vi... sentoj de kompato ne ĉeestis ĉe vi, aŭ nur iomete. Kaj la avantaĝoj de via ago ne estas sensignifaj. Male, la murdoj de viaj kundirektoroj faras vin riĉega.»

Peter Freedestein faris malesperan geston.

«Mi ne volas esti riĉa... ne pli riĉa ol mi jam estas. Mi ne estas kiel Handgraaf kaj la aliaj.»

De Cock paŭzis momenton kaj studis la ŝokitan vizaĝon de Peter Freedestein. «Ĉu vin iam aliris viro, kiu petis de vi monon por sia malsana filino?» li subite demandis.

«Ne.»

De Cock reklinis sin en sia seĝo.

«Malgraŭ la motivo, kiun mi skizis al vi, vi neas, ke vi murdis viajn kundirektorojn.» Peter Freedestein kapneis.

«Ne estis mi.»

Per laca gesto, De Cock frotis sian vizaĝon per sia dek-

strra manplato.

«Kiel senkulpa homo, ĉu vi pretas helpi min senmaskigi la veran kulpulon?» Freedestein pendigis siajn ŝultrojn.

«Ĉi-rilate,» li suspiris, «mi faros ĉion ajn kion vi petos de mi.»

De Cock havis dolorajn piedojn. Kun la krurumoj kuspitaj ĝis la genuoj, li plonĝigis siajn blankpalajn krurojn en kuvon da vaporanta akvo. Perlanta sodo tiklis inter liaj piedfingroj. Sin klinante antaŭen, kun vizaĝo tordita pro doloro, li pasigis la manojn sur la maleoloj. Ŝajnis al li, ke legio da malicaj diabloj kun longaj akraj nadloj pikas la nodaĵojn de liaj suroj. La doloro donis al li maltrankvilan senton de malvenko. Li sciis, kion signifas tiu doloro.

Kiam esploro iris malbone kaj kiam li sentis sin pli kaj pli malproksimiĝi de la solvo, venenaj diabloj atakis lin kaj li terure sentis siajn piedojn. Li suprenrigardis al sia edzino, kiu staris antaŭ li kun peza kaldrono da varma akvo en la mano.

«Ĉu mi aldonu pli da varma akvo?» ŝi demandis maltrankvile.

De Cock kapjesis.

«Atentu, mi petas.»

Estis timo en lia voĉo.

Ŝi verŝis akvon en la kuvon.

«Ĉu ankoraŭ pli?»

La maljuna detektivo faris malakceptan geston.

«Mi ne estu boligita viva,» li kriis malbonhumore. «Mi ne estas omaro.» Sinjorino De Cock ridis. Ŝi konis la hu-

morojn de sia edzo kaj sciis, ke lia malbona humoro pli rilatas al lia laboro ol al liaj piedoj.

«Ĉu vi ankoraŭ ne finesploris?», ŝi demandis dolĉe.

De Cock movis siajn krurojn tien kaj reen.

«Kion?» li demandis superflue.

«Tiuj murdoj de la direktoroj de la Fondaĵo Handgraaf.»

De Cock kapneis.

«Antaŭe, solvi murdkazon similis krucvortenigmon,» li grumblis, «nun ĝi estas kiel kriptogramo.» Li iomete levis sian dekstran kruron kaj lasis la akvon guti de lia piedo. «Krimulo kutimis porti nigran sveteron kaj havis barbon de kelkaj tagoj. Nun li portas konvenan kravaton kun bone tajlita kompleto kaj estas tute razita.»

Grumblante, li eltiris sian alian kruron el la akvo kaj kaptis mantukon. Sinjorino De Cock staris apude, balancante la kapon. «Rapidu, Jurrian,» ŝi instigis lin. «Vi devas iri al *Warmoesstraat*.»

De Cock snufis.

«Mi estas ekstere nokton post nokto. Ili povas atendi min dum unu horo matene.»

Sinjorino De Cock eligis profundan ĝemon.

«Rapidu. Vledder jam vokis kelkajn fojojn kaj demandis kie vi estas.»

La maljuna detektivo suprenrigardis.

«Kion volas tiu knabo?»

Sinjorino De Cock kliniĝis kaj forigis la kuvon el sub liaj piedoj.

«Li ne estas 'knabo',» ŝi korektis. «Li estas via kolego. Laborema junulo, kun kiu vi multe amuziĝas. Li estis sufiĉe entuziasma telefone kaj parolis pri grava evoluo.»

De Cock grumblis, mallevis siajn pantalonkrurojn kaj

suprentiris siajn ŝtrumpojn.

«Kia evoluo?»

«Li ne diris al mi. Li nur diris, ke estis ĉe li vizitanto.»

Kiam unu horon poste, De Cock enpaŝis en la grandan detektivĉambron, li trovis Vledder, kiel kutime, malantaŭ la ekrano de lia komputilo. La viglaj fingroj de la juna detektivo dancis super la klavaro. Kiam li ekvidis la maljunan detektivon, li paŭzis kaj atendis pacience ĝis De Cock sidiĝis malantaŭ sia skribotablo.

«Vi ja eĉ ne tro multe malfruiĝis ĉi-matene. Kiam mi rigardas vian vizaĝon, vi eĉ fruiĝis kelkajn horojn. Ĉu vi ne sukcesas komenci la tagon?»

De Cock kliniĝis malantaŭen en sia seĝo, ekŝovis siajn krurojn antaŭen kaj indikis.

«Miaj piedoj estis lacaj. Jam la hieraŭan vesperon, sed post la pridemandado de Peter Freedestein, mi estis tro laca kaj tro obtuza por cerbumi pri tio. Mi enlitiĝis kaj tuj ekdormis. Ĉi-matene mi sentis ilin denove. Mi do unue mergis miajn nebonvolajn subulojn en kuvon plenan de varma akvo.»

Vledder suprenrigardis al li, kapskuante kaj kvazaŭ zorge.

«Kiel vi fartas nun?» li demandis nur iom tro dolĉe.

De Cock momente premis siajn surojn kaj poste mallevis siajn krurojn.

«Ĝi estas for!»

La vizaĝo de Vledder ekheliĝis.

«Feliĉe… tio ege malpezigas mian koron.»

De Cock rigardis lin iom suspekte. Sed sur la vizaĝo

de la juna detektivo ne vidiĝis moko.

«Mia edzino rimarkis ke ĉi-matene frue jam estis ĉe vi vizitantoj.»

«Jes, kaj vi neniam sukcesos diveni kiu li estis: …Svelta Luĉjo.»

De Cock reagis surprizite.

«Ĉu li estis ĉi tie, en 'Kit'?»

«Li demandis pri vi kaj li evidente estis seniluziigita kiam mi lin diris ke vi ankoraŭ ne alvenis.»

De Cock montris pensan sulkon sur la frunto.

«Svelta Luĉjo ne volonte forlasas sian restadejon. Li ne volas esti vidata en 'Kit'. Tio estas malbona por lia klientaro.»

Vledder ridetis.

«Li tuj malaperis. Mi ne havis la okazon demandi lin pri io ajn.»

«Kion li havis?»

Vledder tiris papereton kun noto al si.

«Do mi notis ĝin. Laŭlitere li diris: *Ĉe la loterio ili maltrafegis iun*.»

«Ĉu li ne diris kiun?»

«Ne.»

«Tiam ankaŭ li ne sciis tion.»

La juna detektivo frapis sur sian papereton kun la noto per sia montrofingro. «Tio ĉi estas galimatio por mi. Ĉu vi povas traduki tion por mi en klaran lingvon?»

De Cock lante kapjesis.

«Ili faris gravan eraregon. Iun, kiu absolute rajtis ricevi parton de la gajnita ĉefpremio en la loterio,» li parolis morne, «oni simple ne partoprenigis en la profito.» Vledder esplore alrigardis sian maljunan instruiston.

«Ĉu vi trovas tiun 'maltrafegon' grava? Mi volas diri, same grava kiel Svelta Luĉjo? Li estis preta frumatene veni al nia policejo.»

«Mi vizitos la *IJsselsteinse Bank*».

«Kion vi devas fari tie?» Vledder demandis surprizite.

De Cock levis sian montrofingron.

«Vi forgesas, ke Victor Handgraaf, Cornelis Grijpskerk, Derek van Achterdiep kaj Peter Freedestein kune laboris en sekcio de tiu banko.»

La mieno de Vledder pliheliĝis.

«Kaj tie,» li kriis gaje, «devis kunpartigi mire gigantan sumon el la loterio.»

«Ekzakte.»

«Cetere, ĉu vi ankoraŭ atingis ion per tiu kvara viro?»

De Cock kapjesis.

«Mi detalege kaj konvinke eksplikis al li, ke li, Peter Freedestein kaj nur li, havas ĉian profiton sisteme likvidinte siajn tri kundirektorojn kaj kunposedantojn por fariĝi solreganto de la Fondaĵo.»

Vledder rigardis lin gajaspekte.

«Kaj?»

De Cock ridetis.

«Li tiom teruriĝis pro tiu rekta akuzo, ke li ne havis racian sindefendon. Li ne povis refuti miajn kulpigojn.»

Vledder gaje reagis.

«Ĉu li konfesis?»

«Ne, tiuokaze li nun sidus malsupre en la ĉelo kaj la afero estus solvita. Li malkonfesis pasie kaj konvinke. Sed la timo pro mia akuzo de triobla murdo estis tiom profunda, ke li promesis helpi nin... en kiu ajn maniero... por senmaskigi la veran kulpulon.»

«Ĉu vi akceptos lian helpon?»

De Cock kapjesis malrapide.

«Se tiel konvenos.»

La maljuna detektivo konsultis sian brakhorloĝon.

«Estas tempo por vi iri al *Westgaarde*. Prenu la Golfon por vi. Por mia dikventra korpo, firma promeno al la *IJsselsteinse Bank* ĉe *Herengracht* estas bona afero.»

De Cock kapjesis emfaze.

«Dum nia lasta vizito al lia populara ejo, Luĉjo jam donis indikon en tiu direkto. Tiutempe estis io, li diris, pri la divido de la mono. Mi tiam malmulte atentis pri tio, sed Luĉjo evidente ade demandadis tiudirekte inter sia konatularo.»

Vledder mire rigardis lin.

«Kial?»

De Cock mienis naŭze. «En la krimcirkvito mistrafo estas grava delikto. La trompo de kompaniano estas konsiderata perfido. Mi suspektas, ke sufiĉe multaj lasttempaj likvidmurdoj koncernas ion kio similas maltrafegon.»

Vledder mangestis senhelpa.

«Kiel… hm, kiel ni ekscios,» li hezite parolis, «kiu estas misbatita en nia kazo?»

De Cock ne tuj respondis.

«Je kioma horo estos la nekropsio de la kadavro de Derek van Achterdiep?»

«Jam je la 12-a horo.»

«Frue.»

«Ankaŭ laŭ mi, sed tio plej bone konvenis al doktoro Rusteloos. Mi ja ne povas enrigardi la agendon de la patologanatomo kaj mem fiksi momenton.»

De Cock ridis.

«Zorgu, ke vi estu ĝustatempe.»
«Kaj kion vi faros intertempe?»
De Cock mangestis antaŭen.

Pli ol tri horojn poste De Cock konstatis kiel Vledder gaje envenis la grandan esplorĉambron. La juna detektivo malleviĝis en la seĝon malantaŭ sia skribotablo.

«Doktoro Rusteloos demandis kiom da akvokadavroj li ankoraŭ devas perlabori pro ni.»

De Cock ridetis.

«Ni esperu, ke Van Achterdiep estas la lasta. La murdisto ja ne povas forĵetadi korpojn en *Keizersgracht* eterne.»

«Sed ja estis unu specialaĵo,» diris Vledder.

«Devio kompare al la du antaŭaj viktimoj.»

«Kaj kio estas tio?»

«Van Achterdiep ne havis trinkakvon en siaj pulmoj.»

De Cock reagis surprizigite.

«Do, kion anstataŭe?»

Vledder grimacis.

«Malpuran, putran fosaĵakvon.»

«Tiam la murdanto transsaltis fazon kaj ĵetaĉis la korpon de Van Achterdiep en la kanalon en ebria stato – do ankoraŭ vivanta.»

«Sed tiam mi tamen scivolas,» demandis Vledder, kun malespero en la voĉo, «kiel la murdanto kroĉis siajn viktimojn. Kie li ebriigas ilin, kaj kial la stultaj faradoj kun tiuj kunmetitaj manoj kaj gluitaj fingroj?»

De Cock mordis sian malsupran lipon.

«Mi esperas trovi konvinkajn respondojn al viaj demandoj hodiaŭ.»

«Ĉu hodiaŭ?»

De Cock kapjesis.

«Mi atendas alvokon.»

«Kies?»

«De la kvara viro.»

Vledder sulkis la brovojn.

«Ĉu vi denove renkontis lin?»

«Peter Freedestein estas nuntempe en la polica ĉefsidejo. Tie li ricevas aparaton de nia teknika servo por la interna poŝo de sia jako. Li devas nur premi ĝin per sia pugno kaj alarmo sonas sur nia poŝtelefono.»

«Kial alarmo?», demandis Vledder.

De Cock faris defendan geston.

«Vi vidos. Mi ankaŭ dungis Appie Keizer kaj Fred Prins. Appie aperos en sia karakteriza alivestaĵo en *Oude Hoogstraat* kaj Fred Prins gardos la *Kloveniersburgwal*.»

Vledder rigardis lin nekomprene.

«*Kloveniersburgwal*... kion Fred Prins devas fari sur *Kloveniersburgwal*?»

De Cock suspiris. «La loĝloko malantaŭ la cigarbutiko de Arnold van Heusden estas multe pli granda kaj multe pli vasta ol mi suspektis. Kiel montriĝis al mi hodiaŭ posttagmeze, estas eĉ enirejo sur *Kloveniersburgwal*. Kaj tiun enirejon, aŭ elirejon, se vi volas, gardos Fred Prins.»

«Ĉu vi iris tien por rigardi?»

De Cock skuis la kapon.

«Pere de la katastro mi trovis la posedanton de la konstruaĵo kaj li havigis al mi domplanon.»

Vledder grandokule rigardis lin.

«Kaj kion ni faros?»

De Cock ridetis.

«En *Oude Hoogstraat* en la unua etaĝo,» li eksplikis, «loĝas viro kiun mi antaŭ kelkaj jaroj povis ne enkarcerigi, sed elkarcerigi, post pruvo pri la falseco de la akuzo kontraŭ li. Ni rajtas uzi lian loĝejon kiel observejon.»

«Observejon de kio?»

De Cock etendis siajn manojn. «Alfronte troviĝas la cigarbutiketo de Arnold van Heusden.»

Ili mallumigis la antaŭĉambron. El la mallumo ili observis la pordon de la tabakejo je la alia flanko de la strato. Ankoraŭ estis sufiĉe da trafiko en *Oude Hoogstraat*. La fakto, ke ilian elrigardon ĝenis de temp' al tempo pasantaj kamionoj, iom nervozigis De Cock. Li retroŝovis la manikon de sia malnova pluvmantelo por rigardi sian horloĝon. Estis tro mallume en la ĉambro por vidi la indikitan horon. La maljuna detektivo sentis kiel la streĉiĝo kaptas lin. Lia koro batis altfrekvence kaj vejno pulsadis en la nuko. Li konsciis, ke tio eble ne estas tiom bona por homo de lia aĝo, sed li ja konis tiun pasion dum ĉi tiaj momentoj.

Lia telefono knaris en la interna poŝo de lia pluvmantelo. La voĉo de Appie Keizer eksonis.

«Viro estas sonoriganta. Laŭ mi la viro kiun vi celas. La personpriskribo ĝustas.»

Dum momento estis silento.

«La pordo,» Appie Keizer daŭrigis, «estas malfermata kaj la viro eniras.» Vledder puŝis De Cock en lia flanko. «Kaj nun?»

«Ni atendu la alarmon.»

«Kiom longe tio povas daŭri?»

«Neniun ideon.»

«Je kiu punkto tiu kvara viro sonorigos la alarmon?»

De Cock ĝemis.

«Kiam oni metos trinkaĵon antaŭ li.»

«Ĉu trinkaĵon?»

De Cock kapjesis.

«Kun ebriiga GoHoBo.»

«De kiu?»

De Cock ne respondis, ĉar en tiu momento la alarmo eksonoris. Ili haste forlasis la malhelan ĉambron, rapide malsupreniris la ŝtuparon kaj kuris tra la trafiko al la alia flanko. De Cock jam havis la ĝustan ŝlosilbarbon en sia mano kaj post sekundoj li havis la butikpordon malŝlosita. Li puŝis Vledder sur la ŝultro.

«Vi antaŭiru kaj prenu la pretan trinkaĵon. Tio estas grava pruvo.»

Vledder paŝis en la butikon antaŭ li.

En tiu momento sonoris la pordo.

La koro de De Cock haltis momenton. Tiun sonorilon li forgesis en sia planado. Malantaŭe en la butiko, viro rigardis ĉirkaŭ la angulo kaj fuĝis. Vledder kuris post li.

En la ĉambro malantaŭ la vendejo viro sidis sur seĝo. Sur la tablo antaŭ li estis renversita glaso... ruĝa likvaĵo gutas de la tablo sur la plankon. Vledder kuris post la fuĝanto. Li atingis *Kloveniersburgwal* tra la malfermita malantaŭa pordo. Sur la trotuaro Fred Prins kuŝis sur viro. Vledder kaŭris apud li kaj poste rigardis supren al De Cock rapidante al li.

Miro brilis en la okuloj de la juna detektivo.

«Tio estas Arnold van Heusden.»

De Cock kapjesis.

«Triobla murdinto, kun religia kredo.»

# 15

LA PORDA sonorilo en la koridoro ankoraŭ iom postsonis. De Cock malfermis la pordon de sia loĝejo.

Antaŭ li, sur la perono staris Vledder, kun Adelheid van Buuren apud si, ĝoje ridanta.

En sia maldekstra mano ŝi tenis belegan bukedon kun floroj. Ŝi larĝe ridetante klinis la kapon al Vledder.

«Mi scias ke Dick kutimas kunporti florojn por via kara edzino. Tiun kutimon mi transprenas de li.»

De Cock afektis sinĝenon, flankenpaŝis kaj envenigis ilin.

Vledder haltis momenton. Subite lin trafis kiom laca kaj maljuna estas lia kolego. Antaŭ li, en la porda enirejo, li vidis la bildon de maljuna viro. Fulmis tra lia kapo, kiom ofte li jam vizitis De Cock okaze de tiaj vesperoj.

Ĉiam kun belega bukedo por lia edzino, plejofte rozoj. Tio emociis lin mallonge. Tamen, tiu maljunulo havis talenton, ĉi-vespere denove li malkovros al siaj vizitantoj kiel li solvis ĉi-lastan kazon.

Kun atento kaj admiro aŭskultos Vledder. Tenere li momenton ĉirkaŭprenis la talion de Adelheid kaj singarde puŝis ŝin en la halon.

«Ĉu la aliaj jam alvenis?», li poste demandis.

De Cock kapjesis.

«Fred Prins kaj Appie Keizer kiom eble plej laŭte parolas. Ili superŝutas mian edzinon per sangofrostigaj rakontoj.»

«Ĉu mensogoj?»

«Sendube.»

Ili enpaŝis la loĝoĉambron. Sinjorino De Cock tuj leviĝis kaj skuis la manojn de Adelheid kaj Dick. Kun ravesprima gesto ŝi akceptis la belegan bukedon de floroj. Po-

ste ŝi mansvingis invite al kelkaj profundaj foteloj.

«Vi komforte sidiĝu, tiam mi rapide okupiĝos pri la floroj.»

Vledder kapjesis kaj ridetis al la aliaj antaŭ ol li eksidis en la fotelon apud Adelheid. Li ne sciis kial, sed li sentis iom da nostalgio ĉi-vespere. Li metis la manon sur tiun de sia amikino kaj ankoraŭfoje ĉirkaŭrigardis la rondon.

Fred Prins atendis ĝis la ĉeesto de ĉiuj, sed ne povis plu atendi.

Li senpacience ŝovis sin antaŭen kaj demandis: «De Cock, kio do iris malbone hieraŭ vespere?»

La maljuna detektivo sin profundigis en sian fotelon kaj pro honto tenis la dekstran manon antaŭ la vizaĝo.

«La eraro kaŝiĝis denove en eta manko de atento», li senkulpigis sin.

«Kiom longe mi ja jam laboras en ĉi tiu fako, kiom ofte mi klarigas al vi la gravecon de detaloj, ĉi-foje mi pretervidis detalon. Mi forgesis, ke en la plejparto de la butikoj sub la pordomato kuŝas sonorilkontakto. Tiu eksonoris kiam Vledder eniris tiun cigarbutikon. La surpriza elemento estis for. Arnold van Heusden vidis nin enirantajn. Li fuĝis, sed unue renversis la glason kun la trinkaĵo kiun li preparis.»

«Ĉu la pruvo for?»

De Cock skuis la kapon.

«Ni poste povis savi ankoraŭ sufiĉe da likvo por pruvi ke ĝi enhavas GoHoBon.» Appie Keizer rigardis al De Cock.

«Mi konis tiun Van Heusden. Mi ja foje eniris lian butikon. Ĉu li volis mortigi tiun vizitanton?»

La maljuna detektivo lace levis la manon.

«Antaŭ ol mi klarigos… ni respektu la tradicion.»

Li prenis botelon da konjako Napoleon, kiun li konservis speciale por tiaj okazoj en stoko, kaj malavare plenigis la fundon de la konveksaj, antaŭvarmigitaj glasoj. Li ofertis tiujn al siaj geamikoj. Poste li eksidis rekte kaj solene levis sian glason.

«Ni tostu,» serioze diris li, «ni tostu je mia amiko Svelta Luĉjo, kiu, post serio da eraroj, finfine sendis min en la bonan direkton.»

Vledder ridis.

«Al *IJsselsteinse Bank*.»

De Cock kapjesis.

«Al sekcio de tiu banko, kie antaŭ pli ol tri jaroj laboris kvar viroj kiuj kune, klube, partoprenis loterion kaj ĉiumonate pagis malgrandan sumon por la aĉetado de lotoj.»

«Tiuj estis Victor Handgraaf, la librotenisto kaj gvidanto de la klubo, Derek van Achterdiep, Cornelis Grijpskerk kaj kiel kvara Peter Freedestein. Sed,» De Cock silentis momenton kaj rigardis ĉirkaŭe en la rondo, «tie laboris ankoraŭ kvina viro. Atentu, ankaŭ li partoprenis la saman loteriklubon: Arnold van Heusden.»

«Kiam je unu el la lotoj aĉetitaj de la klubo giganta premio alvenis, la tiel nomata ĉefpremio, van Heusden estis malsana. Li restis hejme, tro streĉita. La laboro en la banko pezis sur lin, krome lia filino estis grave malsana.»

«Laŭ Peter Freedestein, kiun mi hieraŭ ankoraŭfoje ĝisfunde esplordemandis, Victor Handgraaf proponis ne kundividi la premion kun Arnold van Heusden kiu jam de kelka tempo ne ĉeestis en la banko. La aliaj konsentis sen iu ajn rezervo.»

Vledder ridetis.

«Ho, Arnold van Heusden maltrafis la monon.»

De Cock daŭrigis kaj ĝuis la atentan aŭskultantaron.

«Kiam van Heusden post sia malsana periodo revenis en la bankon, li rimarkis, ke liaj kvar kolegoj petis maldungon dum la fondo de la profita Fondaĵo Handgraaf.»

«Inter la dungitoj de la banko furoris onidiro pri la financado de la Fondaĵo per la mono kiun ili gajnis en la loterio.»

«Kiam van Heusden petis sian parton de la premio, la membroj de la Fondaĵo diris ke li, Arnold van Heusden, neniam estis membro de la loterioklubo.»

Adelheid van Buuren reagis akre.

«Kia malicaĵo!»

«Efektive, vera malicaĵo. Van Heusden komprenis, ke li ne povas pruvi siajn pretendojn je parto de la loteriomono. Estis neniu administra pruvo kaj reguloj por la loterioklubo neniam estis fiksitaj. Ankaŭ la nomoj de la partoprenantoj nenie aperis sur dokumento.»

«Kiam Arnold van Heusden povis – malmultekoste – transpreni cigarbutikon ĉe *Oude Hoogstraat* de amiko, li eksiĝis el sia posteno ĉe la banko.»

Fred Prins kuntiris siajn brovojn.

«Ĉu li plue lasis la aferon?»

La vizaĝo de De Cock malsereniĝis.

«Ĝis oni konstatis tumoron en la hepato de lia filino. Treege malica tumoro, kun amplekso de pli ol kvin centimetroj. Al van Heusden oni diris ke tiom granda tumoro ne plu estas forigebla per operacio. Alivorte: lia filino estis mortkondamnita.»

De Cock silentis momenton kaj prenis gluton de sia konjako.

«Iutage Arnold van Heusden malkovris, ke kapabla ki-

rurgo de ege multekosta kliniko en Usono sukcesis forigi el ies hepato tumoron kiu ampleksis ses kaj duonan centimetrojn. Ĉar al tiu operacio ligiĝis longa tempo de kontrolo kaj rekapabligo, van Heusden kompreneble ja ne povis financi tion.»

Vledder kapjesis.

«Mi komprenas. Li iris al la direktoroj de la Fondaĵo Handgraaf kaj petegis al ili savi lian filinon.»

Adelheid van Buuren ĝemis kaj emociplena metis sian manon antaŭ la vizaĝon. «Ho, ho... ĉu ili rifuzis?»

De Cock subenigis sian kapon.

«Kiam kelkajn monatojn poste lia filino mortis pro la tumoro, van Heusden decidis venĝi sin.»

La maljuna detektivo paŭzis momenton.

«De lia antaŭa superulo ĉe *IJsselsteinse Bank*,» li daŭrigis, «mi aŭdis, ke Arnold van Heusden estis konata kiel tre religia viro. Supozeble el tiu kredo ekestis la ideo ke kulpuloj, kiuj laŭ lia konvinko respondecis pri la morto de lia sola filino, en sia morto ankoraŭ preĝu al Dio por peti pardonon.»

Vledder suspiris.

«La morto en preĝo.»

«Tion vi bele esprimas, Dick,» reagis De Cock, «sed la plektitaj manoj kun glufiksitaj fingroj fontas el praktikaj konsideroj.»

«La korpojn de Handgraaf kaj Cornelis Grijpskerk li post la narkoto metis en sian propran bankuvon, kiun li plenigis per kranakvo.»

«Tie li lasis ilin droni. Van Heusden ne sciis ekzakte kiom da tempo daŭros la narkoto de liaj viktimoj. Kun kungluitaj manoj kaj fiksitaj ŝulaĉoj ili... se ili baldaŭ even-

tuale vekiĝus el sia narkoto, tamen ne povus eskapi la morton.»

Vledder svingis per streĉita brako por peti atenton.

«Kial Arnold van Heusden volis mortigi ankaŭ sinjoron Freedestein? Li ja ne petis monon de tiu?»

De Cock suspiris. La longa klarigo lacigis lin.

«Peter Freedestein,» li klarigis, «montriĝis preta telefoni al van Heusden kaj diri al li ke li scias kiu faris la murdojn kaj kial.»

Vledder kompreneme kapjesis.

«Ekzakte, ĉar tiun pretecon devigis Sankta Hermandado[1], en la persono de De Cock.»

Li rikanis kaj ekmienis aprezan rikanon. Jen lia maljuna majstro en vera optimuma formo. Tia ankaŭ li volis fariĝi.

De Cock daŭrigis.

«Tio estis la kialo por Arnold van Heusden inviti Peter Freedestein al drinkado ĉe si hejme.»

«Kun la surprizo por van Heusden de ankoraŭ kelkaj neinvititaj gastoj kaj kun la fino plenvizaĝe sur la peronkaheloj,» diris Fred Prins ridante.

De Cock rigardis serioze kaj ankoraŭfoje enverŝis. Li finis sian klarigon.

Vledder flustris al sia amikino: «Per pensado, Adelheid, kombinado kaj deduktado, tiel oni famiĝas en ĉi tiu fako.»

«En tio vi ja sukcesos, Dick,» ŝi respondis kun amoplena rigardo.

Ili enmiksiĝis en parolado kun la aliaj personoj kaj la

[1]Sankta Hermandado estas moknomo de la polico. Hermandado estas hispandevena vorto por frataro

diskuttemoj ĝeneraliĝis. La abomenaj murdoj iom malaperis en la fonon.

Sinjorino De Cock venis el la kuirejo kun pladoj plenaj de bongustaĵoj.

«Krimo valoras la penon!» ŝercis Appie Keizer al ŝi.

Estis jam sufiĉe malfrue, kiam ĉiuj gastoj estis foririntaj.

Sinjorino De Cock alŝovis pufon kaj eksidis antaŭ la fotelon de sia edzo.

«Mi atendis ĉi-vespere ke iu demandu ion.»

«Kion?»

«Laŭ mi io ne ĝustas.»

«Kio ne ĝustas?»

«Van Heusden neniel povas esti farinta tiujn murdojn sola. Li ja ricevis helpon de iu. Ne eblas alie. Do, pripensu… la trenadon de tiuj korpoj kaj levi ilin en la bankuvon kun kranakvo, poste levi la mortintojn el la bankuvo, la transporto de la kadavroj al *Keizersgracht*… tion li neniel povas esti farinta tute sola. Tion vi ja ankaŭ devas kompreni.»

De Cock indiferente suprentiris la ŝultrojn.

«Arnold van Heusden diras ke li jes faris tion. Li diris: 'Mi ĉion faris sola. Kaj en tio mi persistos ĝis mia morto.'»

«Kaj ĉu vi kredas lin?»

De Cock ne tuj respondis.

«Mi pensis pri la helpo de lia edzino. Tiu loĝas en modesta ĝardendometo ĉe la rando de la urbo. Mi eĉ pensis pri Laurens van der Dungen. Lia Willemijn estus dankema pro tiu helpo.»

«Kaj?»

De Cock suspiris.
«Mi lasas la aferon tiel.»
«Ĉu la prokuroro ne ekhavos la ideon pri iu helpanto?»
De Cock ame karesis ŝiajn harojn.
«Tiom da sagaco vi ne atendu ĉe justicaj aŭtoritatoj.»

# Dankvortoj

La teamon partoprenis: Peter Ebenau, el Amsterdamo, kiu kuraĝe kaj entuziasme iniciatis la tradukan aventuron; Bert de Wit kaj An Olijslagers, kiuj diligente kaj zorge elnederlandigis la tekston de la krimromano; Rob Moerbeek, kiu tradukis kaj provlegis malavare kaj bonkore; Federico Gobbo, profesoro pri Interlingvistiko kaj Esperanto en la Universitato de Amsterdamo, kiu – kunlabore kun aliaj teamanoj – provlegis la esperantigon kaj finpretigis la definitivan enpaĝigon de la bitlibro.

Laste sed ne balaste, la teamo dankas al ĉiuj bonvolaj homoj kiuj multmaniere subtenis la projekton.

Sen vi, ĉi tiu bitlibro neniam aperintus.

*Amsterdamo, 16 Aprilo 2023*